


# Eksperimentoj kun la Vero

aŭ

La Aŭtobiografio



**Mahatma Gandhi**

[www.senatero.blogspot.com](http://www.senatero.blogspot.com)

**Omaĝe al la Mahatmo  
Mohandas Karamĉand Gandhi  
(n. la 2an de Oktobro 1869)**



Bildo danke al s-ro Samuel Vijay Kumar

**Eksperimentoj kun la Vero  
aŭ  
La Aŭtobiografio**

**de  
Mohandas Karamchand Gandhi**

**Tradukita de A Giridhar Rao  
El la Hindia kaj la Angla**



# Enhavo

Unua Parto .....	6
Enkonduko .....	7
1. Naskiĝo .....	11
2. Infanaĝo.....	14
3. Infanedziĝo.....	16
4. Edzeco [Noto 1] .....	19
5. Ĉe la Altlernejo .....	22
6. Tragedio - I.....	26
7. Tragedio - II .....	29
8. Ŝtelo kaj Kontricio .....	32
9. La Morto de la Patro kaj Mia Duobla Honto .....	35
10. Religiaj Ekvidoj.....	38
11. Preparo Iri Fremdlanden.....	42
12. Ekster la Kasto.....	46
13. Finfine Atingis Anglujon.....	49
14. Mia Plaĉo .....	52
15. En 'Civiliza' Vestaĵo .....	55
16. Ŝanĝoj .....	58
17. Dietaj eksperimentoj.....	61
18. Singardemo -- Mia Ŝildo .....	65
19. La Veneno de la Malvero .....	69
20. Enkonduko al la Religioj .....	72
21. Ramo: La forto de la malfortaj [Noto 1] .....	75
22. Narajan Hemĉandr [Noto 1] .....	77
23. La Granda Ekspozicio .....	81
24. Advokato, jes, sed kion poste? .....	83
25. Mia dilemo.....	86
Dua Parto .....	89
1. Rajĉandbhai.....	90
2. Mondeniro .....	93
3. La Unua Proceso .....	96
4. La Unua Ŝoko.....	99
5. Preparoj iri al Sudafriko.....	102
6. Survoje al Pretorio .....	105
7. Pliaj malfacilaĵoj .....	107
Glosaro .....	109
Notoj.....	110



# Unua Parto

## **Enkonduko**

Antaŭ kvar aŭ kvin jaroj, pro la peto de miaj intimaj kunuloj, mi konsentis verki aŭtobiografion, kaj eĉ ĝin komencis. Sed mi eĉ ne plenigis la unuan folion kiam ekbrulis la mumbaja tumultega vulkano, kaj la komencita tasko restis nefinita. Poste mi estis kaptita en afero post afero kiu kulminis en mia enkarceriĝo en Jeravda. Ankaŭ Frato Ĝejramdas estis tie. Li proponis al mi, ke mi flankenmetu ĉion, kaj finu la aŭtobiografion. Mi respondis, ke mi jam fiksas stud-programon, kaj nur post ĝia finiĝo, mi povos komenci la aŭtobiografion. Se mi havus la bonŝancon travivi mian punperiodon en Jeravda, mi ja skribintus la aŭtobiografion tie. Sed mi estis liberigita unu jaron antaŭ ol finiĝis eĉ la stud-programo. Mi eĉ ne povis komenci la aŭtobiografion. Tial ĝi ne estis skribita. Nun Svami Anand denove antaŭmetis la saman demandon. Mi jam skribis la historion de la Satjagraha en Sud-Afriko, kaj do estas tentata verki la aŭtobiografion. La peto de la Svami estas, ke mi finverku la tutan vivhistorion kaj ke poste oni eldonu ĝin libroforme. Mi ne havas tiom da neinterrompata tempo. Se entute mi ĝin verku, mi povas verki ĝin nur por Navĝivan. Mi ĉiukaze devas skribi ion por Navĝivan. Do kial ne la aŭtobiografion? Svami konsentis pri tiu mia decido, kaj jen mi havas la okazon verki la aŭtobiografion.

Sed aŭdante pri mia decido, iu pia amiko demandis al mi dum mia lunda silento-tago: "Kial vi volas verki aŭtobiografion? Tiu ĉi estas okcidenta tradicio. Neniu scias pri tia verkado en la oriento. Kaj kion vi volas skribi? Kio okazos se vi morgaŭ ne plu kredos tion kion vi hodiaŭ kredas vera principo? Aŭ se vi ŝanĝos la kriteriojn de via ago? Multaj homoj konsideras viajn skribaĵojn la fina pruvo, kaj laŭigas siajn vivojn. Eble ili mispaŝos, ĉu ne? Tial, taŭgus ne verki la aŭtobiografion, almenaŭ nun, ĉu ne?"

Tiu argumento havis iom da efiko sur mi. Sed mi efektive ne volas verki aŭtobiografion. Sub la preteksto de aŭtobiografio, mi volas rakonti nur pri miaj pluraj eksperimentoj kun la vero. Veras, ke pro la fakto, ke mia vivo estas interplektita en tiuj eksperimentoj, tiu rakonto prenos la formon de vivhistorio. Sed se ĉiupaĝe troviĝus nur miaj eksperimentoj, mi mem konsiderus tiun rakonton senkulpa. Mi kredas,

ke estus utile meti antaŭ la publiko la tutan aron de miaj eksperimentoj -- aŭ konsideru tion mian iluzion. Barato jam konas miajn eksperimentojn en la kampo de la politiko; ne nur tie ĉi, sed ĝi ankaŭ estas konataj en ĉiuj tiuj mondpartoj kiujn oni rajtas nomi civilizaj. Por mi, ĝi valoras ege malmulte, kaj do la titolo de Mahatmo kiun mi gajnis pro tio, ankaŭ malvaloras. Plurfoje min eĉ dolorigis tiu adjektivo. Mi ne memoras eĉ unu fojon kiam mi fieris pri tiu adjektivo. Sed mi ja ŝatus rakonti pri miaj propraj spiritaj eksperimentoj, pri tiuj kiujn nur mi prikonas -- en kiuj ankaŭ naskiĝis mia forto en la politika kampo. Se tiuj eksperimentoj ja estas spiritaj, tiam ne ekzistas eĉ la ebleco fieri pri tiuj. Tiuj nur povas pligrandigi la humilecon. Ju pli longe mi pripensas la pasintecon, des pli klare videblas miaj limigoj. Tio kio mi volas atingi, tio pri kio mi klopodis kaj strebis dum la lastaj 30 jaroj, estas la memkonscio, vidi la dion mem, atingi la liberigan savon, la mokŝa-on. Ĉiuj miaj agoj havas tiun ĉi celon. Tio ankaŭ estas la celo de mia verkado; kaj jen tio kio regas mian konduton en la politika kampo.

Sed mi ĉiam kredas, ke tio kio inde eblas por unu indas kaj eblas por ĉiuj. Tial mi ne eksperimentis kaŝe. Mi ne kredas, ke ilia spiriteco malpliigis se ĉiuj povas vidi ilin. Nepre ekzistas aferoj kiujn nur la animo scias, kaj tie tiuj restas. Mi ja ne povas komuniki tiajn aferojn. En miaj eksperimentoj, la spirita signifas la moralan; la darmo estas moralo; spirite nutrita moralo estas la darmo. Tial tiuj aferoj kiujn pridecidas knaboj, junuloj, kaj aĝuloj -- nur tiuj aferoj estos traktataj en tiu ĉi rakonto. Se mi sukcesos verki tiun ĉi rakonton senpasie kaj kun humileco, mi povos liveri ion por aliaj eksperimentuloj.

Mi ne pretendas pri ia kompleto de miaj eksperimentoj. Same kiel sciencisto faras siajn eksperimentojn precize, rigore, penseme, kaj detaloplene, kaj eĉ tiam li ne nomas la rezultojn finaj, kaj restas vigla pri la eraro de siaj konkludoj se ne tute dubemaj pri ili, ankaŭ mi asertas la saman pri miaj eksperimentoj. Mi animserĉis min profunde, zorge observis ĉiun mian emocion, analizis ilin. Sed, ke la konkludoj aplikas al ĉiuj, ke ili veras aŭ ke nur ili veras, tiujn asertojn mi neniam volus fari. Mi jes povas aserti la jenon: laŭ mia vidpunkto, ili veras, kaj ŝajnas finaj. Se ili ne ŝajnus tiel, mi ne devus subteni iujn ajn el miaj agoj per ili. Sed ĉion kion mi renkontas, mi dividas en prenendaĵon kaj lasendaĵon, kaj laŭ la prenendaĵojn mian konduton mi



laŭigas. Sed ĝis tiam kiam tia konduto donas animplezuron al mi, tiel estas, al miaj intelegenteco kaj animo, ĝis tiam mi devas fidi pri ĝi.

Se mi volus priskribi nur principojn, tiel estas, esencojn, tiam mi tute ne rajtus verki tiun ĉi aŭtobiografion. Sed mi volas doni la historion de la agoj faritaj surbaze de tiuj principoj kaj esencoj, kaj tial mi donis al tiu eseo la unuan titolon [Noto 1] de "Eksperimentoj kun la Vero". Tio inkluzivas eksperimentojn kun tiuj principoj distingitaj de la vero nome ahimsa -- senperforteco --, brahmaĉarya -- fraŭleco --, ktp. Sed min regas la vero, kaj en ĝi estas inkluzivitaj multaj aliaj principoj. Ne temas pri ĝenerala -- laŭbuŝa -- vero. Ĝi veras kaj en la vorto kaj en la penso. Tiu ĉi vero ne estas tio imagita de ni, sed sendependa, eterna vero; alivorte ĝi ja estas la dio.

Difinoj de la dio estas sennombreblaj ĉar la povoj de la dio ankaŭ sennombreblas. Tiuj ĉi formoj mirigas min. Ili foje eĉ min ravis. Sed nur la verforman dion mi adoras. Nur tiu estas la vero, la ceteraj estas mitoj. Mi ne trovis tiun veron, sed mi estas ĝia esploranto. Dum tiu esplorado, mi pretas oferi mian plej amantan aĵon, kaj mi certas ke mi eĉ pretas kaj kapablas oferi mian korpon mem en la fajron de tiu ĉi esplorado. Sed ĝis tiam kiam mi atestas tiun ĉi veron, mi prenas imagan veron kiun mia animo kredas esti la vero, kaj konsiderante ĝin la gvidlampo, mi kondutas mian vivon per ĝi.

Kvankam tiu ĉi vojo ŝajnas razilronda, mi trovis ĝin ege facila. Marŝante sur tiu vojo, mi sentis eĉ miajn plej grandajn mispaŝojn trivialaj, ĉar malgraŭ tiuj mispaŝoj mi sekuriĝis, kaj progresis laŭ mia kompreno. Mi ekvidas malproksime tiun ĉi veron -- la dion. Ĉiutage mi plicertiĝas, ke ekzistas nur unu vero, kaj krom tio, nenio ekzistas en tiu ĉi mondo. La legantoj de Navĝivan ja estas bonvenaj se ili volas ekscii kiel mia certo pligrandiĝas, kaj iĝi kunlaborantoj en miaj eksperimentoj kaj ekvidi kun mi la veron. Kunekun tio mi ankaŭ certiĝas ke tio kio eblas por mi ankaŭ eblas por knabo, kaj mi havas fortajn kialojn por kredi tion. La iloj por la esploro de la vero estas tiel facilaj kiel ili estas malfacilaj. Ili ŝajnus nefareblaj al arogantulo, kaj ŝajnus ege facilaj al senkulpa knabo. La esploranto de la vero devas resti pli malalte eĉ de la polvo. La tuta mondo frakasas la polvon, sed ĝis tiam kiam la adoranto de la vero ne malaltiĝas tiugrade ke la polvoj mem povus lin disfrakasi, ĝis tiam ne eblas eĉ la ekvido de la sendependa vero. La afero estas klare diskutita en la dialogo inter la

prasaĝuloj Vasiŝta kaj Viŝvamitra. Kristanismo kaj Islamo ankaŭ pravas tiun ĉi veron.

Se legantoj vidas aroganton en la venonta verkaĵo, ili nepre devus konkludi, ke mi eraris en mia esploro, kaj, ke mia vizio estas nur miraĝo. Ne gravas se malvenkiĝu miloj kiel mi, sed triumfu la veron. Ni ne malgrandigu la veron nur por mezuri malgrandajn animojn.

Mi volas, ke neniu konsideru miajn verkon aŭtoritatajn. Jen mia peto. Mi nur volas, ke la eksperimentoj priskribitaj en ĝi estu konsiderataj ilustraĵoj, kaj ke ĉiuj faru siajn proprajn eksperimentojn laŭeme kaj laŭpove. Mi ja kredas, ke en tiu ĉi limigita kampo, mia aŭtobiografiaĵoj donos multon, ĉar mi kaŝos nenion dirindan. Mi esperas, ke mi povos doni al la legantoj plenan priskribon de miaj mankokulpoj. Mi devas priskribi la eksperimentojn kun la vero; mi tute ne deziras priskribi mian boneco. La mezurilo per kiu mi volas min mezuri, kaj per kiu ni ĉiuj devas sin mezuri -- pri tiu mezurilo mi certe dirus [Noto 2] kun Surdas:

Kie troviĝas aĉa fiulo kiel mi?

Mi forlasis tiun kiu min kreis

Tia malfidindulo mi!

Ĉar tiu kiun mi tutkore kredas la majstron de ĉiu mia spiro, tiu al kiu mi ŝuldas ĉion, mi ankoraŭ foras de li, ĉiumomente tio min ĝenas. La kialojn por tio -- miajn neperfektaĵojn -- mi ja povas vidi, sed ankoraŭ ne forigi.

Sed mi finu tiun ĉi, ĉi tie. El la enkonduko mi ne povas eniri la rakonton pri la eksperimentoj. Tiu troviĝos en la rakontado mem.

Mohandas Karamĉand Gandhi

Sabarmati

26a de la Novembro, 1925 [Noto 3]

## 1. *Naskiĝo*

La Gandhioj apartenas al la kasto Bania kaj ŝajne origine estis spicistoj. Sed por tri generacioj, ekde mia avo, ili estis Ĉefministroj en diversaj ŝtatoj de Kathiawad [kat-tia-wad]. Onidire, Uttamchand [ut-tam-ĉand] Gandhi, alinome Ota Gandhi, mia avo, estis homo de principoj. Ŝtataj intrigoj devigis lin lasi Porbandar-on, kie li estis la Diwan [divan], kaj serĉi rifuĝon en la ŝtato Junagadh [ĝunagar]. Tie li salutis la Nawab-on maldekstramane. Iu, rimarkante la ŝajnan malĝentilecon, demandis al li klarigon, kiu estis donita jene: 'La dekstra mano estas jam promesita al Porbandar.'

Ota Gandhi edziĝis dua foje, perdinte la unuan edzinon. Li havis kvar filojn de sia unua edzino kaj du de sia dua edzino. Mi ne pensas ke en mia infanaĝo mi iam ajn sentis aŭ sciis ke tiuj ĉi filoj de Ota Gandhi ne estis ĉiuj de la sama patrino. La kvina el tiuj ses fratoj estis Karamchand [karam-ĉand] Gandhi, alinome Kaba Gandhi, kaj la sesa estis Tulsidas Gandhi. Ambaŭ fratoj estis Ĉefministroj en Porbandar, unu post la alia. Kaba Gandhi estis mia patro. Post sia divanado de Porbandar, li membriĝis la korto Rajasthanik [raĝast-hanik]. Li estis por kelke da tempo Ĉefministro en Rajkot [raĝkot] kaj poste en Vankaner. Li estis pensiulo de la korto de Rajkot kiam li mortis.

Kaba Gandhi edziĝis kvarfoje, perdinte sian edzinon ĉiufoje al la morto. Li havis du filinojn de siaj unua kaj dua edziĝoj. Lia lasta edzino, Putlibai, naskis filinon kaj kvar filojn -- mi estis la plej juna.

Mia patro estis amanto de sia klano, verama, brava, kaj malavara, sed kolera. Iugrade li ankaŭ estis voluptulo. Li edziĝis la kvara foje kiam li estis pli ol 40-jara. Sed li estis senkoruptebla kaj gajnis reputacion pri strikta senpartieco kaj en la familio kaj ekstere. Lia lojaleco al la ŝtato estis bone konata. Iufoje Asistanta Politika Agento parolis insulte pri la estro, la Rajkot Thakore Saheb, kaj li kontraŭis la insulton. La Agento koleris kaj postulis ke Kaba Gandhi demandu pardonpeton. Tion li rifuzis fari, kaj estis tial enkarcerigita por kelkaj horoj. Sed kiam la Agento vidis ke Kaba Gandhi obstinis, li ordonis ke li estu liberigita.

Mia patro neniam ambiciis pri riĉeco kaj lasis por ni fratoj tre malmulte da posedaĵoj.

La eduko de la patro estis nur sperta. Tion kion ni hodiaŭ nomas edukon de la kvina klaso, li eble akiris edukon tiunivelan. Li sciis nenion pri la historio kaj la geografio. Sed lia sperto pri praktikaj aferoj estis tiel altgrada, ke li neniam spertis malfacilecon en la solvo de la plej komplikaj demandoj aŭ en la administrado de miloj da homoj. Da la religia trejnado li havis tre malmulte, sed li havis tian kulturon religian kiun oftaj vizitoj al la temploj kaj la aŭskultado de religiaj paroladoj disponas al multaj hinduoj. Dum siaj lastaj tagoj li komencis legi la Gita-on je la instigo de bramana familia amiko, kaj li laŭt-ripetis kelkajn strofojn ĉiutage dum la adorohoroj.

Mia ĉefa impresio estas pri la sankteco de mia patrino. Ŝi estis profunde religia. Sen la ĉiutagaj preĝoj, ŝi neniam manĝis. Ĉiam ŝi iris al Haveli -- templo de la viŝnua sekto. Kiel eble plej retroiras mia memoro, mi ne povas memori ke ŝi iam maltrafis la feston Chaturmas [ĉaturmas]. Ŝi komencis la plej malfacilan voton, kaj kompletis ilin senrompe. Eĉ dum malsaniĝo ŝi ne lasis la votojn. Mi memoras ke ŝi foje observis la voton Chandrayna [ĉandrajana]. Ŝi malsaniĝis dum la votado sed ne rompis la voton. Manĝi unufoje ĉiutage dum la Chaturmas estis kutima afero por ŝi. Malkontentiĝinte pri tio, dum iu Chaturmas ŝi votis ke ŝi manĝos je ĉiu tria tago. Sekvaj du-tri tagaj fastoj estis kutima afero por ŝi. Dum iu Chaturmas ŝi votis ke ŝi ne manĝos sen vido de la suno. Ni infanoj dum tiuj tagoj staris, fikse rigardante la ĉielon, atendante anonci la aperon de la suno al nia patrino. Ĉiuj scias ke dum la pinto de la musono la suno ofte ne konsentas vidigi sian vizaĝon. Kaj mi memoras tagojn kiam, ĉe ĝia subita apero, ni kuregis kaj kriis, "ma-ma, jen la suno!"; kaj la patrino ekscite venis, sed de tiu tempo la suno jam estis malaperinta, kaj la patrino revenis, dirante, "Tio ne gravas, la manĝaĵo ne estas en la sorto hodiaŭ"; kaj ŝi revenis al siaj devoj.

Mia patrino havis fortan komunan saĝon. Ŝi estis bone informita pri ĉiuj aferoj de la ŝtato. La sinjorinoj de la korto taksis ŝian inteligenton alta. Mi estis knabo. Fojfoje, la patrino prenis min kun si al la korto. Mi ankoraŭ memoras kelkajn el la diskutojn inter ŝi kaj la vidviĝinta patrino de la Thakore Saheb.

Al tiuj ĉi gepatroj mi naskiĝis en Porbandar, alinome Sudamapuri, je la 2a de Oktobro 1869.

Mi pasis la infanaĝon en Porbandar. Mi memoras ke mi aniĝis lernejo tie. Kun iom da malfacileco mi trapasis la multiplikan tabelon. Mi nur memoras ke kune kun aliaj knaboj, mi lernis voki niajn instruistojn ĉiajn finomojn. Mi ne memoras plu. Mi tial divenas ke mia intelekto devis esti malvigla, kaj la memoro estis same kiel la nekuiritaj papad - - legumenaj fritajoj -- de nia insultaj infanrimo.

## 2. Infanaĝo

De Porbandar, la patro iĝis ano de la Korto Rajasthanik kaj iris al Rajkot [raĝkot]. Tiam mi eble aĝis sepjara. Mi estis aniĝinta en la vilaĝa lernejo de Rajkot. Mi ja memoras bone tiujn tagojn. Mi eĉ memoras la nomojn kaj aliajn detalojn de la instruistoj kiuj min instruis. Same kiel en Porbandar, ankaŭ ĉi tie, preskaŭ nenio notindas pri miaj studoj. Mi apenaŭ estis eĉ mezqualita lerneĵano. De tiu ĉi lernejo al la suburba lernejo, kaj de tie al la altlernejo. Mi jam atingis dek du jarojn. Mi ne memoras ke mi iam dum tiu ĉi periodo mensogis al miaj instruistoj. Nek memoras ke mi amikigis iun ĝis tiam. Mi estis tre sinĝena knabo. En la lernejo, mi okupiĝis nur pri mia laboro. Mi atingis la lernejon ĝuste kiam sonis la sonorilon, kaj kuris hejmen tuj post la fermo de la lernejo. Mi uzas la vorton "kuris" emfaze, ĉar mi ne ŝatis paroli kun iu ajn. Kaj jen la plua timo: se oni min mokus?

Okazis io notinda dum la ekzameno de la unua jaro mem ĉe la altlernejo. S-ro Giles [ĝailz], la eduka Inspektoro, venis por inspekti nin. Li donis kvin vortojn kiel literumada ekzercado. Unu el tiuj vortoj estis 'bolkruĉo'. Mi misliterumis ĝin. La instruisto signalis min per la pinto de sia boto. Sed kiel mi estu signalita? Estis preter mia kompreno ke la instruisto volas ke mi kopiu la literumon de la ardezo de mia najbaro. Mi efektive kredis ke la instruisto estis tie por malpermesi kopiadon. La rezulto estis ke ĉiuj knaboj, krom mi, literumis ĉiun vorton ĝuste. Nur mi restis stulta! La instruisto poste komprenigis al mi mian stultecon; sed tio havis nenian efikon sur mia menso. Mi neniam sukcesis lerni kopiadon de la najbara ardezo.

Tamen tiu afero tute ne malgrandiĝis mia estimo por la instruisto. Laŭnature mi estis blinda pri la neperfektaĵoj de miaj plejaĝuloj. Poste mi sciis pri aliaj mankoj de tiu ĉi instruisto, sed mia respekto por li restis la sama. Mi sciis ke oni devas obei la ordonojn de la plejaĝuloj; kaj ne pridemandu iliajn agojn.

Mi ĉiam memoras du aliajn eventojn de la sama periodo. Kutime mi malŝatis legi iujn librojn krom la lernejo-libroj. La ĉiutagaj lernitaĵoj devis esti parkerigitaj, netolereblis riproĉo, malĝustis trompi la instruistojn, tial mi plenumis la lecionojn. Sed la menso laciĝis, tial ofte la leciono restis malfirma en la menso. En tiaj cirkonstancoj kial

mi dezirus legi plu? Sed min okulfrapis libro aĉetita de la patro. Ĝi titoliĝis Ŝravan Pitribhakti Natak (dramo pri la sindoneco de Ŝravan al siaj gepatroj). Mi legis ĝin per intensa intereso. Ĉirkaŭ la sama tempo venadis hejm-al-hejme homoj kun kinoj. Ĉe ili mi ankaŭ vidis tiun scenon pri Ŝravan, portanta per skarpoj aranĝitaj sur siaj ŝultroj, siajn gepatrojn sur pilgrimado. La libro kaj la bildo lasis profundan impreson sur mia menso. Mi arde deziris ke ankaŭ mi iĝu same kiel Ŝravan. La tortura lamento de la gepatroj pri la morto de Ŝravan ankoraŭ estas freŝa en mia memoro. La likvigan melodion mi eĉ lernis ludi je la koncertino. Mi ŝatus lerni la koncertinon, kaj la patro havigis al mi koncertinon.

Ĉirkaŭ la sama tempo, venis drama-trupo, kaj mi akiris permeson vidi dramon de ili. La dramo estis Hariŝĉandra. Mi simple ne tedis vidi tiun dramon. Mi deziris vidi ĝin plurfoje. Sed kiu permesus min iri tiom foje? Mensbilde mi ludis la dramon ripete. Mi songis pri la Hariŝĉandra. 'Kial ne ĉiuj estas verama, same kiel la reĝo Hariŝĉandra?' Jen la demando. Sekvi la veron kaj trapasi tiujn ĉiujn afliktojn kiujn suferis Hariŝĉandra estis la reala vero. Mi laŭlitere kredis la rakonton pri la suferoj de Hariŝĉandra. Pensante pri la rakonto kaj la dolorego de Hariŝĉandra, mi ofte ploris. Hodiaŭ mia komuna saĝo diras al mi ke Hariŝĉandra ne estas historia homo. Tamen eĉ hodiaŭ ambaŭ Hariŝĉandra kaj Ŝravana estas vivantaj por mi. Mi kredas ke se mi legus tiujn dramojn, eĉ hodiaŭ larmoj elfluos el miaj okuloj.

### **3. Infanedziĝo**

Mi ŝatus ne skribi tiun ĉi ĉapitron. Sed mi scias ke mi devos engluti multajn tiajn dozojn amarajn dum tiu ĉi rakontado. Kaj mi ne povas fari alie, se mi pretendas esti adoranto de la vero. La menso doloras kroniki ke mi edziĝis je la aĝo de dek tri. Hodiaŭ mi vidas ĉirkaŭ mi gejunulojn dek du aŭ dek tri jarajn. Kiam mi vidas ilin kaj pensas pri mia edziĝo, mi emas kompati min mem kaj gratuli tiujn ĉi gejunulojn pro ilia eskapo de mia sorto. Mi ne povas eltrovi ian moralan argumenton apogante mian edziĝon je la dek tria aĝo.

La leganto ne eraru ke mi parolas pri la fianĉiĝo. En Kathiawad troviĝas du apartaj ritoj, la fianĉiĝo kaj la edziĝo. La fianĉiĝo estas prepara promeso flanke de la gepatroj de la knabo kaj la knabino ligi ilin en edziĝo. La fianĉiĝo estas rompebla. Se la fianĉo mortas dum la fianĉiĝo, la fianĉino ne iĝas vidvino. La gefianĉoj ne havas ajnajn rilatojn. Ili eĉ ne scias pri la afero. Mi estis fianĉiĝinta tri foje. Kiam okazis tiuj ĉi tri fianĉiĝoj, mi tute ne scias. Oni diris ke du fianĉinoj mortis unu post la alia. Tiel mi scias ke mi estis fianĉita tri foje. Mi havas malprecizan memoron ke mia tria fianĉiĝo okazis en mia sepa jaro. Sed mi ne memoras ke mi estis informita pri ĝi. Dum la edziĝo necesas la gefianĉoj, kaj la edziĝo mem havas proprajn ritojn. Kaj nun mi skribas pri mia edziĝo, pri kio mi havas la plej klaran memoron.

La legantoj jam scias ke ni estis tri fratoj. La plej aĝa inter ili estis jam edziĝinta. La dua estis du aŭ tri jaroj pli aĝa ol mi. La plejaĝuloj decidis fari tri edziĝojn samtempe. Tiu de la dua frato, de la juna filo de mia onklo, kaj de la mia. Ne temis pri nia bonfarto, des malpli niaj deziroj. Temis nur pri la oportuneco kaj ekonomio de la plejaĝuloj.

Inter la hinduoj, la edziĝo ne estas simpla afero. La gepatroj de la gefianĉoj ruinas sin dum edziĝo, ili malŝparas sian monon, sian tempon. La pretiĝado komencas antaŭ monatoj. Vestoj estas faritaj, ornamoj estas faritaj, buĝetoj por la vespermanĝoj estas preparitaj, oni konkurencas pri la diverseco de la pladoj. Virinoj, ĉu aŭ ili posedas bonan voĉon, kantadas ĝis la voĉo malglatiĝas, eĉ ĝis malsaniĝo, kaj maltrankviligas la najbarojn. Tiuj lastaj, siavice, kviete toleras la bruon, amasegon, restaĵojn de la festenoj, kaj la tutan aĉan



malpurecon, ĉar ili scias ke venos la tempo en kiu ankaŭ ili kondutos sin sammaniere.

Kia bone, pensis la plejaĝuloj, forfini la tutan ĝenon kaj ĉagrenon je unu fojo. Eĉ se malpli koste, la edziĝo povas esti farita pompe, ĉar se oni farus tri edziĝojn samtempe, oni povas spezi monon libere kaj manmalferme. La patro kaj la onklo estis maljunuloj. Ni estis iliaj lastaj filoj. Tial ili eble volis ankaŭ ĝui tiun lastan plej bonan okazon de siaj vivoj. Pro tio, kaj aliaj tiaj konsideroj, oni decidis fari tiujn tri edziĝoj samtempe, kaj kiel mi jam diris, la preparoj komencis antaŭ jam de monatoj.

Nur tiuj ĉi preparoj avertis nin fratojn pri la venontaj edziĝoj. Mi ne kredas ke ĝi signifis ion al mi ol la okazo surmeti bonajn vestaĵojn, tamburado, ĉeval-rajdado dum la edziĝ-procesioj, riĉaj vespermanĝoj kaj stranga knabino kun kiu mi povas ludi. La karna deziro venis poste. Kiel ĝi venis -- mi ja povas rakonti tion, sed la leganto ne kurioziĝu tiel. Mi proponas vualigi mian honton per kurteno. Mi venos al la mencindaĵoj. Sed tiu ĉi afero rilatas ege fore al tiu centro kiun mi metis antaŭ mi dum tiu ĉi rakontado.

Ni fratoj ambaŭ estis prenitaj de Rajkot al Porbandar. Tie estis faritaj la ritoj de la ŝmirado de niaj tutaj korpoj per kurkuma pasto -- amuzaj detaloj, tamen apudmetindaj.

La patro estis Diwan, sed tamen servisto ja, kaj des pli ĉar li estis favorita de la reĝo, Thakore Saheb. Tiu lasta ne permesis lin foriri ĝis la fina momento. Kaj finfine li lasis la patron nur du tagojn antaŭ la edziĝo. Li tamen aranĝis specialajn diliĝencojn. Sed..! Sed la dioj pensis alie. Porbandar estas 120 mejloj de Rajkot, kvin-taga vojaĝo per bovĉaro. La patro faris la distancon en tri, sed la diliĝenco ŝancelis dum la tria stacio, kaj li estis grave vundita. Li alvenis mane kaj dorse bandaĝita. Kaj lia kaj nia intereso pri la venonta evento estis duon-detruita. Tamen, la ceremonioj ja estis kompletitaj. Kiel maltrafi la bonaŭgurajn datojn de la edziĝo? Tamen, mi jam forgesis la malĝojon pri la vundoj de la patro dum la infanaj amuzaĵoj de la edziĝo.

Mi ja amegis la gepatrojn, sed same amis la sensamajn pasiojn, ĉu ne? Ĉi tie, la sensamo ne temas nur pri la sensoj; ĝi signifas la tutan voluptan sperton. Mi ankoraŭ bezonis lerni ke ĉiuj feliĉo kaj plezuro devas esti oferitaj en sindonema servo al la gepatroj. Kaj do, kvazaŭ

puno por mia deziro por sensaj plezuroj, okazis io, kio ĝis hodiaŭ ĝenas min.

Rezigno pri l'aĵoj sen rezigno pri l'deziroj,  
Ne elteneblas malgraŭ mil da provoj  
Kiam ajn mi kantas aŭ aŭdas tiun ĉi kanton de Nishkulanand, tiun ĉi amaran, aĉan eventon mi memoras kaj min hontigas.

La patro vizaĝis kuraĝe, malgraŭ siaj vundoj, kaj partoprenis plene en la edziĝo. Eĉ hodiaŭ mi povas ekzakte memori la lokojn kie sidiĝis la patro kiel ni plenumis la diversajn devojn de la ceremonio. Mi eĉ ne sonĝis ke venos la tago kiam mi severe kritikos la patron pro mia edziĝigo dum la infanaĝo. Ĉio tiam ŝajnis tute taŭga kaj ŝatiga. Mi volis edziĝi, kaj ĉion kion faris la patro mi taksis ĝusta. Tial la detaloj de tiuj eventoj estas freŝaj en mia memoro.

Ni sidiĝis sur la edziĝ-podio, ĉirkaŭpiedis la sanktan fajron, metis la dolĉan Kansar-on en la buŝo de unu la alian, kaj ekde tiam la novediĝintoj ekkunvivis. Ho, tiu unua nokto! Du naivaj infanoj tute nesciante ĵetis sin en la vivmaron. La edzino de mia frato jam antaŭinstruis min pri mia konduto dum la unua nokto. Mi ne scias kiu trejnis mian edzinon. Mi neniam demandis ŝin pri tio, nek emas nur fari tion. La leganto estu certa ke ni estis tro nervaj alfronti unu la alian. Ni certe estis tre singenaj. Kiel mi parolu al ŝi, kaj kion mi diru? Kiel efikus la antaŭinstruadon? Sed ĉu antaŭlernigado vere necesus en tiuj ĉi aferoj? Mi kredas ke kie fortas la tuta kulturo (kiu inkluzivas la antaŭan naskiĝon) tie superfluas ĉia antaŭinstruado. Ni ekkonis unu la alian, kaj ekparolis libere kune. Ni estis la sama aĝo. Sed mi jam ekvestis min per la aŭtoritato de la edzo.

## 4. *Edzeco [Noto 1]*

En la tempo de mia edziĝo akireblis malgrandaj broŝuretoj kiuj kostis po paisa aŭ eĉ malmulte -- mi ne nun memoras. Tiuj libretoj diskutis edziĝamon, monŝparemon, infanedziĝon, ktp. Kelkajn el ili mi renkontis kaj tralegis. Mi jam al kutimiĝis forforgesi tion kion mi ne ŝatis kaj praktiki la ŝatitan. Mi legis, ke edzo havas devon praktiki unuedzinecon. Tiu konsilo ege plaĉis min. Mi iukaze ŝatis la veron, do neniel povis trompi la edzinon. Mi komprenis, ke oni ne havu rilatojn kun iu alia virino. Krome, en tia juneco troviĝas malmulte da oportuno rompi la veton pri unuedzineco.

Sed tiuj bonpensoj havis malbonan efikon. Se mi devus observi unuedzinecon, la edzino devas observi unuedzecon. Pro tiu penso mi iĝis ĵaluza edzo. De "devas observi" mi venis al "devigas observi". Kaj se mi devigus observi unuedzecon, mi devas zorge rimarki ŝin. Mi havas nenian kaŭzon suspekti la fidecon de la edzino. Sed kial la ĵaluzo serĉus kaŭzon? Mi ĉiam devis scii kien iras la edzino. Tial sen mia permeso ŝi tute ne povas iri ie ajn. Tiu ĉi iĝis radiko por dolorigaj kvereloj inter ni. Ne iri ie ajn sen la permeso ja estas speco de prizono. Sed Kasturbai ne povis toleri tian malliberecon. Kie ajn ŝi volis, ŝi ja iris sen mia permeso. Ju pli mi premis ŝin, des pli ŝi tutlibere sin kondukis, kaj des pli mi ĉagrenis. Pro tio la ĉeso de la kunparolado inter ni infanoj iĝis kutima afero. Mi taksas senkulpa la liberecon kion montris Kasturbai. Kial knabino kiu tute ne havas kulpon povus toleri premon pri vizito al la templo aŭ al siaj amikinoj? Se mi alpremas ŝin, kial ŝi ne rajtas alpremi min? Nur nun mi komprenas ĉion ĉi. Tiam mi devis pruvi mian edzecon.

Sed la leganto ne pensu ke tiu nia hejmvivo estis tute sendolĉa. Mia krueleco fontis el la amo. Mi volis fari idealan virinon el la edzino. Mi volis ke ŝi estu pura, restu pura, lernu tion kion mi lernas, legu tion kion mi legas, kaj ke nia vivoj estu kunplektitaj.

Ĉu aŭ ne Kasturbai havis tiun ĉi senton, mi ne scias. Ŝi estis analfabeta. Ŝi estis laŭnature honesta, sendependa, laborema, kaj iukaze kun mi, neparolema. Ŝi ne malfeliĉis pri sia ignoreco. Dum la infaneco, ŝi neniam sciigis al mi la senton, ke estus bone se ankaŭ ŝi studadis same kiel mi. Pro tio mi kredas ke mia sento estis unuflanka.

Mia sensama vivo dependas de nur unu virino, kaj mi volis reciprokon. Eĉ tie kie la amo estas unuflanka, plejparte ne troviĝas la malfeliĉo. Mi devas diri ke mi estis sensamege allogita al la edzino. Eĉ ĉe la lernejo mi ofte pensis pri ŝi. Jen la noktiĝo, kaj jen nia renkontiĝo, mi revadis. Netolereblis la foriĝo. Per mia sensenca babilaĉo, mi tenis ŝin veka. Mi kredas ke se mi ne posedis devosenton kunekun tiu sensameco, mi malsaniĝintus kaj eĉ mortiĝintus, aŭ vivus kiel pezulon sur la tero. 'Ekde la morgaŭ oni devas droni sin en la ĉiutagaj devoj, oni ne trompu iu ajn' -- tiaj pensoj savis min de multaj malfacilaĵoj.

Mi jam skribis ke Kasturbai estis analfabeta. Mi ege ŝatis instrui ŝin. Sed kiel permesus la lernigadon la volupto? Unue mi devigis lernigi ŝin. Kaj eĉ tio povus esti farita nur dum la nokta soleco. Kiam ĉeestis la plejaĝuloj, oni eĉ ne povis ekrigadi la edzinon. Kiel do kunparoli? En tiu tempo troviĝis en Kathiawad la senutila kaj barbara kutimo de la vualado de virinoj; eĉ hodiaŭ ĝi estas vaste trovata. Pro tio la cirkonstancoj ne favoris mian lernigadon. Krome, mi devas konfesi ke en mia vivo, ĉiuj miaj provoj pri instruado, preskaŭ senefikiĝis. Kiam mi vekiĝis de la sensama sonĝo, mi jam ensaltis en la ĉiutagan rutinan vivon. Tial mi ne kapablis doni multe da tempo. Lernigado per instruisto ankaŭ pruvis senefika. Jen la kialoj ke hodiaŭ Kasturbai apenaŭ kapablas skribi leteron, kaj legi simplan Gujaratan [guĝaratan]. Mi kredas, ke se mia amo ne estis malpurigita de la sensamo, hodiaŭ ŝi estus klera virino. Mi venkus ŝian malemon studi, ĉar mi scias ke nenio neblas por la pura amo.

Mi jam diris unu kialon kiel mi povis savi min malgraŭ mia sensama vivo kun la edzino. Jen alia kialo. Post miloj da spertoj mi atingis la konkludon ke tiu kies celo estas vera, tiun la dio mem savas. Se la hindua socio enhavas malutilan kutimon kiel infanedziĝon, ĝi ankaŭ enhavas kutimon kiu donas iom da libereco. La gepatroj ne permesas la infangedzojn resti kune tre longe. La infanedzino spezas pli ol duonon de sia tempo ĉe siaj gepatroj. Tio okazis ankaŭ ĉe ni; tio signifas ke ekde la 13a jaro ĝis la 19a, tutsume ni ne spezis pli ol 3 jarojn kune. Post 6-8 monatoj da kunvivado, la gepatroj vokadis. Tiam ege ĝenis tiun vokon, sed ĝuste pro tio ni ambaŭ saviĝis. Plue, en mia 18a jaro, mi iris fremdlanden, pro kio okazis bellonga disiĝo. Eĉ post mia reveno ni eble spezis nur 6 monatojn kune, ĉar mi veturadis inter

Rajkot kaj Mumbai. En tiu tempo venis la vokon de Sud-Afriko. Kaj je tiu tempo mi jam konsciiĝis.

## 5. *Ĉe la Altlernejo*

Mi jam skribis ke dum la tempo de mia edziĝo, mi studis ĉe la altlernejo. Tiam ni tri fratoj studis en la sama lernejo. La plej aĝa studis en la supera klaso kaj la frato kiu estis edziĝinta samtempe kiel mi studis en la posta klaso de la mia. La rezulto de la edziĝo estis ke ni du fratoj perdis unu jaron. Por mia frato la rezulto estis eĉ pli malbone. Post la edziĝo li simple ne povis studi plu. Nur la dio scias kiom da junuloj devas suferi tiajn malbonajn efikojn de la edziĝo! Nur en la hindua socio povas oni studadi kaj edziĝi samtempe.

Mia studado daŭris. Ĉe la altlernejo, mi ne estis taksata inter la malinteligentuloj. Mi ĉiam sukcesis kapti la korojn de la instruistoj. Ĉiujare atestiloj estis senditaj de la lernejo al la gepatroj pri la progreso kaj konduto de la lernanto. En tiuj neniam troviĝis noto pri ia malbono en mia konduto aŭ studado. Post la dua klaso mi gajnis premiojn, kaj en la kvina kaj sesa klasoj, mi eĉ gajnis stipendion de respektive kvar kaj dek rupioj ĉiumonate. En tiu ĉi afero pli grave rolis la sorto ol mia inteligento. Tiuj ĉi stipendioj ne estis por ĉiuj, sed nur por la plej bona lernanto el la regiono Saŭrath. En klaso de 40-50 lernantoj, kiom da povus esti el Saŭrath en tiu tempo?

Mi mem kredas ke mi neniam fieris pri mia inteligento. Je la gajno de premio aŭ stipendio mi miris. Sed pri mia konduto mi ege zorgis. Se la konduto iel makuliĝis, mi eĉ ploris. Se pro io farita de mi, la instruistoj devis riproĉi min, aŭ se la instruistoj pensis ke mi devas esti riproĉata, tio iĝis tute netolerebla por mi. Mi memoras ke foje mi estis punbatita. Mi ne sentis doloron pro la batado, sed pro la fakto ke oni konsideris min puninda. Mi multe ploris. Tio okazis en mia unua aŭ dua klaso. Alia okazaĵo apartenas al mia sepa klaso. Tiam estris la lernejo Dorabji [dorabĝi] Edulji [edulĝi] Gimi. Li amis la lernantojn ĉar li igis nin sekvi la regulojn, ĝuste plenumis kaj plenumigis taskojn, kaj instruis nin bonege. Por la lernantoj de la altaj klasoj, li faris deviga la ekzercadon kaj kriketon. Mi ne ŝatis ilin. Antaŭ ili iĝis devigaj mi ja neniam ludis kriketon aŭ futbalon, nek ekzercadis. Kvankam, mi ne konsciis tion, tamen, mia sinĝeneco estis la nura kialo. Nun mi vidas ke tia malŝato estis mia eraro. Tiam mi malĝuste kredis ke la eduko havas nenian rilaton kun ekzercado. Poste mi

komprenis ke en la edukado, ekzercado, t.e., la fizika eduko, devas havi la saman gravecon kiel la mensan edukon.

Tamen, mi devas diri ke mi ne difektiĝis pro la neekzercado. La kialo estas ke mi legis en libroj la konsilon ke oni devas marŝi en malfermaj spacoj. Tiun konsilon mi ŝatis. Tial ekde la tempo de mia altlernejo mem, kaj ĝis nun, mi al kutimiĝis al la piedpromenado. Eĉ la vagado estas ekzercado ĉu ne, kaj pro tio bone malmoliĝis la korpo.

La dua kialo por la malŝato estas ke mi ege volis servi la patron. Tuj post ni liberiĝis de la lernejo, mi rekte iris hejmen, kaj tie, ekservis la patron. La deviga ekzercado iĝis obstaklo al tiu servo. Mi petis ke mi estu liberigita de ekzercado pro la patra servo. Sed kial s-ro Gimi liberigu min? Iusabate, mi devis iri por la ekzercado vespere je la kvara. Mi ne posedis horloĝon. Nuboj kovris la ĉielon, kaj mi do ne povis diveni la horon. Mi estis trompita de la nuboj. Kiam mi venis por la ekzercado, ĉiuj estis jam foririntaj. Dum la posta tago, kiam S-ro Gimi vidis la registron mi ne estis en tiu listo. Oni demandis la kialon de mi. Mi respondis ĝustvere. Li ne konsideris ĝin vera kaj monpunis min. Mi devis pagi unu aŭ du ana-oj (mi ne nun memoras la ĝustan sumon). Mi estis mensoganto! Tio ege ĉagrenis min. Kiel pravi ke mi ne estas mensoganto? Mi ne trovis vojon. Mi silentiĝis. Ploris. Mi komprenis ke tiu kiu diras la veron, kaj faras la ĝustan laboron, tamen ne restu senkonscia. Dum mia lernanta vivo, tio estis la unua kaj lasta okazo de tia eraro. Mi nebule memoras ke mi finfine povis liberigi de tiu monpuno.

Tamen, finfine mi sukcesis min liberigi de la ekzercado. La patro skribis leteron al la lernejestro dirante ke post la lernejaj horoj, li volis uzi min por sia servado. Tial mi liberiĝis.

Anstataŭ ekzercado, mi promenadis, tial mi eble ni suferis la konsekvencojn de mia malemo ekzercadi. Sed en alia kampo, pro eraro, mi ja suferas la konsekvencojn, eĉ ĝis hodiaŭ. Mi ne scias kiel mi erare konkludis ke ne bezonas belan manskribon. Kaj mi kredis tiel eĉ ĝis mi iris fremdlanden. Poste, kaj precipe en Sud Afriko, kiam ĉe advokatoj, kaj ĉe junuloj kiuj naskiĝis en Sud Afriko, kaj estis edukitaj tie, mi vidis perle perfektajn literojn, mi hontis kaj pentis. Mi spertis ke aĉa manskribo devas esti konsiderata kiel pruvo de nekompletita eduko. Poste mi provis plibonigi la manskribon, sed kiel

ligi kolon al jam bakita poto? Tion kion mi neglektis, mi ĝis hodiaŭ ne povis fari. Ĉiu junulo kaj gejunulo lernu de mia ekzemplo, kaj komprenu ke belan manskribon estas necesa parto de la eduko. Por lerni bonan manskribon, necesas lerni la desegnon. Mi eĉ opinias ke geknaboj devas lerni desegnadon antaŭe. Same kiel infano vidas birdojn, aĵojn, ktp, kaj memoras ilin, kaj facile rekonas ilin, same, oni ankaŭ lernu rekoni alfabetojn, kaj kiam oni jam lernas la desegnadon, kaj desegnas bildojn ktp, nur tiam oni lernu kiel skribi literojn. Jen literoj presite belaj.

Priskribindas du alia okazaĵoj de tiu tempo de studado. Instruisto proponis ke mi regajnu la studjaron kiun mi perdis pro la edziĝo. Tiutempe laborema lernanto estis permesita fari tion. Pro tio mi restis ses monatoj en la tria klaso, kaj post la ekzamenoj antaŭ la somera ferio mi aniĝis la kvara klaso. Ekde tiu klaso, iom da instruado estis farita en la angla. Mi komprenadis nenion. Ankaŭ la geometrio komencis de la kvara klaso. Mi jam estis malforta en tio, kaj do tute ne komprenis ĝin. La instruisto pri geometrio instruis nin sufiĉe bone, sed mi simple ne povis kompreni ion ajn. Ofte mi senesperigis. Fojfoje mi pensis ke mi lasu la ideon fari du klasojn en unu jaro, kaj revenu al la tria klaso. Sed mi perdus la vizaĝon se mi farus tion, kaj ankaŭ tiu instruisto perdus la vizaĝon kiu fidis pri mia laboremo kaj proponis ke mi estu metita en supera klaso. Timante pri tio, mi forlasis la ideon reveni suben. Klopodante kiam mi atingis la dek trian propozicion de Eŭklido, mi subite mi konstatis ke la geometrio efektive estas la plej simpla afero. Tie kie oni devas uzi la rezonon rekte kaj simple, kio malfacilas tie? Post tio la geometrio ĉiam restis simpla kaj interesoplena afero por mi.

Kontraste al la geometrio, la sanskrita ĝenis min plie. Nenio en la geometrio devis esti parkerigita, sed laŭ mi ĉio en la sanskrita devis esti parkerigita. Ankaŭ la sanskritan ni komencis en la kvara klaso. Mi estis venkita en la sesa klaso. La sanskrita instruisto estis ege severa homo. Li volis instrui multon al la lernantoj. Troviĝis ia konkurenco inter la sanskrita klaso kaj la persa klaso. La mulao kiu instruis la persan estis afabla homo. La lernantoj sentis ke la persa ege facilas, kaj la persa instruisto estas bonanima homo. Li kontentiĝis pri tiom kiom la lernantoj laboris. Ankaŭ min tentis la babilo pri facileco, kaj iutage mi iris en la persan klason. La sanskrita instruisto doloriĝis. Li



vokis min kaj diris, "komprenu ja kies filon vi estas. Ĉu vi ne lernos do la lingvon de via religio? Diru al mi viajn malfacilaĵojn. Mi ja volis instrui al ĉiuj lernantoj bonan sanskritan. Poste vi gustumos ĝugutojn en tiu lingvo. Vi ne devas malvenki tiel. Venu denove al mia klaso." Mi hontis. Mi ne povis nei la amon de la instruisto. Hodiaŭ mia animo ŝuldas multon al s-ro Kriŝnaŝankar Pandja. Ĉar se mi ne lernis eĉ tiom da sanskrita kiom mi lernis, mi ne ĝuus tiom da spirita literaturo en la sanskrita kiom mi ja hodiaŭ ĝuas. Mi fakte bedaŭras ke mi ne lernis pli da sanskrita. Ĉar poste mi komprenis ke neniu knabo hindua devas resti sen bona lernado de la sanskrita.

Nun mi kredas ke en la altlerneja studprogramo barata, krom la gepatra lingvo, la nacia lingvo -- la hindia, la sanskrita, la persa, la araba, kaj la angla devas havi lokon. Neniu timu pri tiu ĉi nombro da lingvoj. Se la lingvoj estas instruitaj laŭmetode, kaj se ni ne estas ŝarĝita per la tasko lerni kaj pripensi ĉion en la angla, tiam tiu supera lingvo-listo ne nur ne estus pezaĵo, sed efektive estus ĝuinda afero. Kaj homo kiu lernas unu lingvon science, trovos la lernadon de la dua facila. Efektive la hindia, guĝarata, kaj sanskrita povas esti konsiderata unu lingvo. Same konsideru la persan kaj araban la sama. Kvankam la persa similas al la sanskrita, kaj la araba parenkas al la hebrea, tamen ambaŭ evoluis post la kresko de Islamo, tial ambaŭ estas intime parencaj. Mi ne taksis la urduan kiel apartan lingvon, ĉar ĝia gramatiko samas al la hindia. Kaj ĝiaj vortoj ja estas persaj kaj arabaj. Altnivela scio de la urdua necesigas la scion de la araban kaj la persan, kaj por la altnivela scio de la guĝarata, hindia, bengala, maratha, nepras la scio de la sanskrita.

## 6. *Tragedio - I*

Mi jam menciis ke en la altlernejo mi havis nur kelke da fidindaj amikoj. Oni povas diri ke mi havis du tiajn amikojn je malsamaj tempoj. Unu el tiuj ne rilatis longe al mi, kvankam mi ne forlasis tiun amikon. Mi amikiĝis al la dua, tial la unua lasis min. Tiu dua amikiĝo estas unu el la tragedioj de mia vivo. Tiu amikeco daŭris multaj jaroj. Mia celo en tiu amikiĝo estis tiu de la plibonigo. Tiu amiko unue amikigis la duan fraton. Li estis en la klaso de la frato. Mi rimarkis ke li havas multajn mankojn. Sed mi kredis lin fidinda. La patrino, la plej aĝa frato, kaj la edzino -- ĉiuj trovis tiun ĉi amikecon amara. Kial mi, aroganta edzo, aŭskultus la edzinan averton? Mi tute ne povis malobei la ordonojn de la patrino. Mi ĉiam obeis la grandan fraton. Sed mi pacigis ilin per jenaj vortoj: "Tiujn mankojn en mia amiko, mi jam rimarkis. Vi tute ne konas liajn bonkvalitojn. Li ne tiros min al la malĝusta vojo, ĉar miaj rialtoj kun li temas pri lia plibonigo. Mi kredas ke se li pliboniĝus, li estos ege bona homo. Mi volas ke en tiu ĉi afero vi restu sentimaj." Mi ne kredas ke tiuj miaj vortoj ilin ĝojigis, sed ili prifidis min kaj lasis min sekvi mian vojon.

Poste mi povis vidi ke mia elekto ne estis ĝusta. Eĉ pro la plibonigo, homo ne devus eniri profundajn akvojn. Oni ne povas amikigi tiun kiun oni volas plibonigi. Amikeco konsistas el advajt-eco -- malduismo. Nur malofte troviĝas tia amikeco. Amikeco taŭgas inter samkvalituloj. Amikoj tute ne povas resti sen influi unu la alian. Tial ekzistas en amikeco ege malmultaj oportunoj por plibonigo. Mi opinias ke intima amikeco malbonas, ĉar homo facile adoptas kutimaĉojn. Necesas peno por akiri bonkvalitojn. Tiu kiu volas amikigi la animon, la dion, devas resti sole, aŭ amikigi la tutan mondon. Ĉu la supera opinio indas aŭ malindas, mia provo pri denseca amikeco restis senfrukta.

En la tempo en kiu mi ekkontaktis tiun amikon, furoris en Rajkot "la pliboniga vojo". Tiu ĉi amiko informis min ke multaj hinduaj instruistoj kaŝe manĝas viandon kaj trinkas alkoholaĵon. Li ankaŭ nomis aliajn famajn familiojn de Rajkot. Ankaŭ cititaj estis la nomoj de kelkaj lernantoj de la altlernejo. Mi miris kaj bedaŭris. Demandante la kialon, mi estis donita la jena argumento: "Ni ne manĝas la

viandon; tial ni estas malforta popolo. La Britoj regas nin ĝuste pro la fakto ke ili estas viandmanĝantoj. Vi jam scias kiom forta mi estas, kaj kiel mi povas kuri. Ankaŭ tio estas pro mia viandmanĝado. La viandmanĝanto ne vundiĝas, kaj tuj resaniĝas se tio eventuale okazas. Niaj instruistoj manĝas la viandon, tiom da famaj homoj manĝas ĝin -- ĉu do senpripense? Ankaŭ vi devas manĝi la viandon. Manĝu kaj vidu kiom vi fortiĝos."

Tiuj ĉi argumentoj ne estis donitaj je unu tago. Per diversaj ekzemplo-ornamoj, la argumentoj estis prezentitaj plurfoje. Mia dua frato jam detruigis. Li aplikis tiujn argumentojn. Kompare al la frato kaj al tiu ĉi amiko, mi ja estis maldika homo. Iliaj korpoj pli hardiĝis. Ili estas multe pli fortaj ol mi. Ili estas kuraĝoplenaj. La fizika povo de tiu ĉi amiko mirigis min. Li povis kuri laŭplaĉe. Lia rapideco bonegis. Li povis salti longege kaj altege. Li povis bone toleri batojn kaj vundojn. Fojfoje li demonstris antaŭ mi tiun ĉi sian povon. Homo ja miras, vidante tiun povon kiun si mem ne posedas. Ankaŭ mi miris. El la miro venis la deziro. Mia povo kuri kaj salti estis preskaŭ nenio. Kia bone, se ankaŭ mi estu forta same kiel tiu ĉi amiko!

Krom tio ĉi, mi estas ege timema. Ĉirkaŭis min timoj pri ŝtelistoj, fantomoj, kaj serpentoj. Ĝenegis min tiuj ĉi timoj. Mi ne kuraĝis iri sole ie ajn dumnokte. Mi tute ne iris ie ajn en la malhelo. Senlampe, mi preskaŭ ne kapablis dormi. Jen aperos fantomo, de tie ĉi ŝtelisto, kaj de ie tie serpento! Tial la lampo necesis. Kaj kiel paroli pri tiuj ĉi timoj al la apude dormanta -- kaj nun iom pli matura -- edzino? Mi jam konstatis ke ŝi estis pli kuraĝa ol mi, kaj mi hontis pro tio. Ŝi tute ne timis pro serpentoj ktp. Ŝi tutsole iris en la malhelo. Mia amiko sciis tiujn miajn malfortaĵojn. Li diradis al mi ke li povas kapti eĉ vivantajn serpentojn per sia mano. Li neniam timis pro ŝtelisto. Kaj simple ne prikredas fantomojn. Li konvinkis min ke ĉiuj tiuj ĉi estas la efiko de viandmanĝado.

Dum tiu tempo oni kantas en la lernejoj la jenaj versoj de la poeto Narmad:

Regas la angloj, subpremiĝas landanoj  
Subpremiĝas landanoj, jen la korpoj malsamaj  
Kvin ulnoj altas la unuaj, kaj ĉiu egalas kvin centoj.

Ĉio ĉi havis plenan efikon sur mia menso. Mi malglaciigis. Mi ekkredis ke viandmanĝado estas bona afero. Per tio mi iĝos forta kaj kuraĝa. Se la tuta lando manĝas viandon, la Britoj povas esti malvenkitaj.

La tago pro mia ekviandmanĝado estis decidita.

Ne ĉiu leganto povus kompreni la signifon de tiu ĉi decido -- tiu ĉi komenco. La gandhia familio apartenas al la vaiŝnava tradicio. La gepatroj estis konsiderataj tre striktaj Vaiŝnavanoj. Ili oftis al la vaiŝnava templo. Kelkajn templojn oni eĉ konsideris la familiaj. Krome fortas en Gujaratlando [guĝarat] la religio Jainismo [ĝejn]. Ĝia efiko videblas ĉie, en ĉiu sfero. Tial nenie en Barato aŭ en la tuta mondo oni trovas tian fortan kontraŭon al viandmanĝado kiel en Gujaratlando kaj en la Vaiŝnavanoj kaj la Ŝravakanoj -- t.e., la Jainanoj. Tiu ĉi estas mia kulturo.

Mi adoris la gepatrojn. Mi kredis ke se ili priscius pri mia viandmanĝado, senmorte ili tuj mortos. Nekonscie mi ja estis servanto de la vero. Mi ne povas diri ke mi ne tiam sciis ke viandmanĝi estus perfidi la gepatrojn.

En tiaj cirkonstancoj mia decido viandmanĝi estis por mi ege grava.

Sed mi ja devis fari plibonigon, ĉu ne? La viandmanĝado ne temis pri ŝataĵo. Mi ne komencis viandmanĝi kredante ke ĝi estas gustuma. Mia plano estis iĝi forta kaj kuraĝa, igi aliajn tiel, kaj tiam venki la Britojn kaj liberigi Baraton. Ĝis tiam mi ne priaŭdis la vorton "Swaraj" [svaraĝ]. En tiu entuziasmo por la plibonigo mi perdis la konscion.

## 7. *Tragedio - II*

La decidita tago alvenis. Estas malfacile plene priskribi mian kondiĉon. Unuflanke estis la entuziasmo pri plibonigo, la senpacienco fari gravajn ŝanĝojn en la vivo, kaj aliflanke la honto pro la ŝtelkaŝa agado. Mi ne memoras kiu gravis pli inter ili. Ni iris al la rivero serĉante solecon. Fore ni trovis angulon kie neniu povus nin vidi, kaj tie mi vidis la neniam-viditaĵon -- la viandon! Kunis iom da bakista pano. Neniu el tiuj du mi ŝatis. La viando ŝajnis leda. Neeblis manĝi. Vomemiĝis. Mi devis halti la manĝadon.

Ege malbone mi tranoktiĝis. Mi ne povis dormi. Songis, ke kapro vivas en mi, kaj ploradas. Mi ekvekiĝadis, pentadis, kaj pensadis, ke mi devas ja viandmanĝi, mi ne malkuraĝiĝu. Ankaŭ la amiko ne estis malvenkema. Li nun aranĝis diversajn manierojn kuiri, ornami kaj kaŝi la viandon. Anstataŭ iri al la riverbordo, li kunaranĝis kun kuiristo, ke ni kaŝiru al registara gastejo, kaj tie tentis min per la mebla komforto. Tio efikis. La malamo pri la pano malpliigis, mi ĉesis kompati tiun kapron, kaj kvankam mi ne povas paroli pri la gusto de la viando mem, tamen, mi ekgustumis la spicojn viandajn. Tiel pasis eble unu jaro, dum kiu mi manĝis la viandon ĉirkaŭ 5-6 foje, ĉar ne ĉiam alireblis la registara gastejo, kaj ne ĉiam pretiĝadis tiuj spicoj kiuj estis konsiderataj bonegaj por la viandpreparado. Krome, tia manĝado kostis monon. Mi ne posedis eĉ la proverban rompitan monkonkon, kaj do ne povis kontribui ion. Ankaŭ la aranĝoj por tiu kosto, tiu amiko devis fari. De kie, kaj kiel li faris tiujn aranĝojn, mi ĝis hodiaŭ ne scias. Li ja intencis alkiutimigi min al la viandmanĝado - - detruu min; tial li spezis monon siaflanke. Sed ankaŭ li ne posedis ian senfinan trezoron, tiaj festenoj do povis okazi nur tempaltempe.

Kiam ajn mi manĝadis tiel, tiam mi tute ne povis manĝi ĉehejme. Kiam la patrino vokis min por la manĝado, tiam mi devis falsparoli, ke "hodiaŭ mi ne malsatas; mi ne digestis la manĝadon". Ĉiufoje dum tia parolo, mi sentis min grave vundita. Falsaĵo, kaj plue, al la patrino! Kaj se la gepatroj ekscias ke la knaboj estas viandmanĝantoj, ili estos fulmofrapitaj. Tiuj pensoj rongis mian koron, kaj mi tial decidis: "necesas manĝi la viandon; per ĝia disvastigo, ni plibonigos Baraton; sed trompi la gepatrojn kaj mensogi estas eĉ pli malbonaj ol

viandmanĝadi. Tial oni ne viandmanĝu dum la vivtempoj de la gepatroj. Post ilia morto, kiam oni estos libera, oni tute malkaŝe manĝu la viandon, kaj ĝis tiam kiam ne alvenas tiu momento, oni devas forlasi la viandmanĝadon." Mi transdonis tiun ĉi decidon al mia amiko, kaj forlasis viandmanĝadon -- ja porĉiame. La gepatroj neniam sciis, ke du el iliaj filoj jam viandmanĝadis.

Mi forlasis la viandmaĝadon pro la bonpenso ne trompi la gepatrojn, sed mi ne forlasis tiun amikecon. Mi iris plibonigi la amikon, sed mem falis, kaj simple ne konstatis pri la falo.

Pro tiu amikeco, mi estus kaptita ankaŭ en prostituado. Foje tiu ĉi amiko prenis min al la putina kvartalo. Post taŭgaj konsiloj, li sendis min al la domo de virino. Mi ne devis doni monon al ŝi. La afero estis jam negociita. Mi nur bezonis babiladi korŝtele. Mi jes eniris la domon, sed tiu kiu la dio volas savi, povas resti pura eĉ se li mem deziras fali. En tiu domo, mi tute blindiĝis. Mi eĉ ne havis la konscion paroli. Hontege mi sidis min sur la lito apud tiu virino, sed neniu sono elbuŝiĝis. La virino koleris, akre diris ion al mi, kaj montris al mi la pordon.

Je tiu tempo mi sentis mian virecon vundita; kaj esperis, ke se la tero malfermiĝus kaj ofertus spacon, mi feliĉe malaperos tien. Sed mi ĉiam ŝuldas al la dio saviĝi tiel. Okazis en mia vivo kvar aliaj tiaj aferoj. Mi devas konfesi, ke en ĉiuj tiuj, mi estis savita sen miaj propraj provoj, nur pro la cirkonstancoj mem. Klarvide, oni ja devas juĝi min falinta en tiuj ĉi aferoj. Ĉar mi deziris la sensamon, mi spertis ĝin. Tamen, je la ĉimonda vidpunkto, tiu kiu eskapas la agon, malgraŭ sia deziro, estas konsiderata savita; kaj en tiuj ĉi okazaĵoj, ankaŭ mi estos taksata savita tiele kaj tiomgrade. Kaj plue, ekzistas kelkaj faroj de kiuj estus tre utile eskapi, por la persono mem, kaj por tiuj kiuj iel rilatas al tiu homo. Kaj post penspuriĝado, oni eterne dankas la dio pro la eskapo de tiuj faroj. Same kiel ni scias pro la sperto, ke homo falas malgraŭ sia provoj ne fali, spertoprave estas konata, ke deziranta fali, homo, tamen, estas savita pro diversaj cirkonstancoj. En tiaj aferoj, kie troviĝas homovolo, kie la dio volo, aŭ kiuj reguloj finfine decidas la falon aŭ savon de homo -- tiuj ĉi estas profundaj demandoj. Ili ne havas solvon ĝis hodiaŭ, kaj estas malfacile diri ĉu aŭ ne ili estos iam finfine deciditaj.

Sed ni pluiru. Mi neniam konstatis, ke la amikeco de tiu ĉi amiko estas malbona. Antaŭ ol ke mi konstatu tion, mi devis sperti kelkajn pluajn amaraĵojn. Mi konsciis pri tio nur kiam mi tutklare vidis liajn malbonaĵojn. Sed ĉar mi skirbas miajn spertojn laŭ eble plej kronike, tiuj ĉi spertoj venos poste.

Mi devas mencii ĉi tie ion tiutempan. Tiu ĉi amikeco estis unu el la kaŭzoj de la malpaco inter ni geedzoj. Kiel mi jam menciis supre, mi estis edzo samgrade ama kaj suspektema. Tiu ĉi amikeco pliigis mian suspektemon, ĉar mi tute ne dubis la verecon de tiu ĉi amiko. Kredante tiun ĉi amikon, mi malfaciligis la vivon de la edzino sennombrebla foje. Mi neniam pardonis min mem pro tiu perforto. Nur la hindua virino povas suferi tian doloron, kaj tial mi ĉiam vidas la virinon kiel enkarniĝo de la tolero. Se la servisto estis false suspektata, li lasas la servon, se la filo estas tiel suspektata, li lasas la patran hejmon, se la suspekto eniras amikojn, rompiĝas la amikeco, se la virino suspektas la edzon, ŝi koleras silente, sed se la edzo suspektas la edzinon, tio estas vera tragedio por tiu kompatindulino. Kie ŝi povas iri? La tiel nomata altkasta virino eĉ ne povas iri al la kortumo kaj rompi la edziĝon, tiel unuflanka estas la justico skribita por ŝi. Mi donis al ŝi tian justicon kies doloron mi neniam povas forgesi. La radikoj de tiu suspekto estis eltranĉitaj nur kiam mi ekkomprenis detale la senperfortecon -- ahimsa -- t.e., kiam mi komprenis la gravecon de la sinrego -- la Brahmaĉarja -- kaj komprenis, ke la edzino ne estas la sklavino de la edzo, sed lia kunveturantino, ĉiu partoprenas la ĝojmalĝojojn de la alia, kaj samekiel la edzo, ankaŭ la edzino havas la liberon fari bonmalbonon. Kiam mi memoras tiun epokon de la suspektemo, mi koleras pri mia stulteco kaj sensame blindita krueleco, kaj kompatas mian senkonscion pri mia amikeco.

## 8. *Ŝtelo kaj Kontricio*

Ankoraŭ restas nefinita la rakontado pri miaj kulpoj je kaj antaŭ la tempo de la viandmanĝado. Tiuj ĉi kulpoj datas je la tempo de mia edziĝo aŭ tuj poste.

Mi ŝatis fumi la bidi-ojn -- cigaredetojn -- kun iu mia parenco. Ni ne posedis monon. Neniu el ni kredis, ke iel utilis la fumado, aŭ ke ĝuindis la fumon. Sed ni sentis, ke troviĝas ĝuo en la fumlasado mem. Mia onklo fumadis. Vidante lin kaj la aliajn, ankaŭ ni deziris fumadi. Ni ja ne havis monon en la mano, do ni ekŝtelis la stumpetojn de la bidi-oj finfumitaj de la onklo.

Sed ne ĉiam akireblis tiuj ĉi stumpetoj, kaj krome, ne tiom da fumo ili ellasis. Tial ni komencis ŝteli unu-du paisa-ojn [pajsa] -- monerojn -- el la du-tri paisa-oj en la poŝo de la servisto, kaj aĉeti bidi-ojn. Sed kie kaŝi ilin: jen la demando. Ni sciis, ke ne permeseblis fumadi antaŭ la plenkreskuloj. Iel-tiel ni ŝtelis du-kvar paisa-ojn kaj daŭris. Intertempe mi aŭdis pri ia planto (mi jam forgesis la nomon), kies tigoj oni povas fumadi. Ni akiris tion kaj ekfumadis.

Sed ni ne feliĉis. Ĝenis nin nia sendependeco. Ni malfeliĉis pro la fakto, ke ni ne povis fari ion ajn sen la permeso de la plejaĝuloj. Ni senesperigis pro tio, kaj decidis sinmortigi sin!

Sed kiel ni sinmortigu sin? Kiu donus la venenon? Ni aŭdis, ke mortigas onin la semoj de la planto dhatura. Ni iris al la ĝangalo kaj akiris la semojn. Decidis pri la vespera horo. Vizitis la templon de la dio Kedarnath, omaĝe ofertis ghee-on [gi] -- klarigita butero -- al la dio, kaj elserĉis solecon. Sed ni ne kuraĝis manĝi la venenon. Kion fari, se ni ne mortus tuje? Kio utilis morti? Kial ne toleri la sendependecon? Iukaze, ni manĝis iom da semoj. Ni ne havis la kuraĝon manĝi plu. Ambaŭ timis pro la morto, kaj decidis, ke ni kvietiĝos per vizito al templo de la dio Ramo, kaj forgesos pri la ideo sinmortigi sin.

Mi komprenis, ke facilas pensi pri la sinmortigo, malfacilas fari tion. Tial, se oni minace deklaras pri la plano sinmortigi sin, tio ege malmulte min efikas, aŭ ĝuste havas nenian efikon sur mi.



La rezulto de tiu sinmortiga plano estis, ke ni ambaŭ forlasis la kutimon kaŝe fumadi stumpetojn, kaj ŝteli monon de la servisto. Poste mi neniam deziris fumadi bidi-ojn. Mi ĉiam kredis, ke tiu kutimo estas barbara, malpura, kaj malboniga. Kial en la mondo vastas la kutimo fumadi, mi neniam komprenis. En trajnvagonoj kie oni multe fumadas, mi trovas ĝin ege malfacile sidiĝi tie, kaj sentas sufokon.

Kompare al la kulpo ŝteli stumpetojn de la bidi-oj, kaj por fari tion, ŝteli monon de la servisto, mian alian kulpon mi taksas eĉ pli serioza. Dum la bidi-a afero, mi eble estis 12-13 jarulo aŭ eĉ malpli. Dum tiu alia ŝtelado mi aĝis ĉirkaŭ 15 jaroj. Temis pri la ora braceleto de mia viandmanĝanta frato. Li ŝuldis la malgrandan sumon de 25 rupioj. Ni fratoj ambaŭ pensadis pri la malŝarĝigo de tiu ŝuldo. La frato havis ĉe sia mano puran oran braceleton. Ne malfacilis eltranĉi tola-on -- dek gramojn -- el ĝi. La braceleto estis tranĉita. La ŝuldo repagita. Sed la afero iĝis netolerebla por mi. Mi decidis, ke mi neniam plu faros ŝtelon. Mi ankaŭ sentis, ke mi devas konfesi mian kulpon al la patro. Sed ne malŝlosiĝis la lango. Ke la patro mem min batos, tion mi tute ne pritimis. Mi ne memoras, ke li iam batis iun ajn el ni fratoj. Sed li ege doloriĝus, eble frapos sian kapon kontraŭmure. Mi pensis, ke estus bone konfesi mian kulpon, malgraŭ tia plua ŝarĝo, sen tio, ne puriĝus la koro.

Finfine mi decidis, ke per letero mi konfesos mian kulpon, kaj petos pardonon. Mi verkis leteron kaj donis mane al li. En la letero mi konfesis la tutan kulpon, kaj deziris punon. Mi petegis lin ne dolorigi sin pro tio, kaj ĵuris, ke mi ne faros tian kulpon en la estonteco.

Mantremante, mi metis la leteron en la manojn de la patro. Mi sidiĝis antaŭ lia lignotabula lito. En tiu tempo li suferis pro fistulo, kaj do kuŝadis surlite.

Li legis la leteron. Perlaj larmogutoj falis de lia okuloj. Trempiĝis la letero. Li fermis la okulojn momente, disŝiris la leteron, kaj sidiĝinte por legi la leteron, rekuŝis.

Ankaŭ mi ploris. Mi komprenis la doloron de la patro. Se mi estus pentristo, mi povintus desegni tiun bildon tutprecize. Eĉ hodiaŭ klaras tiu sceno antaŭ la okuloj.

Trasagis min tiu amarko perllarma. Mi iĝis pura. Nur la spertinto sciis tian amon.

"Tion scias nur la ramsage trafita."

Tiu ĉi estis por mi leciono pri ahimsa -- senperforteco. Tiam, fakte mi vidis nenion en la afero krom la amo de la patro, sed hodiaŭ mi povas rekoni ĝin kiel puran ahimsa-on. Kiu povas eskapi la tuŝon de tia ahimsa, se ĝi prenas tian vastan formon? Estus neeble sondi la forton de tia vasta ahimsa.

Tia trankvila pardono estis kontraŭ la patra naturo. Mi pensis, ke li koleros, parolos morde, eble frapos sian kapon. Sed la kaŭzo, laŭ mi, por lia senlima trankvilo estis la facila akcepto de la kulpinto mem. Tiu homo kiu memvole kaj sentrompe akceptas sian kulpon kontraŭ aŭtoritaton, kaj ĵuras neniam refari la kulpon -- tiu homo vere atingas kontricion.

Mi scias, ke pro mia akcepto la patro sentimiĝis pri mi, kaj lia amego eĉ pligrandiĝis.

## **9. La Morto de la Patro kaj Mia Duobla Honto**

Tiam mi aĝis 16 da jaroj. Ni jam vidis supre, ke pro fistulo, la patro estis tute litokaptita. Plejparte, li estis servita de la patrino, malnova servisto de la familio, kaj mi. Mia devo estis tiu de la flegisto. Lavi lian vundon, ŝmiri la medikamenton, bandaĝi ĝin je la ĝusta tempo, trinki medikamenton, kaj prepari la medikamenton ĉeĥeje kiam ni bezonis tion fari -- tiuj ĉi estis miaj specialaj taskoj. Masaĝi liajn krurojn ĉiunokte, dormi nur je lia permeso, aŭ kiam li mem dormis: jen miaj reguloj. Mi ege amis tiun ĉi servon. Mi ne memoras, ke mi iam maltrafis ĝin. Ĉiokaze, mi altlernejadis dum tiu ĉi periodo. Tial post la manĝado, mi spezis la tempon aŭ ĉe la lernejo aŭ en la patra servo. Se li permesis min, kaj lia sano relative bonis, mi iris promenadi.

Dum tiu ĉi jaro, la edzino gravediĝis. Hodiaŭ mi povas vidi, ke en ĝi estis duobla honto. Unua honto, ke kvankam ĝi estis la periodo de mia studado, mi tamen ne povis esti memregula, kaj la dua honto, ke kvankam mi konsideris la lernejan studadon mia religio, kaj eĉ pli ol tio, religion mi kredis la adorado de la gepatroj -- kaj tio tiugrade, ke ekde la infanaĝo mi prenis la historion de Ŝravan kiel mian idealon -- tamen, sukcesis regi min la voluptamo. Tio estas, ke mi ja masaĝis la krurojn de la patro ĉiunokte, sed dum tiu tempo la menso vagadis al la litĉambro, kaj jen dum periodo pri kiu estas konsilinde forlasi la kuniĝon de la virino laŭ la leĝoj de la sanktaj, medicinaj, kaj konduktaj skriboj. Kiam mi estis liberigita de la servado, mi feliĉadis, kaj tuŝante la piedojn patrajn, mi rekte atingis la litĉambron.

La malsano de la patro pliiĝis. La indiĝenaj medicinistoj -- Vaidja-oj kaj Hakim-oj -- provis respektive siajn ŝmiraĵojn kaj bandaĝojn, ni uzis ankaŭ la hejmajn medikamentojn de la ordinara, ĉiutaga barbisto, kaj aliaj; eĉ la brita kuracisto aplikis sian inteligenton. La brita kuracisto konsilis kirurgion kiel la nuran solvon de tiu ĉi malsano. Sed iu Vaidja, kiu estis familia amiko, intervenis kaj malkonsilis kirurgion vidante la aĝon de la patro. La diversaj medikamentaj boteloj aĉetitaj malutilis kaj la kirurgio ne okazis. Li ja estis fama Vaidja. Mi pensas, ke se li permesus la kirurigon, la vundo resaniĝintus senprobleme. Iu tiuepoke fama kirurgo el Mumbajo estus farinta la kirurgion. Sed la

vivofino jam proksimiĝis, kiel do trovi la ĝustan solvon? La patro revenis el Mumbajo sen la kirurgio. Li kunprenis la aĵojn aĉetitajn por la kirurgio. Li lasis la esperon vivi longe. Li malfortiĝis. Iĝis necese fari ĉion ajn surlite. Sed ĝisfine li kontraŭis tion, kaj insiste penis lasi la liton. Tiu ĉi estas la severa disciplino de la religio Vaiŝnava. La ekstera puriĝo ege necesas. Sed la okcidenta medicina sistemo instruas nin, ke la korpaj ekskremento, kaj la bano, ĉiuj el tiuj povas esti faritaj tute pure surlite. La malsanulo ne bezonas sin peni. Kiam ajn vi vidos, puras la lita kovrotuko. Tiele atingitan purecon mi senhezite nomus Vaiŝnavismo. Sed tiutempe, vidante la patran insiston lasi la liton por sin bani, ktp, mi primiris lin kaj propramense admiris lin.

Proksimiĝis la malhela nokto de la fino. Tiutempe, la onklo loĝis en Rajkot. Mi malklare memoras, efektive, ke li estis tie ĉi aŭdinte pri la malboniĝanta stato de la patro. Ambaŭ fratoj dividis nerompeblan amon. Tuttage la onklo sidiĝis apud la patralito, kaj permesante nin ĉiujn dormi, li mem dormis apud la lito de la patro. Neniu kompreneble divenis, ke tiu ĉi nokto estos efektive la lasta. Sed la timo kompreneble ĉiam ekzistis. Ĉirkaŭis la 10a aŭ 11a laŭhorloĝe. Mi estis masaĝantaj la krurojn. La onklo diris al mi: "Iru, nun mi sidiĝos." Mi feliĉis kaj rekte iris al la litĉambro. La kompatinda edzino kompreneble profunde dormis. Sed kiel mi permesis ŝin dormi? Mi vekis ŝin. Post 5-7 minutoj, la supre menciita servisto frapis la pordon. Mi ektimis. La koro eksaltis. La servisto diris, "Vekiĝu, la patro ege malsaniĝas." Mi jam sciis, ke li estis ege malsana, tial komprenis la specialan signifon de la "ege malsaniĝas" ĉi tie. Mi tuj elsaltis el la lito.

"Diru, ja, kio okazas?"

Venis la respondo, "Bapu -- Paĉjo -- forpasis!"

Pri kio efikis mia pentado? Mi ege hontis. Ege doloriĝis. Kuris al la ĉambro de la patro. Mi komprenis, ke se mi ne estus blindita de la voluptamo, mi ne suferus tian malkuniĝon dum la lastaj horoj, kaj mi estus masaĝanta la krurojn de la patro ĝis la fino. Nun mi devus aŭdi de la buŝo de la onklo, "Bapu forlasis nin!" La onklo, tiu adoranto de sia pli aĝa frato, akiris la honoron de la fina servo. La patro jam sciis pri sia fina horo. Li gestis, akirigis skribilaĵojn, kaj skribis: "Pretiĝu". Skribinte tion, li rompis la amuleton ligitan ĉirkaŭ sia brako kaj

forĵetis ĝin, li forĵetis ankaŭ sian kolĉenon, kaj post momento forflugis la animo.

Jen la honto al kiu mi aludis en la pasinta ĉapitro -- la voluptamemo eĉ dum la servado! Ĝis hodiaŭ mi ne povis forviŝi tiun ĉi makulon nigran; mi ne povis forgesi ĝin. Kaj mi ĉiam kredis, ke kvankam mi amegis la gepatrojn, mi povis lasi ĉion ajn por ili, tamen, eĉ dum la servado mia menso ne sukcesis lasi la voluptamon. Tiu ĉi estis ne nevenkebla manko en mia servado. Pro tio mi nomis min voluptame blindita, malgraŭ la unuedzina ĵuro. Nur post multe da tempo mi povis liberiĝi de ĝi, kaj antaŭ tiu liberiĝo, mi suferis multe da animomalfacilaĵoj.

Antaŭ ol mi fermu tiun ĉi rakonton de mia duobla honto, mi plu diru, ke la filo, kiun naskis la edzino, vivis du-kvar tagoj kaj lasis nin. Kiel eblus iu ajn alia rezulto? Tiuj gepatroj aŭ infanaj paroj kiuj havas konscion, prizorgu tiun ĉi vivekzemplan.

## **10. Religiaj Ekvidoj**

Ekde mia sesa aŭ sepa jaro ĝis la dek sesa jaro mi studadis, sed nenie en la lernejo mi ricevis religian instruadon. Oni eĉ diru, ke de la instruistoj mi ne ricevis tion kion mi devus facile ricevi de ili. Tamen, ekzistis la medio. Ĉi tie oni komprenu la religion amplekse. Religio, t.e., memkonscio, memscio. Mi naskiĝis en la tradicio viŝnua, kaj do plurokaze vizitis la templon. Sed mi ne povis adorami ĝin. Mi ne ŝatis la luksan, mondan povon de la templo. Aŭdante pri la nemoralajoj en la templo, mi depremiĝis. Mi ricevis nenion de ĝi.

Sed tio kion mi ne ricevis de la templo, mi jes akiris de mia vartistino, Rambha. Rambha estis malnova servistino en nia familio. Eĉ hodiaŭ mi memoras ŝian amon. Mi diris antaŭe, ke mi timis pri fantomoj kaj spiritoj. Rambha klarigis al mi, ke la solvo estas la ĉantado de la nomo de Ramo. Eĉ pli ol la Ramonomo mi fidis Rambha-on, tial dum la infanaĝo, por kontraŭi la timon de fantomoj kaj spiritoj, mi komencis ĉantadi la Ramonomon. Tiu ĉi ĉantado ne daŭris longe. Sed la semo semita dum la infanaĝo ne detruigis. Hodiaŭ la Ramonomo, por mi, estas nemalhavebla povo. Mi kredas, ke ĉe la fonto de tio estas la semo semita de Rambhabai.

Dum la sama periodo, la filo de mia onklo, kiu estis adoranto de la epopeo Ramajano, aranĝis ke ni du fratoj estu instruataj en la ĉanto de Ramosavo. Ni parkeris ĝin kaj faris regulon ĉanti ĝin post la bano. Ĝis tiam ni estis en Porbandar, la disciplino daŭris. Ĝi ne povis postvivi la medion en Rajkot. Ankaŭ pri tio ĉi tasko mi ne havis multe da fido. Parte pro la estimo al la pliaĝa frato, kaj parte pro la fiero pri klara prononcado de la Ramosavo, la ĉantado daŭris.

Sed tio kio havis egan efikon sur mia menso estis la studado de la Ramajano. Dum la malgranda parto de la patra malsano kiu okazis en Porbandar, li aŭskultadis la Ramajanon ĉiunokte en la templo de Ramo. La aŭskultiganto estis pastro kiu nomiĝis Lagha Maharaĝ [LAGA maharAĝ] de Bileŝvar. Li estis profunda adoranto de sinjoro Ramo. Oni diris pri li, ke kiam li havis la lepron, anstataŭ ĝia kuracado, li prenis la lianofoliojn de la statuo de Ŝivao de Bileŝvar, kaj ligante ilin ĉirkaŭ la korpoparto kiu estis afliktita de la lepro, li ekĉantadis la Ramonomon. Finfine, la lepro estis ĝisradike detruita.

Ĉu aŭ ne tio veris, ni aŭskultintoj ja kredis ĝin vera. Ankaŭ tio veras, ke kiam Lagha Maharaĝ komencis sian rakonton, lia korpo estis tute sana. Lagha Maharaĝ havis dolĉan voĉon. Li kantadis la distikojn kaj kvaropajn versojn kaj eksplikadis ilin. Li mem entranciĝadis pro ĝia beleco, kaj entranciĝadis la aŭskultantojn. Mi eble aĝis dek tri jaroj tiam, kaj memoras, ke mi ĝuis la legaĵon intense. Tiu ĉi Ramajan-aŭskultado estis la bazo de mia ega amo por la Ramajano. Hodiaŭ mi taksas la Ramajanon la plej grava teksto de la adorvojo Bhakti.

Post kelkaj monatoj ni alvenis al Raĝkot. Tie ne okazis la Ramajan-legaĵoj. Oni ja legadis la Bhagvat Gitaon je la Ekadashi, la 11a tago de la luna monato. Mi fojfoje sidiĝis aŭskulti tion. Sed s-ro Bhatt ne sukcesis inspiri tian intensan ĝuon. Hodiaŭ mi povas vidi, ke la Gitao estas tia teksto kia ja povas inspiri religian adoradon. Mi legis ĝin en la guĝarata, ege ĝuoplene. Sed kiam mi aŭdis kelke da la originalaj sanskritaj versoj redonitaj de Bharat Bhushan Madan Mohan Malvia [angle: Malviya] (kiu ĉantis ilin post sia 21-taga fasto), mi konstatis, ke se mi, same kiel li, aŭdintus la Gitaon el la buŝo de iu Gita-adoranto dum mia infanaĝo, mi estus amanto de ĝi, jam de tiu aĝo. Mi oftege spertas la fakton, ke la alĉutimiĝoj bonmalbonaj akiritaj dum la infanaĝo faras profundajn radikojn. Tial ĝenas min, ke dum tiu aĝo mi ne profitis per la aŭskultado de tiom da elstaraj tekstoj religiaj.

En Raĝkot, tute neplanite, oni intruis min trakti ĉiujn tradiciojn same. Mi lernis respekti ĉiun tradicion de Hinduismo ĉar la gepatroj iris la temploj de la viŝnua kaj la ŝivaa tradicioj kaj ankaŭ al la Ram-templo. Ili kunprenis nin fratojn, aŭ sendis nin.

Krome, oftas al la patro iuj el la instruistoj ĝainismaj. La patro eĉ donis almozojn al ili. Ili kunparolis kun la patro pri aferoj religiaj kaj praktikaj. La patro ankaŭ havis amikojn islamajn, kaj parsiajn. Ili ĉiuj parolis pri siaj propraj religioj, kaj la patro aŭskultis ilin respektoplene, ofte eĉ ĝuoplene. Estante la flegisto, mi ofte ĉeestis tiajn konversaciojn. La tuta efiko de tiu ĉi medio estas, ke mi sentis saman senton pri ĉiuj religioj.

La Kristanismo estis escepto. Mi iel malŝatis ĝin. En tiu tempo, Kristanoj staradis ĉe la altlerneja angulo kaj prelegadis. Ili mallaŭdis la hinduajn diojn, kaj la sekvantojn de Hinduismo. Mi trovis tion ĉi netolerebla. Nur unu-du foje mi aŭskultis la prelegon. Mi neniam

deziris stari tie refoje. En tiu tempo oni aŭdis pri fama Hinduo kiu iĝis Kristano. La onidiro en la vilaĝo estis, ke dum li estis instruita en Kristanismo, oni manĝigis lin bov-viandon, kaj drinkigis lin alkoholaĵon. Oni ŝanĝigis ankaŭ lian vestaĵon, kaj iĝante Kristanon, tiu homo komencis vesti sin per jako kaj pantolono, kaj la brita ĉapelo. Min ege dolorigis tiaj diraĵoj. Kiel nomi tiun religio, pro kiu oni devas manĝi bov-viandon, drinki alkoholaĵon, kaj ŝanĝi vestojn? Tiel argumentadis mia menso. Ni ankaŭ aŭdis, ke tiu amiko kiu iĝis Kristano, komencis mallaŭdi la tradician religion de siaj gepatroj, la tradiciajn rit-kutimojn, kaj la landon mem. Pro ĉio ĉi, mi ekmalŝatis Kristanismon.

Tiel, kvankam mi sentis samamon al aliaj religioj, tamen oni ne povis diri, ke mi profunde fidis je la dio. Dum tiu tempo en la patra libraro, mi renkontis tradukon de la Manusmriti -- La leĝoj de Manu. En ĝi mi legis pri la kreo de la mondo, ktp. Tio ne vekis respekton, sed male, vekis iom da ateismo. Mi fidis je la inteligento de la filo de mia dua onklo, kiu ankoraŭ vivas. Mi metis miajn dubojn antaŭ li, sed li ne povis respondi al ili. Li replikis: "Ĉe matureco, vi mem povos respondi al tiaj demandoj. Knaboj ne rajtas demandi tiajn demandojn." Mi silentiĝis. La menso ne gajnis trankvilon. Mi trovis refuton de la nunaj kutimoj en la detalaj priskriboj de la Manusmriti, kaj ankaŭ en aliaj diskutoj. Ankaŭ pri tiu ĉi dubo mi ricevis pli malpli la saman respondon. Mi konsolis mian menson, dirante, "iu tago, mi ekkonsciiĝos, mi legos plie kaj komprenos la aferojn." Tiutempe, legante la Manusmriti, mi tute ne povis lerni pri Ahimsa, aŭ senperforteco. Mi jam priskribis mian viandmanĝadon. Ĝi trovis apogon en Manusmriti. Mi ankaŭ kredis, ke oni devas mortigi serpentojn, cimojn, k.c. Mi memoras, ke tiutempe mi detruis multe da cimoj, pensante ke temas pri la Darmono.

Sed unu afero ekradikiĝis en la menso -- tiu ĉi mondo estas bazita sur la moralo. Kaj la esenco de moralo estas en la vero. Oni nepre elserĉu la veron. Tagon post tago kreskis ĉe mi la grandecon de la vero. Pli kaj pli klariĝis la difino de la vero, kaj eĉ hodiaŭ daŭras tiu klariĝado.

Plue, iu morala verso trovis firman lokon en mia koro. La respondo al malbono estas ne malbono, sed nur bono, tiu ĉi iĝis mia vivprincipo. Ĝi komencis regi min. Mi iĝis amanto de la ideo, ke oni deziru kaj



faru bonon al malbon-faranto. Mi plurfoje eksperimentis kun tiu ideo.  
Jen la mirinda verso:

Al tiu kiu trinkigas akvon, donu bonan manĝaĵon;  
Antaŭ tiu kiu klinas sian kapon, adorsterniĝu.  
Por tiu kiu spezas poison, faru orvalore;  
Por tiu kiu savas vin, pretiĝu forlasi la vivon.  
Al tiu kiu faras bonon, repagu dekoble: tutkore, parole, plene;  
Sed plej signifas tiu kiu per bonfaro respondas al malbono.

## **11. Preparo Iri Fremdlanden**

En 1887, mi sukcesis en la abiturientan ekzamenon. La malriĉeco de la lando kaj la familio Gandhi estis tiel, ke se troviĝas du ekzamencentroj kiel Mumbajo kaj Ahmedabad, la anoj de la urbeto Kathiawad preferis la pli proksiman kaj malkaran Ahmedabad. Tion mi ja faris. Unuafoje do mi vojaĝis sole de Raĝkot al Ahmedabad.

La plejaĝuloj deziris, ke post la sukceso en la ekzameno mi devus plustudadi en kolegio. Troviĝis kolegio kaj en Mumbajo kaj en Bhavnagar. Bhavnagar estis pli malkara, do la decido estis aliĝi la kolegio Ŝamaldas en Bhavnagar. Mi komprenis nenion en la kolegio. Ĉio ŝajnis malfacile. Mi nek ĝuis la lekcionojn de la instruistojn, nek ilin komprenis. En tiu afero, la kulpo ne estis tiu de la instruistoj; kulpis mia malfortiĝo. Tiutempe, fakte, la instruistoj de la kolegio Ŝamaldas estis taksataj unuarangaj. Mi finis la unuan sesion kaj venis al la hejmo.

Mavĝi Dave estis malnova amiko kaj konsilanto de la familio, klera, kaj mondsperta bramano. Li daŭrigis rilatojn kun ni eĉ post la forpaso de la patro. Li vizitis nin dum tiu ĉi ferio. Parolante kun la patrino kaj la plej aĝa frato, li demandis pri mia studado. Kiam li aŭdis, ke mi estas en la kolegio Ŝamaldas, li diris: "La tempoj jam ŝanĝiĝis. Se iu el vi fratoj volas heredi la postenon de via patro, Kaba Gandhi, vi ne sukcesos fari tion sen edukado. Tiu ĉi knabo ankoraŭ studadas; tial oni devas portigi de li la ŝarĝon de la familia posteno. Li prenos 4-5 jarojn iĝi licenciulo, sed eĉ post tio li gajnos 50-60 rupian laboron, ne la ĉefministrecon. Kaj se vi faros lin advokato post tio, same kiel mi faris al mia plej aĝa filo, tio prenos kelkajn jarojn plu. Kaj tiam troviĝos multe pli da advokatoj jam pretaj por la ĉefministreco. Vi devas sendi lin eksterlanden, al Anglujo. Kevalram (la filo de Mavĝi Dave) diras, ke la studado tie estas facila. Li revenos post tri jaroj da studado. Kaj la kosto ne estos pli ol 4-5 mil rupioj. Rigardu la advokatojn ĵusalvenintajn, kiel lukse ili vivas! Se ili volas, ili povas akiri la ĉefministrecon eĉ hodiaŭ. Mi ja konsilas, ke jam ĉijare vi sendu Mohandas al Anglujo. Troviĝas en Anglujo multe da amikoj de mia Kevalram; se nome de ili, li donos enkonduk-leteron, tiam estos nenia malfacilaĵo por Mohandas tie."

Ĝoŝiĝi (ni ja vokis Mavĝi Dave-on per tiu nomo) rigardis min kaj demandis kvazaŭ li havas nenian dubon pri la akcepto de sia konsilo:

"Do. Ĉu vi ŝatus iri fremdlanden, aŭ ĉu vi volas studadi ĉi tie?" Li diris tion kion mi ŝatus aŭdi. Mi jam timis pri la malfacilaĵoj de la kolegio. Mi diris, "estus bonege sendi min al Anglujo. Mi ne kredas, ke mi sukcesos multe en la kolegio. Sed ĉu oni ne povas sendi min por studi medicinon?"

La frato intervenis: "Tio ne plaĉis al la patro. Diskutante vin, li diradis, ke ĉar ni estas vaiŝnaj, ni ne faru laboron kiu ŝir-rompe traktas karnostojn. La patro volas igi vin advokato."

Ĝoŝiĝi konsentis:

"Same kiel Gandhiĝi, ankaŭ mi ne ŝatas la profesion de kuracistoj. Nia sanktaj skriboj ne mallaŭdas tiun ĉi profesion. Sed se vi iĝos kuracisto, vi ne povas iĝi ĉefministro. Mi ja deziras por vi la ĉefministrecon aŭ ion eĉ pli alta. Nur tiel povas vi prizorgi vian grandan familion. La tempo ja ŝanĝiĝas tag-al-tage, kaj iĝas pli malfacila. Tial estus intelegeta iĝi advokato."

Turnante sin al la patrino, li diris: "Mi nun iras. Bonvolu pripensi mian sugeston. Kiam mi revenos, mi esperos aŭdi pri la irpreparoj. Diru al mi pri iaj malfacilaĵoj."

Ĝoŝiĝi foriris, kaj mi ekkonstruis aerkastelojn.

La plej aĝa frato ekpensadis. De kie akiri la monon? Kaj ĉu taŭgas sendi junulon kiel mi, tiom for!

La patrino malkontentiĝis. Al ŝi tute ne plaĉis la ideo malkuniĝi de mi. Sed ŝia unua reago estis la jena: "En nia familio la plej aĝa nun restas via onklo. Tial oni devas lian konsilon unue akiri. Se li donos permeson, tiam ni devas pensi plu."

Alian penson frapis la frato: "La ŝtato de Porbandar estas la nia. Ĝia administranto estas S-ro Leli [angle: Lely]. Li taksas nian familion alta. Precipe la onklon li ŝatas. Eblas, ke flanke de la ŝtato, li helpos vin iome."

Ĉio tio plaĉis al mi. Mi preparis iri al Porbandar. Ne troviĝis trajnoj tiam. La vojo estis bovĉara. Oni atingis post 5 tagoj. Mi jam menciis, ke mi estis timulo. Sed ĉifoje forkuris mia timo. La deziro iri al

Anglujo influis min. Mi luis bovĉaron ĝis la urbeto Dhoraĝi. Post Dhoraĝi, pensante atingi unu tagon pli frue, mi luis kamelon. Ankaŭ estis por mi unuafoje vojaĝi per kamelo.

Mi atingis Porbandar-on. Mi korpsterne salutis la onklon. Mi rakontis al li la tuton. Pensante, li respondis:

"Mi ne certas ĉu aŭ ne oni povas konservi la darmon en Anglujo. De ĉio kion mi aŭdas, mi dubas pri tio. Kiam mi renkontas la grandajn advokatojn, mi trovas nenian diferencon inter ilia vivstiloj kaj tiuj de la blankaj sinjoroj. Ili havas nenian tabuojn pri manĝado. La cigaredo neniam lasas iliajn buŝojn. Nudas la vestaĵoj. Ĉio ĉi ne taŭgos al nia familio. Sed mi ne volas esti baro en via kuraĝaj paŝoj. Mi mem vojaĝos pilgrime post kelkaj tagoj. Mi ja vivos nur kelke da jaroj. Sidante ĉe la marbordo de la morto, kiel mi donu permeson al vi iri al Anglujo -- transiri la maro? Sed mi ne estu baro. La vera permeso estus tiu de via patrino. Se ŝi permesos vin, iru tutfeliĉe. Nur diru, ke mi ne haltos vin. Miaj benoj jam estas ĉe vi."

Mi diris: "Mi ja ne povas esperi pli ol tio ĉi de vi. Nun mi devas konsentigi la patrinon. Sed vi ja skribos enkonduk-leteron por S-ro Leli, ĉu ne?"

La onklo diris: "Kiel mi povas doni tion al vi? Sed la sinjoro estas bona homo, vi skribu do. Enkonduku la familion. Li certe donos tempon por renkonti vin, kaj se vi plaĉos al li, certe vin helpos."

Mi ne scias kial la onklo ne verkis tiun enkonduk-leteron por tiu sinjoro. Mi nebule memoras, ke li hezitis helpi tiel rekte en kontraŭ-darma afero kiel la transmarado.

Mi verkis leteron al S-ro Leli. Li vokis min al sia grandega hejmo. Li renkontis min kiel mi grimpis la ŝtuparon, kaj dirante la jenon foriris supren: "Iĝu licenciulo, renkontu min poste. Nenia helpo eblas nun." Mi preparis sin multe, iris parkerante multajn frazojn. Kliniĝante mi salutis vin ambaŭmane. Sed ĉio mia peno estis tute vana!

Mia rigardo iris al la ornamaĵoj de la edzino. La plej aĝan fraton mi ege altestimis. Lia afableco estis senlima. Lia amo estis same de la patra.

Mi lasis Porbandar-on. Veninte al Raĝkot mi rakontis la tuton. Mi prenis la konsilon de Ĝoŝiĝi. Li sugestis, ke oni eĉ prunteprenu monon

por sendi min. Mi proponis la vendadon de la ornamaĵoj de la edzino. Oni ne gajnus pli ol 2-3 mil da rupioj per tio. La frato surprenis la pezon aranĝi la monon kiel ajn.

Kiel konsentus la patrino? Ŝi lanĉis enketon ĉiomanieran. Iu diris, ke venante al Anglujo, junuloj malboniĝas; iu diris, ke ili iĝas viandmanĝantoj; iu diras, ke tie oni nepre devas havi alkoholaĵon. La patrino diris ĉion ĉi al mi. Mi diris, "Sed ĉu vi kredos min? Mi ne trompos vin. Mi vote diras al vi, ke mi ne tuŝos tiujn tri aĵojn. Se vere ekzistus tia danĝero, kial permesus Ĝoŝiĝi min iri?"

La patrino diris, "Mi fidas je vi. Sed kio okazos en alia lando? Mi tute ne povas pensi pri tio. Mi demandos al Beĉarĝi Svami."

Beĉarĝi Svami estis ĝaina saduo de la kasto Modh Bania. Same kiel Ĝoŝiĝi, ankaŭ li estis nia konsilanto. Li helpis nin. Li diris: "Mi prenos voton de tiu ĉi knabo pri tiuj ĉi aferoj. Poste ne danĝeros lasi lin foriri." Li igis min voti, kaj mi votis eviti viandmanĝon, alkoholaĵon, kaj virinojn. La patrino donis sian permeson.

Oni aranĝis kunsidon en la altlernejo. Junulo el Raĝkot iros al Anglujo -- jen mirindaĵo. Mi kunportis ion skribitan. Mi laŭtleĝis ĝin per malfacilo. Mi nur memoras, ke la kapo turniĝis, kaj la korpo tremis.

Akirinte la benojn de la plejaĝuloj, mi ekiris al Mumbajo. Estis mia unuafoja vojaĝo al Mumbajo. La plejaĝa frato akompanis min.

Sed cento da baroj troviĝas en bona faro. Mi ne sukcesis lasi la mumbajan havenon baldaŭ.

## **12. Ekster la Kasto**

Prenante la permeson kaj la benojn de la patrino, kaj lasante kelkmonatan infanon en brakoj de la edzino, mi entuziasme atingis Mumbajon. Mi ja atingis ĝin, sed tie amikoj informis la fraton, ke en Junio kaj Julio okazas ŝtormegoj en la Hinda Oceano, kaj ĉar tiu ĉi estas mia unua marvojaĝo, mi devos ekvojaĝi post la festo Divali, t.e., en la Novembro. Iu eĉ raportis pri la drono de boato en ŝtormo. Timis pro tio la frato. Li rifuzis lasi min vojaĝi pro la risko, kaj lasante min ĉe la hejmo de sia amiko, li mem revenis al Raĝkot por ĉeesti sian laborejon. Li lasis monon ĉe bofrato kaj petis amikojn prizorgi min.

Iĝis malfacile spezi la tagon en Mumbajo. Mi nur revis pri Anglujo.

Dume okazis agito en la kasto. Oni kunsidigis la kastanojn. Neniu el la kasto Modh Bania ĝis nun iris al Anglujo. Kaj mi iras, do, oni devas postuli klarigon de mi. Mi estis ordonita ĉeesti la panĉajat, la loka kortumo. Mi iris. Mi ne scias de kie mi subite akiris la kuraĝon. Pri la ĉeesto mi sentis nek heziton, nek timon. Plue, la estro de la kasto ankaŭ estis fora parenco. La patro rilatis bone al li. Li diris al mi:

La kasto kredas, ke tiu ĉi via plano iri al Anglujo ne estas bona. Nia religio malpermesas nin transiri la maron, plue oni aŭdas, ke oni ne povas sekurigi tie la darmon. Oni devas tie manĝtrinki kun la blankaj sinjoroj."

Mi respondis, "Mi kredas, ke ne troviĝas eĉ iomete da maldarmo en la iro al Anglujo. Mi finfine nur volas studadi tie. Krome, ĉar mi jam votis je la patrino resti for de tiuj aferoj pri kiuj vi timas, mi sukcesos eviti tiujn."

La estro diris: "Sed ni diras al vi, ke oni ne povas sekurigi la darmon tie. Vi ja scias kia estis mia rilato al via patro. Vi devas fari tion kion mi diras."

Mi respondis: "Mi scias pri tiu rilato. Vi estas same kiel la patro. Sed en tiu ĉi afero mi ne povas vin helpi. Mi ne povas ŝanĝi mian decidon iri al Anglujo. Tiuj kleraj bramanoj kiuj estis la amikoj kaj konsilantoj de la patro kredas, ke mi ne kulpos pri io ajn se mi iros al Anglujo. Mi jam akiris la permeson de la patrino kaj la frato."

"Sed ĉu vi ne obeos la ordonon de la kasto?"

"Mi estas senpova. Mi kredas, ke la kasto ne rajtas trudi sin en tiu ĉi afero."

La estro koleris je tiu ĉi respondo. Li sakris. Mi restis senmova. La estro ordonis:

"Tiu ĉi knabo estas ekde hodiaŭ ekster la kasto. Tiu kiu helpos lin, aŭ adiaŭos lin, devos aperi antaŭ la kortumo kaj devos pagi monpunon de unu rupio kaj 25 pajsoj."

Tiu ĉi decido havis nenian efikon sur mi. Mi adiaŭis la estron. Mi devis nun pensi pri la efiko de tiu ĉi decido sur la frato. Se li timos? Bonŝance li restis firma kaj skribis al mi, ke malgraŭ la decido de la kasto, li ne malpermesos min iri al Anglujo.

Post tiu ĉi evento, mi iĝis pli senpacienca. Se oni premos la fraton ŝanĝi sian decidon? Kio okazos se aperos iu aliaj malfacilaĵo? Mi spezis la tagojn en tia zorgado, kiam alvenis la novaĵo, ke sur la ŝipo ekirante je la 4a de Septembro estos advokato el Ĝunagadh kiu iros al Anglujo por iĝi angluja advokato, t.e., Barrister. Mi renkontis la amikojn de mia frato. Ankaŭ ili konsilis, ke mi ne lasu la oportunon. Mankegis la tempo. Mi telegramis la frato kaj demandis permeson iri. Li donis tion. Mi demandis monon de la bofrato. Li aludis al la decido de la kasto. Li ne volis iĝi eksterkastano. Mi iris al amiko de nia familio kaj petis lin doni al mi la bezonata sumo, kaj poste preni la monon de la frato. Tiu ĉi amiko konsentis fari tion, ne nur tio, li eĉ kuraĝigis min. Mi dankis lin, prenis la monon, kaj aĉetis la bileton.

Mi devis pretigi la tutaĵon por Anglujo. Iu alia amiko sperta helpis min pretiĝi. Ĉio ŝajnis strange al mi. Mi iom ŝatis ĉio, iom tute ne. Al mi tute ne plaĉis la kravato, kiun mi tiel ŝate ĉirkaŭligadis poste. La veŝto al mi aspektis nudiga vestaĵo. Sed kompare al la deziro iri al Anglujo, tiuj ĉi malŝataĵoj estis nenioj. Dume mi ankaŭ akiris manĝaĵon.

La amikoj ankaŭ akiris por mi lokon en la sama kajuto en kiu estos Trajambakraj Maĝmudar, la advokato el Ĝunagadh. Oni ankaŭ informis lin pri mi. Li mem estis plensperta sinjoro. Mi estis tute sensperta junulo je 18 jaroj. Maĝmudar diris al la amikoj, "Ne zorgu pri li."

Tiel, je la 4a de Septembro en 1888, mi lasis la havenon mumbajan.



### **13. *Finfine Atingis Anglujon***

Surŝipe mi tute ne suferis pro la maro. Sed ju pli pasis la tagoj, des pli mi iĝis malfeliĉa. Mi sentis sinĝenon paroli eĉ al la stevardo. Mi tute ne al kutimiĝis pri angla parolado.

Tiel, je la 4a de Septembro en 1888, mi lasis la havenon mumbajan. Krom Maĝmudar, ĉiuj el la vojaĝantoj estis Angloj. Mi ne povis paroli kun ili. Se ili provis paroli kun mi, mi ne komprenis ilin; aŭ se mi komprenis ilin, mi ne povis elpensi respondon. Mi devis plenkonstrui ĉiun frazon antaŭ ol ke mi parolu ĝin. Mi ne povis manĝi per kulero-forkoj, kaj mi ne kuraĝis demandi kiu manĝaĵo ne enhavas viandon. Tial mi efektive neniam iris al la manĝotablo. Mi manĝadis en mia kajuto. Mi supervivis per la dolĉaĵoj ktp kiun mi kunportis. Maĝmudar mem havas nenian heziton. Li amikiĝis al ĉiuj. Eĉ sur la ferdeko, li iris libere. Tuttage mi sidiĝis en la kajuto. Fojfoje, kiam troviĝas malmulte da homoj sur la ferdeko, mi sidiĝis tie mallonge. Maĝmudar konsilis ke mi renkontu ĉiujn, libere parolu kun ĉiuj; li ankaŭ diradis al mi, ke la lango de advokato devas glati libere. Li rakontadis siajn spertojn advokatajn, dirante ke la angla ne estas nia lingvo, tial neeviteblas eraroj en ĝi, tamen oni devas libere paroladi en ĝi. Sed mi ne povis apudmeti mian malkuraĝon.

Sentante kompaton je mi, bonkora Anglo ekkonversaciis kun mi. Li estis maljuna. Kion mi manĝas, kiu mi estas, kie mi iras, kial mi ne parolas kun iu ajn, ktp, li volis scii. Li konsilis al mi iri al la manĝotablo. Aŭdante pri mia insistado ne manĝi viandon, li ridis kaj komplete diris, "Tio bonas ĉi tie (antaŭ ol ke ni atingu la havenon Said), sed atingante la biskajan golfon, vi ŝanĝos vian penson. Tiom malvarmegas en Anglujo, ke nepras la viandmanĝado."

Mi diris, "Mi aŭdis, ke homoj ja vivas tie sen viandmanĝado."

Li diris, "Konsideru ĝin erara. Mi konas neniun el miaj konatuloj kiu ne manĝas viandon. Aŭskultu, mi drinkas alkoholaĵon, sed ne konsilas ke vi drinku. Tamen, mi pensas, ke vi ja devas manĝi viandon."

Mi diris, "Mi estas dankema al vi pro via konsilo, sed mi estas vote devigata de mia patrino ne manĝi viandon. Tial mi ne povas manĝi

viandon. Se mi ne povas travivi sen ĝi, mi revenos al Barato, sed mi tute ne manĝos viandon."

La biskaja golfo venis. Ankaŭ tie mi ne sentis la neceson aŭ de viando, aŭ alkoholaĵo. Oni diris al mi, ke mi kolektu atestilojn pri mia neviandmanĝado. Tial mi petis atestilon de tiu ĉi brita amiko. Li volonte donis ĝin. Por kelke da tempo mi konservis ĝin kiel monon. Poste mi informiĝis, ke tiajn atestilojn oni povas eĉ viandmanĝante akiri. Tial mi perdis la fascinon pri ili. Se vi ne kredas min, kio properus al mi montri al vi atestilon pri tia afero.

Iel-tiel ni finis la vojaĝon, kaj atingis la havenon Southampton [saŭdampten]. Mi memoras, ke ĝi estis Sabato. Sur la ŝipo, mi vestis min per nigraj vestaĵoj. Amikoj jam tajligis por mi blankflanelan jakon kaj pantolonon. Mi planis vesti min per tiuj dum mia elŝipiĝado, pensante ke pli bonos la blankaj vestaĵoj! Mi vestis min per tiu flanelan kostumo kaj elŝipiĝis. Estis la lastaj tagoj de Septembro. Mi vidis nur min mem en tia kostumo. Mian kestojn kaj siajn ŝlosilojn mi jam donis al la agento de firmao Grindlays [grindlez]. Mi pensis, ke mi devas fari tion kion faras ĉiu ajn aliajn, mi do donis ankaŭ la ŝlosilojn!

Mi posedis kvar enkonduk-leterojn: al D-ro Pranĝivan Mehta, Dalpatram Ŝukl, Princo Ranaĝitsingh, kaj Dadabhai Naŭroĝi. De Southampton, mi sendis telegramon al D-ro Mehta. Iu en la ŝipo konsilis, ke mi loĝu ĉe la hotelo Victoria [vik'toria]. Tial Maĝmudar kaj mi atingis tiun hotelon. Mi sentis min ege sinĝena pro mia blanka vestaĵo. Plue, atinginte la hotelon ni eltrovis, ke pro la fakto ke la morgaŭ estis Dimanĉo, nia pakaĵo ne venos de Grindlays [grindlez] ĝis la Lundo. Tio ĝenis min.

D-ro Mehta venis ĉirkaŭ la 7a aŭ la 8a. Li salutis min varme. [Noto 1] Ne pensante, mi prenis lian peltan ĉapelon kaj mankaresis ĝin kontraŭ la fibroaranĝo. La fibroj vertikaligis. D-ro Mehta tuj haltigis min [Noto 2]. Sed la eraro jam okazis. La nura sekvo de lia haltigo povus esti, ke ne okazos denove tia eraro.

Jen la komenco de mia eduko pri la kutimoj eŭropaj. Ridante, D-ro Mehta klarigadis multajn aferojn al mi. Ne tuŝu alies posedaĵojn; oni ne ĉi tie povas demandi tiajn demandojn kiajn oni povas demandi al iu en Barato post konatiĝo; ne konversaciu laŭte; malkiel la kutimo en

Barato, ĉi tie ne necesas adresi Anglojn kiel "sinjoron"; "sinjoro" estas uzata de servistino al sia majstro aŭ al altranga funkciulo. Poste li diskutis pri la kosto de la loĝado en hotelo, kaj konsilis, ke mi bezonos loĝi ĉe ies hejmo. Ni lasis tiun pripensadon ĝis la Lundo. Post multaj konsiloj, D-ro Mehta lasis min.

En la hotelo ni ambaŭ sentis nin enkaptitaj. Plue la hotelo estis kara. En Malto enŝipiĝis sinjoro el la barata regiono Sindh. Maĝmudar bone amikiĝis kun li. Tiu ĉi pasaĝero konis Londonon bonege. Li surprenis la respondecon lui du ĉambrojn por ni. Ni konsentis, kaj lunde, tuj post ni akiris nian pakaĵon, ni pagis la fakturon, kaj eniris la ĉambrojn aranĝitaj de tiu sinjoro el Sindh.

Mi memoras, ke mia parto de la hotela fakturo estis ĉirkaŭ tri pundoj. Vidinte tion, mi miregis. Eĉ paginte tri pundojn, mi restis malsata. Nenion el la manĝaĵoj de la hotelo mi ŝatis. Mi provis jen, sed ne ŝatis ĝin; provis alian, kaj ankaŭ tiun ĉi ne ŝatis -- sed mi devis pagi por ambaŭ kompreneble. Ĝuste, mi ankoraŭ travivis per la nutraĵo kiun mi kunportis el Mumbajo.

Ankaŭ en tiu ĉi nova ĉambro, mi ege malfeliĉis. Mi ofte memoris la landon. La patrino amo hantis min. Ĉiunokte mi ekploradis. Pro tiom da memoroj pri la hejmo, kiel do mi povis dormi? Krome, mi ne povis dividediskuti tiun ĉi malfeliĉo kun iu ajn; plue, al kio utilis tia diskutado? Mi mem ne sciis tion kio min trankviligus. Strangaj la homoj ĉi tie, strangaj ilia vivmaniero, eĉ la hejmoj strangaj, kaj la loĝmaniero en tiuj hejmoj strangaj! Mi ankaŭ ege malmulte sciis pri la diro kaj faro kiuj rompus la kutimojn kaj etiketojn tie ĉi. Plue la limoj ĉirkaŭ mia manĝaĵo; kaj tute sengustaj ŝajnis la manĝindaĵoj. Tial mi sentis min kiel arekonukson inter tranĉiloj. Mi ne ŝatis resti en Anglujo kaj mi ne povis reveni hejmen. Atinginte Anglujon mi jam decidis loĝi tie tri jarojn.

## 14. Mia Plaĉo

D-ro Mehta venis lunde al la hotelo Victoria por renkonti min. Tie li akiris nian novan adreson; pro tio li venis al la nova loko. Pro mia stulteco mi estis infektita de la favo sur la ŝipo. Oni devis bani sin surŝipe en sala akvo. Tio ne donis sapŝaŭmon. Sed mi taksis ĝin civilza uzi sapon. Pro tio anstataŭ puriĝante, la korpo nigriĝis. Faviĝis. Mi montris ĝin al kuracisto. Li donis bruligan medikamenton -- acetan acidon. Tiu medikamenton plorigis min. D-ro Mehta vidis nian ĉambron kaj la ceteran, kaj skuis sian kapon: "Tiu ĉi loko ne utilas. Veninte al tiu ĉi lando, estus pli grave sperti la vivkutimojn ĉi tie, ol studi. Por fari tion, necesas loĝi kun iu familio. Sed nun mi pensas, ke unue vi bezonas iom da edukado, tial loĝu ĉe la hejmo de \_\_\_\_\_. Mi prenos vin tie."

Mi dankeme akceptis lian konsilon. Mi atingis la hejmon de la amiko. Nenio mankis en lia bonveno kaj servo. Li traktis min kiel mi estus sia propra frato, instruis min pri britaj kutimoj; mi povas diri, ke li alikutimigis min paroli iomete la anglan.

La demando pri mia manĝado iĝis ege ĝena. Sensala, senspica manĝado tute ne gustis al mi. Sed kion do prepari la dommastrino por mi? Matenmanĝe oni preparis avenkaĉon. La ventro pleniĝis pro tio. Sed posttagmeze kaj vespere mi ĉiam restis malsata. La amiko ĉiutage persvadis min manĝi viandon. Mi memoris la voton kaj silentadis. Mi ne kapablis respondi al liajn argumentojn. Posttagmezoj mi travivis nur per pano, marmelado kaj spinaco. Kaj la sama por la vespero. Mi rimarkis, ke la kutimo estas ke oni prenu nur du-tri pecojn da pano. Mi sinĝenadis demandi pli. Mia kutimo estis manĝi tutplene. Ege malsatadis kaj bezonis multe da manĝado. Posttagmeze aŭ vespere ne akireblis lakto. Vidante mian aspekton, iutage la amiko iritiĝis: "Se vi ja estis mia frato, mi tutcerte sendus vin reen. Nesciante la situacion ĉitiean, kio valoras voton donitan al nealfabeta patrino? Oni eĉ ne povas nomi ĝin voto. Mi diras al vi, ke la juro ne taksus ĝin voto. Alkroĉi al tia voto devus esti konsiderata superstiĉo. Kaj kaptita en tia superstiĉo, vi ne povos porti ion ajn de tiu ĉi lando al la via. Vi diras, ke vi ja manĝis viandon. Ĝi eĉ plaĉis al vi. Kie ne estis bezonata, vi

manĝis ĝin, kaj kie ja estas akre bezonata, vi forlasas ĝin. Kia strangaĵo!"

Mi restis senmova.

Ĉiutage okazis tia argumentado. Mi havis ĉe mi nur unu mantron por kontraŭi lin. Ju pli la amiko min konsilis, des pli pligrandiĝis mia firma volo. Ĉiutage mi petis la dion por protekti min, kaj mi estis protektita. Mi ne sciis, kiu estis la dio. Sed la respekto instruita de Rambha ja efikiĝis.

Iutage la amiko eklegis volumon de Bentham [Noto 1]. Li legis la ĉapitron pri utilismo. Mi timis. La lingvo estis altnivela. Mi komprenis malfacile. Li diskutis la tekston. Mi respondis:

"Mi pardonpetas vin. Mi ne povas kompreni tiajn subtilajn aferojn. Mi konsentas, ke oni devas manĝi viandon, sed mi ne povas rompi la ligojn de mia voto. Mi ne povas oferti ian argumenton por ĝi. Mi kredas, ke mi neniam povas venki vin en argumentado. Sed konsideru min aŭ stultulo aŭ obstinulo kaj lasu min en tiu ĉi afero. Mi komprenas vian amon. Vian celon mi komprenas. Mi konsideras vin mia ĉefa bondeziranto. Mi ankaŭ vidas, ke vi doloriĝas, ĝuste pro tio vi persvadas min tiel. Sed mi estas senpova. Mia voto ne povas rompiĝi."

La amiko fikse rigardis min. Li fermis la libron. "Sufiĉas, mi ne plu argumentos," li diris, kaj silentiĝis. Mi ĝojis. Poste li ĉesis argumentadi. Sed li daŭris zorgi pri mia bonfarto. Li fumadis, drinkadis. Sed li neniam diris al mi, ke ankaŭ mi faru eĉ unu el tiuj. Male, li neis ilin. Lia zorgo estis, ke pro la manko de la viando, mi malfortiĝos kaj ne povos loĝi en Anglujo sensanprobleme.

Tiel mi pasis unu monaton en lernoservo. La amiko loĝis en Riĉmond, tial mi povis iri al Londono nur unu aŭ dufoje dum la semajno. D-ro Mehta kaj kamarado Dalpatram Ŝukl decidis, ke nun mi devas loĝi kun iu familio. Kamarado Ŝukl eltrovis en West Kensington la hejmon de Anglo-Indian [Noto 2], kaj loĝigis min tie. La dommastrino estis vidvino. Mi parolis al ŝi pri mia kontraŭvianda voto. La maljunulino surpronis la respondecon prizorgi min. Mi ekloĝis tie.

Ankaŭ tie mi devis resti malsata ĉiutage. Mi jam mendis dolĉaĵojn ktp elhejme, sed ili ankoraŭ ne alvenis. Ĉio ŝajnis pale sengusta. La

maljunulino ĉiam demandis; sed kion ŝi povus fari? Plue, mi ankoraŭ estis sinĝena. La maljunulino havis du filinojn. Ili donis iomete pli da panpecoj. Sed kiel tiuj kompatindulinoj povas scii, ke nur per la tuta pano mi plensatiĝus?

Sed nun mi ekakriĝis. Mia studado ankoraŭ ne komencis. Malfacile mi povis legi tagĵurnalojn. Tio estis la influo de kamarado Ŝukl. Mi neniam legis tagĵurnalojn en Barato. Sed pro la ekzercado de ofta legado, mi ekinteresiĝis pri ili. Daily News, Daily Telegraph, kaj Pall Mall Gazette -- mi kuris la okulojn sur tiuj tagĵurnaloj. Sed komence, mi spezis apenaŭ unu horo sur ili.

Mi ekpromenadis. Mi bezonis eltrovi manĝejon vegetaran. Ankaŭ la dommastrino diris al mi, ke troveblas tiaj manĝejoj en Londono. Ĉiutage mi marŝis 10-12 mejloj. Mi eniradis ordinaran manĝejon kaj manĝis panon ĝis la plena ventro. Sed tio ne plaĉis min. Vagante tiel, iutage mi atingis la straton Farringdon kaj legis tie la nomon 'Vegetera Restoracio'. Mi ĝojis same kiel ĝojas infano akirinte ŝatataĵon. Antaŭ mi eniris tutĝoje, mi vidis la librojn elmontritajn por vendado en la fenestro apud la pordo. Inter tiuj mi rimarkis la libron de Salt, Peto por Vegetarismo. Mi aĉetis ĝin por unu ŝilingo kaj sidiĝis por manĝi. Por la unua fojo post mi alvenis al Anglujo, mi manĝis plenventre. La dio forviŝis mian malsaton.

Mi tralegis la libron de Salt. Ĝi stampis min. Ekde la tago kiam mi legis tiun ĉi libron, mi volonte, t.e. pensoplene, ekkredis vegetarismon. La voto donita al la patrino ekdonis apartan plezuron al mi. Kaj ĝuste kiel mi ĝis nun pensis, ke estus bone se ĉiuj iĝus viandmanĝantoj, kaj kiel mi forlasis viandmanĝadon, antaŭe por sekurigi la veron, kaj poste nur pro la voto, kaj pensis, ke iam en la estonteco, mi mem, propravole manĝos viandon, kaj do feliĉe asimiliĝos en la viandmanĝantaro, same kiel ĉio ĉi, mi nun volegis resti vegeterano, kaj igi ĉiujn vegeterano.

## **15. En 'Civiliza' Vestajo**

Mia admiro pri vegetarismo pliiĝis tagon post tago. La libro de Salt pliakrigis mian deziron legi aliajn librojn pri la dieto. Mi aĉetis kaj tralegis ĉiujn librojn kiujn mi povis akiri. En tiuj estis la libro de Howard Williams [haŭad viliemz], La etiko de la dieto, kiu priskribis la pensojn pri la dieto de la saĝuloj de la diversaj epokoj. Li provis pruvi, ke Pajthagoras, Jesuo ktp estis vegeteranoj. Ankaŭ estis alloga La perfekta vojo en dieto de d-rino Anna Kingsford. Plue, helpis min la verkaĵoj de d-ro Allinson. Li kredis en la manipulado de la dieto por resanigi la korpon, anstataŭ medikamentado. D-ro Allinson mem estis vegeterano, kaj konsilis siajn pacientojn iĝi vegeteranoj. La rezulto de la tralegado de tiuj ĉiuj libroj estis, ke eksperimentoj pri vegeteranismo iĝis gravaj en mia vivo. Komence unuarangis la sana vidpunkto. Poste tutgraviĝis la religia vidpunkto.

Intertempe zorgis pri mi tiu ĉi amiko. Jam komence li kredis, ke se mi ne manĝus la viandon, mi malfortiĝus. Plue, mi restis stultulo, ĉar mi ne povus eniri la britan socion. Li sciis, ke mi legas librojn pri vegeteranismo. Li timis, ke mi iĝos konfuzita, malŝparos mian vivon per eksperimentoj, forgesos tiun kiun mi devas fari, kaj iĝos 'librosaĝulo'. Pro tiaj pensoj li provis korekti min unufoje pli. Li persvadis min kuniri al teatraĵo. Antaŭ ni iris tie, mi devis manĝi kun li ĉe la restoracio Holborn. Por mi tiu ĉi estis palaco. Lasinte la hotelon Victoria, tiu ĉi estis mia unua sperto pri tia restoracio. La sperto ĉe la hotelo Victoria estis tute senutila; ĉar tie mi estis senkonscia. En tiu amaso, ni amikoj ambaŭ sidiĝis antaŭ tablo. La amiko mendis la unuan pladon. Supo. Mi ĝeniĝis. Kion mi demandu al la amiko? Mi vokis la kelneron.

La amiko komprenis. Ĝene li demandis min, "Kio okazas?"

Mallaŭte, hezite, mi diris: "Mi volis scii ĉu aŭ ne tio enhavas la viandon."

"En tia ĉi loko ne farindas tia ĉi barbara konduto. Se vi ankoraŭ volas kanti la saman kantaĉon, iru al iu malgranda restoracio, kaj manĝu tie, kaj atendu por mi ekstere.

Plaĉis al mi tiu sugesto. Mi iris, serĉante alian restoracion. Proksime mi trovis vegeteranan restoracion. Sed ĝi estis fermita. Mi ne sciis kion mi nun faru. Mi restis malsata. Ni iris por vidi la teatraĵon. Eĉ ne unu vorton parolis la amiko pri la menciita afero. Kaj kion mi mem diru?

Sed tiu ĉi estis la lasta amikabatalo inter ni. Nek rompis la amikecon, nek ĝi amariĝis. Mi povis rekoni la amon malantaŭ ĉiuj liaj provoj. Tial, malgraŭ la malsameco en penso kaj konduto, mia respekto por li pligrandiĝis.

Sed mi pensis, ke mi devas forigi liajn zorgojn. Mi decidis, ke mi ne restos barbaro. Mi akiros trajtojn civilizajn kaj alimaniere atingante kapablon solvi min en la socio, kaŝos la strangecon de mia vegetaranismo.

Por lerni civilizecon, mi streĉis min, kaj prenis la malfacilan vojon.

Pensante, ke malgraŭ la fakto, ke mi estis fremdulo, la vestaĵojn faritajn en Mumbajo ne taŭgus por la brituja alta socio, mi mendis vestaĵojn en la armea kaj mararmea vendejo. Mi metis sur mia kapo kamenĉapelon (kiu kostis 19 ŝilingojn -- ege altkosta laŭ tiu tempo). Ne kontentiĝante eĉ pri tio, mi iris al la strato Bond, kie kudrigas vestaĵojn la modaj homoj, kaj mendis versper-kostumon kontraŭ oferto de dek pundoj. De mia bonkora kaj malavarega plej aĝa frato mi akirigis belan oran ĉenon kiun mi povis pendi de ambaŭ poŝoj. Jam bantita kravato ne sufiĉe modis, tial mi akiris la arton de kravatbantado. Propralande oni vidis la spegulon nur dum la hartondado, sed ĉi tie oni detruis almenaŭ 10 minutojn ĉiutage, starante kontraŭ la spegulo, kravatbantadante, kaj kombante la hararon. La hararo ne estis mola, do oni batalis ĉiutage igi ĝin bukla per broŝo (konsideru ĝin balailo!). Kaj metante kaj dismetante la ĉapelon, la mano kompreneble karesesis la harardividon. Kaj sidante inter gesinjoroj, temp-al-tempo, oni kompreneble tute ĝentile certigis ke la hararo ja estas en sia ĝusta loko.

Sed ĉio ĉi pompo ne sufiĉis. Nur civiliza vestaĵo ne sufiĉas por igi onin civiliza, ĉu ne? Mi jam sciis pri multaj aliaj eksteraj karakterizaĵoj de civilizeco, kaj mi volis lerni ilin. Civiliza homo devas scii dancadon. Li devas regi la francan; ĉar la franca estas la lingvo de Francujo, la najbaro de Britujo, kaj ankaŭ la nacia lingvo de



tuta Eŭropo. Kaj mi volis travagi tra Eŭropo. Krom tio, civiliza homo ankaŭ devas scipovi fluan oratorion. Mi decidis lerni dancon. Mi aliĝis al klaso. Pagis ĉirkau 3 pundojn por unu sesio. Dum tri semajnoj mi eble havis ses klasojn. Sed la piedoj ne laŭis ĝuste. La piano ja ludadis, sed kion ĝi diris, mi tute ne komprenis. 'Unu, du, tri', mi paŝis, sed inter tiuj ludis la pianon, preter mia kapablo. Kion, do, oni nun faru? Nun mi faris la samon kiel la oldulo kaj la kato en la fabelo. Por forigi la musojn, la kato, bovino por la kato, tiele kreskis la familio de la oldulo; same kreskis la familio de mia avaro. Se mi lernos la violon, mi scios pri la melodio kaj pulso. Mi perdis tri pundojn por aĉeti la violon kaj donis iom ankaŭ por la instruado. Por oratorio, mi eltrovis la domon de tria instruisto. Ankaŭ al li, mi kompreneble devis doni gineon. Mi aĉetis la libron de Bell 'Standard Elocutionist'. Mi komencis legi prelegon de Pitt.

Tiu ĉi sinjoro Bell sonis la sonorilon (angle, 'bell'). Mi vekigis.

Ĉu mi volis loĝi tutvive en Britujo? Tute ne. Kion mi faru per flua oratorio? Kiel mi iĝos civiliza per dancado? Kaj la violon mi povas lerni eĉ en mia lando. Mi finfine estas studento. Mi devas pliriĝigi mian scioriĉecon. Mi devas prepari por mia metio. Se miaj sammetianoj konsideras min civilza, bone, se ne, mi devas forlasi tiun ĉi avaron.

Sub la influo de tiuj ĉi pensoj, mi verkis leteron al la instruisto de oratorio. Mi jam akiris du aŭ tri lecionojn de li. Ankaŭ al la dancinstruisto mi sendis tian ĉi leteron. Mi iris kunviole al la hejmo de la violinstruistino. Mi permesis ŝin vendi la violon kiom ajn ĝi valoros. Mi duon-amikiĝis kun ŝi. Tial mi parolis kun ŝi pri mia frenezo. Al ŝi plaĉis mia eksiĝo de la reto de la dancado kaj tiel plu.

Tiu ĉi obsedo iĝi civiliza daŭris eble tri monatojn. La pompa vestaĵo ja daŭris multaj jaroj. Sed nun mi iĝis studento.

## 16. Ŝanĝoj

Neniu kredu, ke miaj eksperimentoj en dancado, ktp, estis pruvoj pri mia tiutempa diboĉado. Legantoj sendube rimarkas, ke troviĝas ia metodo en tio. Eĉ dum tiu periodo de obsedo, mi estis iugrade konscia. Mi sciis pri ĉiu elspezo mia. Mi decidis ne elspezi pli ol 15 pundojn ĉiumonate. Krom veturkostoj, mi ankaŭ kontrolis mian elspezon por la afranko, kaj preparis bilancredsumon antaŭ ol dormi. Tiu ĉi kutimo restis ĉe mi ĝis la fino. Kaj mi scias, ke pro tiu alkutimiĝo, mi sukcese traktis la centmilojn da rupioj kiuj jam pasis tra miaj manoj dum mia laborvivo. Kaj laŭ mia takso, dum la multaj movadoj pri kiuj mi respondecis, mi neniam pruntprenis monon, male, en ĉiu afero sukcesis ŝpari iom. Se ĉiu junulo same zorge preparas spezresumojn, ankaŭ li profitos per tio, same kiel estontece spertis mi kaj la popolo.

Mi havis iom da rego pri mia vivmaniero, tial mi povis decidi kiom mi devas elspezi. Mi nun decidis duonigi mian elspezadon. Kontrolante la bilancon, mi trovis, ke sufiĉe grandis la elspezo pro veturado. Plue, loĝi kun familio, kompreneble kostis iom. Foje mi devis kunpreni la familianojn por manĝi eksterdome -- tio ja estas la kutimo. Se mi iros kun ili al vespermanĝo, mi do havis la elspezon de veturado, ktp. Se iu virino kunestis, estis devige pagi por ŝi. Se mi iris eksterdomen, mi ne sukcesis atingi la domon por manĝi. Krom la jam pagita manĝaĵo ĉedome, mi ankaŭ devis elspezi por manĝi eksterdome. Mi vidis, ke oni povas eskapi tiajn elspezojn. Mi ankaŭ komprenis la neceson eviti elspezadon pro senutila singardemo.

Ĝis nun, mi loĝis kun familioj; mi nun decidis lui propran ĉambron. Mi ankaŭ decidis ŝanĝi kvartalojn laŭbezzone kaj por atingi pli da sperto. Mi preferis tiajn loĝejojn kiajn estis atingeblaj en malpli ol duonhoru de mia laborejo, kaj mi povas tiamaniere ŝpari la veturkostojn. Antaŭe, mi devis elspezi por veturadi, kaj krome trovi tempon por la promenado. Nun, mi kombinis la promenadon kun la iradon al la laborejo, kaj tiel facile marŝis ok-dek mejlojn ĉiutage. Ĉefe pro tiu ĉi kutimo, mi preskaŭ neniam malsaniĝis en Britujo. La korpo fortiĝis. Lasante la familion, mi luis du ĉambrojn. Unu kiel

litĉambro, kaj la dua kiel salono. Jen la dua etapo de la ŝanĝoj. Restis la tria.

Tiel mi ŝparis duonon de mia elspezado. Sed kion fari pri la tempo? Mi sciis, ke oni ne bezonas multe da studado por la advokata ekzameno; tial mi ne zorgis tro pri tio. Sed mia neperfekta angla ja ĝenis min. La vortoj de sinjoro Leli -- "Iĝu licenciulo, renkontu min poste" -- pikis min. Mi pensis, ke krom iĝi advokato, mi devas ankaŭ studi ion pli. Mi demandis pri la studado ĉe Oksfordo kaj Kembriĝo. Mi renkontis multajn amikojn. Mi vidis, ke iri tie ege grandigus la elspezadon, kaj plilongigos la studadon. Mi ne povis loĝi pli ol tri jaroj. Iu amiko diris, "Se vi ja volas fari malfacilan ekzamenon, sukcesu en la abiturianta ekzamenon londonan. Vi devos labori multe por tio, kaj ankaŭ pligrandiĝos la ĝenerala scio. Ĝi kostas nenion." Al mi plaĉis tiu ĉi sugesto. Sed vidante la studobjektojn, mi ekhezitis. La latina kaj unu alia lingvo estis devigataj. Kiel lerni la latinan? Sed la amiko konsilis: "Ege utilis la latinan por advokato. Por la latinkonanto, faciliĝus la leĝlibroj, kaj en la ekzameno pri 'Roma Leĝo' unu demando estas tute en la latina. Plie, koni la latinan grandigos la regon sur la angla." Mi estis influita de tiuj ĉi argumentoj. Mi pensis, ke ĉu aŭ ne ĝi malfacilas, mi ja devas lerni ĝin. Mi devas kompletigi la eklernon de la franca. Tial mi decidis, ke la dua lingvo estu la franca. Privataj klasoj okazis por la abiturianta ekzameno. Mi aliĝis al unu. La ekzameno okazis ĉiu sesa monato. Mi havis apenaŭ ses monatoj. Tiu ĉi laboro estis preter mia kapablo. La rezulto estis, ke anstataŭ iĝi civiliza, mi iĝis ege laborema studento. Mi preparis horaron. Kaj uzis ĉiun minuton. Sed mia intelegento aŭ memoro ne estis tia, ke mi povis studi la latinan kaj la francan, krom la aliaj studobjektoj. Mi faris la ekzamenon. Malsukcesis en la latina. Ja sentis doloron, sed ne malkuraĝiĝis. Mi ekŝatis la latinan. Mi pensis, ke pro mia duafoja faro de la ekzameno, pliboniĝos mia franca, kaj mi prenos novan studobjekton en la scienco. Manke de eksperimentoj, mi tute ne ŝatis ĥemion. Tamen, mi nun vidas, ke mi ja devis havi multe da intereso en ĝi. Mi jam lernis ĝin en Barato, tial por la abiturianta ekzameno, unua foje, mi preferis ĥemion. Ĉifoje, mi elektis la studobjekton 'Lumo kaj Varmo'. Tiu ĉi estis konsiderata facila. Ankaŭ mi trovis ĝin facila.

Samtempe kun la preparo refari la ekzamenon, mi klopodis plisimpligi mian vivstilon. Mi sentis, ke mi ankoraŭ ne laŭigis mian vivstilon kun la malriĉeco de mia familio. Ŝancelis mian koron pensoj pri la monmanko kaj malavaro de la frato. Tiuj kiuj elspezis 15 pundojn aŭ ok pundojn efektive ricevis stipendiojn. Mi vidis, ke troviĝas homoj kies vivstilo estis eĉ pli simpla ol la mia. Mi konatiĝis kelkaj el tiuj malriĉaj studentoj. Iu studento loĝis en ĉambraĉo kontraŭ du ŝilingoj ĉiusemajne, kaj vivis per du pencoj da kakao kaj pano. Mi ne kapablis konkurenci kun li, sed mi ja sentis, ke mi povas loĝi en unu ĉambro anstataŭ du, kaj kuiri duonon de mia manĝaĵo. Tiel mi povas vivi per kvar aŭ kvin pundoj. Mi jam tralegis librojn pri simpla vivstilo. Mi lasis la du ĉambrojn, kaj luis unu ĉambro kontraŭ ok ŝilingoj ĉiusemajne. Mi aĉetis kuirfornon kaj ekpreparis la matenmanĝon propramane. Tiu ĉi okupis maksimume 20 minutoj. Kiom longe daŭros la preparo de avenkaĉo kaj por boligi akvon por la kakao? Mi tagmanĝis eksterdome, kaj denove, vespermanĝis ĉe hejme per kakao kaj pano. Tiel mi lernis manĝadi per elspezo de unu ĝis unu kaj kvarono da ŝilingo. Tiu ĉi estis mia plej studada tempo. Pro la simpligo de la vivo, mi ŝparis pli da tempo. Mi faris la ekzamenon la duan fojon, kaj sukcesis.

Sed, la leganto ne pensu, ke pro la simpligo malvigliĝis mia vivo. Male, pro tiuj ĉi ŝanĝoj, ekvilibriiĝis la stato ena kaj ekstera, taŭgiĝis la vivstilo kun la familia situacio, la vivo pliriĉiĝis, kaj mi tute ektrankviliĝis.

## **17. Dietaj eksperimentoj**

Ju pli mi eniris la profundon de la vivo, des pli mi sentis la bezonon kongruigi miajn enajn kaj eksterajn vivojn. Kun la sama rapideco kun kiu mi faris ŝanĝojn en mia vivstilo kaj elspezado, mi ekŝanĝis miajn dietajn kutimojn; eĉ pli rapide, efektive. Mi vidis, ke verkistoj de anglaj libroj pri la vegetarismo jam profundpensis la aferon. Ili traktis vegetarismon de religiaj, sciencaj, ĉiutagaj, kaj sanaj vidpunktoj. Etike, ili konkludis, ke la povo kiun homoj posedas super la bestoj ne estas por mortigi kaj manĝi ilin, sed por protekti ilin; aŭ same kiel homoj uzas unu la aliajn, sed ne manĝas unu la aliajn, same la bestoj devas esti uzataj, ne manĝataj. Kaj ili vidis, ke la nutraĵo ne ekzistas por ĝui, sed ja por vivi. Tial, multaj el ili konsilis kaj efektivigis la forlason de ne nur viando sed ankaŭ ovoj kaj lakto. El la scienca vidpunkto, kaj vidante la homan korpon, multaj konkludis, ke homoj eĉ ne bezonas kuiri sian nutraĵon; ili ja estis kreitaj por vivi per maturaj fruktoj surarbaj. Nur la patrinan lakton oni devas trinki. Kaj post la ekdentiĝo, oni manĝu nur mordeblaĵojn. De la sana vidpunkto ili konsilis eviton de spicoj kaj de la ĉiutaga kaj ekonomia vidpunktoj, ili diris, ke nur la vegetara dieto estas la plej malaltkosta dieto. Mi estis influita de tiuj ĉi kvar vidpunktoj, kaj mi aniĝis vegetara manĝejo kie mi renkontis homojn kiuj kredis je tiuj ĉi kvar starpunktoj. Ili havis klubon, kaj eĉ eldonis semajnan revuon. Mi abonis la revuon, kaj aliĝis al la klubo. Post mallonga tempo mi iĝis komitatano. Ĉi tie mi renkontis homojn kiuj estis la konsiderataj la kolonoj de vegetarismo. Mi iĝis okupita en eksperimentoj.

Mi ĉesis manĝi kaj uzi la dolĉaĵojn kaj spicojn kiujn mi akiris elhejme, kaj iris la menso alidirekten. Tial malgrandigis la amon al la spicoj, kaj la legomplado en Richmond, kiun mi konsideris sengusta se ĝi ne enhavis spicojn, nun plaĉis al mi se ĝi nur estis boligita. Pro multaj tiaj spertoj mi lernis, ke la vera loko de la gusto ne estas la lango, sed la menso.

Mi jam havis ekonomiajn kialojn, kompreneble. Tiam unu skolo kredis, ke la teo kaj la kafo estas malbonaj, kaj apogis kakaon. Mi jam komprenis, ke konsumindas nur tiuj manĝaĵoj kiuj utilas al la korpo. Ĉefe pro tio, mi forlasis la teon kaj kafon, kaj trinkis nur la kakaon.

La manĝejo havis du sekciojn. En unu oni pagis por ĉiu manĝaĵo. Foje oni elspezis eĉ unu aŭ du ŝilingojn tie. Bonstatuloj iris tie. En la alia sekcio, kontraŭ ses pencoj oni donis tri manĝaĵojn kaj unu panpecon. Dum mia malelspezemula periodo mi oftadis la sespenca sekcio.

Kunekun tiuj ĉi eksperimentoj, ankaŭ okazis multaj subeksperimentoj. Foje mi forlasis nutraĵon kun amelo, foje vivtenis nur per pano kaj fruktoj, kaj foje nur ĝuis fromaĝon, lakton, kaj ovojn.

Priskribindas tiu lasta eksperimento. Ĝi eĉ ne daŭris 15 tagojn. Apogantoj de senamela nutraĵo laŭdegis ovojn, kaj pruvis, ke ovoj ne estas viando. Ja evidentas, ke manĝi ovojn ne dolorigas ion vivantan. Sub la fiinfluo de tiu ĉi argumento, mi manĝis ovojn malgraŭ la voto al la patrino, sed tiu mia kaduko estis pormomenta. Mi ne rajtis reinterpreti la voton. Nur validas la senco de la votiginto. La patrino kiu votigis min ne manĝi viandon simple ne kapablis pensi pri manĝado de ovoj -- tio mi ja sciis. Tial tuj post mi ekkomprenis la veron pri la voto, mi forlasis kaj la ovojn, kaj la eksperimenton.

Jen profunda sekreto kiu rimarkindas. En Britujo mi legis tri interpretojn pri la viandmanĝado. Laŭ unu la viando signifas la karnon de la bestoj kaj birdoj. Tial tiuj ĉi interpretintoj forlasis ĝin, sed manĝis la fiŝon; kaj kompreneble ovojn. Laŭ la dua interpreto, oni forlasu tion kion la meza homo konsiderus estaĵo. Laŭ tio ĉi forlasindas fiŝoj sed manĝeblas ovojn. Laŭ la tria interpreto forlasindas ne nur ĉio kio estas konsiderata estaĵo, sed ankaŭ la produktoj kiuj devenas de ili. Laŭ tiu ĉi interpreto oni devis forlasi ovojn kaj eĉ la lakton. Se mi konsentus pri la unua interpreto, mi povis manĝi eĉ la fiŝon. Sed mi jam komprenis, ke por mi devigas nur la interpreto de la patrino. Tial, se mi volus plenumi la voton kiun mi faris antaŭ ŝi, mi simple ne devas manĝi ovojn. Tial mi forlasis la ovojn. Sed tio iĝis ege malfacile por mi, ĉar kontrolante detale ĉe la vegetara manĝejo, mi trovis, ke multaj aĵoj tie enhavis ovojn. Mi do devis kontroli ĉe la servistoj ĝis mi mem sciis pri la pladoj; ĉar ovojn ja estas uzatajn en multaj pudingo kaj kukoj. Tiel, unuflanke mi ja trovis min libera, ĉar mi povis manĝi nur kelkajn kaj tute simplajn aĵojn. Aliflanke, mi iom malfeliĉiĝis ĉar mi devis forlasi multajn aĵojn kies gusto al mi ja plaĉis. Sed ja pormomenta estis tiu malfeliĉo. Mi amis la puran, profundan kaj ĉiaman guston de votplenumo pli ol tiu pormomenta gusto.

Sed ankoraŭ atendis min la vera testo, kaj tio pro iu alia voto. Sed kiu defius la diprotektaton?

Antaŭ ol ke mi fermu tiun ĉi ĉapitron, necesas diri ion pri la signifo de voto. Mia voto estis kontrakto kun la patrino. Multegaj kvereloj en la mondo okazas ĝuste pro la signifo de la kontrakto. Eĉ se la vortoj de la kontrakto estas tute klaraj, la lingvokleruloj faros montegon el ŝtonetoj. Ne troviĝas ĉikuntekste diferenco inter la 'deculoj' kaj la 'maldeculoj'. La avaro blindigas ĉiujn. De la reĝo ĝis la ordinarulo, ĉiuj interpretas kontraktojn laŭ siaj propraj interesoj, kaj trompas la mondon, sin mem, kaj la dion. Tia interpretado kia utilas al la propra intereso estas nomata la 'dusignifa mezvorto' en la leĝvortaroj. La ora regulo estus akcepti la interpreton de la opozicio; tio kion ni kredas estas falsa aŭ nekompleta. Same, alia ora regulo estas, ke se troviĝas du signifoj, oni konsideru vero la interpreton de la malpli forta partio. Ĝuste pro la forlaso de tiuj ĉi du ora reguloj okazas kvereloj kaj nejusteco. Kaj la radiko de tiu ĉi nejusteco estas la malvero. Tiu kiu nepre prenas la vojon de la vero, tiu tutnature trovas la orajn regulojn. Tiu ne bezonas esplori la leĝaron. La signifo de la vorto 'viando' kiun kredis la patrino, kaj kiun mi mem tiam komprenis, ĝuste tiu signifo estis la vero por mi. Ne tiu signifo kiun mi lernis kaj komprenis pro mia plia sperto aŭ mia studado.

Ĝis tiam, miaj eksperimentoj estis de la financa aŭ sana vidupunktoj. En Britujo ili ankoraŭ ne prenis religian formon. Miaj malfacilaj religiaj eksperimentoj okazis en sud-Afriko, kiujn ni devas ekzameni poste. Sed oni povas diri, ke ilia semo estis semita en Britujo.

Tiu kiu akceptas novan religion montras pli grandan entuziasmon pri la disvastigo de la religio, ol la denaskaj religianoj. En Britujo, la vegetarismo ja estis nova religio, kaj ankaŭ por mi oni konsideru ĝin tiel, ĉar intelekte, mi jam iĝis apoganto de viandmanĝado antaŭ mia veno al Britujo. Mi akceptis vegetarismon plenkonscie nur en Britujo. Tial ankaŭ mia stato similis al religia novulo, kaj mi trovis en mi la pasion de novan religianon. Mi do decidis starigi en mia kvartalo klubon pri vegetarismo. La kvartalo nomiĝis Bayswater [bejzŭater]. En ĝi loĝis Kavaliro Edwin [edŭin] Arnold. Mi petis lin iĝi la vicprezidanto, kaj li konsentis. D-ro Oldfield [oldfild] iĝis la prezidanto. Mi iĝis la sekretario. Por kelke da tempo, la afero bone progresis; sed post kelkaj semajnoj finiĝis la klubo, ĉar laŭ mia kutimo

mia foriris de tiu kvartalo. Sed pro tiu ĉi malgranda kaj modesta afero, mi gajnis sperton pri la starigo kaj funkciigo de institucioj.



## **18. Singardemo -- Mia Ŝildo**

En la vegeterana klubo mi ja estis elektita al la komitato, kaj mi jes ĉeestis ĉiun kunsidon, sed la lango tute ne malfermiĝis por paroli ion ajn. D-ro Oldfield diradis al mi, "Vi ja parolas multon kun mi, sed tute ne malfermas la buŝon en la komitataj kunsidoj. Vi devus esti nomata 'virabelo'." Mi ja komprenis la ŝercon. La abeloj ĉiam laboremas, sed la virabelo sufiĉe bone manĝadas, kaj tute ne laboras. Estis tre strange, ke kvankam ĉiuj aliaj esprimis siajn opiniojn en la komitataj kunsidoj, tamen mi restis tute muta. Ne gravus, se mi ne emis paroli, sed kion diri? Mi trovis, ke ĉiu membro estis pli scioplena ol mi. Krome, se mi sentis neceson paroli pri iu temo, kaj kuraĝigis ekparoli, la temo ŝanĝiĝis.

Tio ĉi daŭris jam longe. Intertempe leviĝis granda temo en la komitato. Ne partopreni en tio ŝajnis al mi maljusta. Voĉdoni mute estus, mi pensis, malvira. La kunsidestro estis s-ro Hills [hilz], la posedanto de Thames Iron Works [temz ajren ŭerkz]. Li estis strikta moralisto. Oni povas diri, ke la klubo funkciis danke al lia financa subteno. Multaj membroj ja brilis pro lia apogo. Ĉeestis tiun ĉi komitaton ankaŭ d-ro Ellinson [elinsn]. Tiutempe furoris movado por la koncipoprevento. D-ro Allinson apogis tiujn metodojn, kaj propogandis pri tio inter la laboristoj. S-ro Hills trovis tiujn ĉi metodojn moralodetruigaj. Laŭ li, vegetarana klubo ne celas plibonigi nur la dieton, sed ankaŭ la moralojn. Tial li pensis, ke homoj kiel s-ro Allinson, kiu havis sociomalbonigajn ideojn, ne havis lokon en la klubo. Tial venis la propono forigi s-ron Allinson el la komitato. Mi interesiĝis pri la afero. Mi trovis teruraj la pensojn de d-ro Allinson rilate al la koncipoprevento. Mi konsideris la kontraŭon de s-ro Hills pure morala. Mi respektis lin multe. Mi ankaŭ respektis lian malavarecon. Sed mi vidis nejustecon en la propono forigi homon el vegeterana klubo pro pure moralaj konsideroj. Mi pensis, ke en vegeterana klubo, la pensoj de s-ro Hills pri la rilatoj inter viroj kaj virinoj estis lia propra afero. Ili neniel rilatis al la principoj de la klubo. La klubo nur celis disvastigi vegeteranismon; ne aliajn principojn. Tial mi pensis, ke eĉ tiu kiu malrespektis aliajn principojn povis havi lokon en la vegeterana klubo.

Aliaj membroj en la komitato ankaŭ havis la saman penson. Sed mi entuziasmiĝis esprimi mian propran opinion. Kiel do esprimi ĝin iĝis granda demando. Mi ne kuraĝis paroli, tial mi decidis skribi miajn pensojn kaj submeti ilin tiel al la kunsidestro. Mi kunportis mian eseeton. Mi eĉ ne kuraĝis ĝin laŭtlegi. La kunsidestro petis iun laŭtlegi ĝin. La partio de d-ro Oldfield malvenkiĝis. Tiel, en tia ĉi mia unua batalo, mi estis en la malvenkita flanko. Sed ĉar mi estis konvinkita, ke tio estas la vera flanko, mi restis tute ĝoja. Mi malklare memoras, ke post tio mi demisiis de la komitato.

Mia singardemo restis kun mi ĝis la fino en Britujo. Eĉ se mi iris por renkonti iun, se troviĝis grupo da kvin-sep homoj, mi tuj mutiĝis.

Ni foje vizitis Ventnor-on. Ankaŭ Mazmudar kunestis. Ni loĝis ĉe vegeterana hejmo tie. La aŭtoro de La etiko de dieto ankaŭ loĝis en tiu ĉi havenurbo. Ni renkontis lin. Oni organizis kunsidon por propagandi vegeteranismon. Ni ambaŭ estis invititaj paroli tie. Ni ambaŭ akceptis la inviton. Mi jam eltrovis, ke oni akceptus laŭtleĝon de eseo. Mi vidis, ke por esprimi sin koncize kaj temlime, multaj homoj laŭteĝadis skribaĵojn. Mi verkis mian paroladon. Mi ne kuraĝis paroladi. Kiam mi stariĝis, mi ne kapablis legadi. La okuloj malheliĝis kaj ekteriĝis la manoj kaj piedoj. Mia parolado estis apenaŭ unupaĝa. Mazmudar laŭtleĝis ĝin. La parolado de Mazmudar okazis bone. La aŭskultintoj bonvenigis lian paroladon per aplaŭdoj. Mi estis singena, kaj malfeliĉis pro mia nekapablo.

Mia lasta provo en Britujo pri publika parolado okazis dum mia foriro de tiu lando. Antaŭ mia foriro de Britujo, mi invitis miajn vegeterajn amikojn al la restoracio Hoburn por kunmanĝado. Mi pensis, ke oni kompreneble akirus vegeteranan manĝadon en vegeterana restoracio, sed estus bone enkonduki vegeteranismon en restoracio kiu preparas viandmanĝaĵojn. Pensante tiel, mi faris specialajn aranĝojn kun la administrato de la restoracio. Tiu ĉi nova eksperimento ege plaĉis al la vegeteranoj. Sed por mi tio ja fiaskis. Manĝado ja estas por ĝuado, tamen en la Okcidento, ĝi evoluiĝis en arton. Por la evento okazas speciala ornamaĵo kaj almontraĵoj. Muziko estas ludata kaj oratorioj fartaj. Eĉ ĉi tiu malgranda manĝado enhavis ĉion ĉi pompon. La horo alvenis de mia parolado. Mi stariĝis. Mi preparis mian paroladon post longa pensado. Mi verkis nur kelkajn frazojn, sed ne sukcesis paŝi preter la unua frazo. Legante pri Addison,

mi legis pri lia singardemo. Onidire, sian unuan paroladon en la brita parlamento li komencis per 'mi konceptas, ke', 'mi konceptas, ke', 'mi konceptas, ke,' kaj ne progresis plu. Nu, en la angla, 'koncepti' ankaŭ signifas 'koncipiĝi'. Tial, kiam Addison ne progresis plu, ŝercemulo en la parlamento deklaris, 'Tiu ĉi sinjoro jam konceptiĝis trifoje, sed naskis nenion!' Mi jam antaŭpensis tiun ĉi rakonteton, kaj intencis prelegeti amuze. Tial mi komencis mian prelegon per tiu ĉi rakonteto, sed la veturilo enŝlimiĝis tie. Ĉion kion mi planis diri, mi tute forgesis, kaj en la provo fari amuzan kaj denssignifan prelegon, mi mem iĝis ridobjekto. Finfine, 'S-roj vi akceptis mian inviton, pro tio mi ŝuldas al vi,' -- dirante tion, mi devis sidiĝi!

Mi povas diri, ke mi povis forigi tiun ĉi singardemon nur post mi alvenis en Sud-Afriko. Ke ĝi estis absolute forigita, oni ne povas diri tion eĉ hodiaŭ. Mi devas pensi antaŭ ol ke mi parolu. Mi hezitas paroli al nova grupoj. Se eblas eviti paroladon, mi tutcerte evitas ĝin. Kaj eĉ hodiaŭ ne estas, ke mi povas sidiĝi inter amikoj kaj facile babili, aŭ eĉ emi paroli. Pro tiu ĉi mia singardemo, okazis ja fiaskoj, sed mi ne malgajnis ion ajn; male, mi nun vidas, ke mi ja profitis pro tio. La hezito ne paroli unue estis doloriga por mi, nun ĝi iĝas komfortiga. Unu granda bono estis, ke mi lernis uzi vortojn ŝpareme. Mi jam alkiutimiĝis regi miajn pensojn. Mi povas doni la atestilon al mi mem, ke sen antaŭpesado apenaŭ vorto eliras aŭ de mia buŝo aŭ mia plumo. Mi ne memoras, ke mi devis bedaŭri ion ajn kion mi oratoriis aŭ skribis. Mi eskapis multajn malfacilaĵojn, kaj mi gajnis pro ŝparado multe da tempo.

Sperto ankaŭ instruis min, ke konsilindas la silento al ĉiu adoranto de la vero. Vole-nevole, homoj troigas aferojn, aŭ kaŝas aŭ alimaniere esprimas dirindaĵojn. Por eviti tiajn ĉi malfacilaĵojn, nepras esti malmultaparolanto. Tiu kiu malmulte parolas, sen antaŭpripensado ne tion farus; ĉiun sian vorton li pesos. Ofte homoj insistas paroli. "Ankaŭ mi volas paroli", kiu kunsidestro ne ricevis tian ĉi noteton? Kaj poste ne sufiĉus la tempon donitan al li. Li postulas pli da tempo por paroli, kaj finfine pli parolas eĉ sen la permeso. Malofte okazas, ke la mondo profitas pro la parolado de tiuj ĉi homoj. Sed klare videblas la perdo de tiom da tempo. Tial, kvankam mi komence doloriĝis pro mia singardemo, tamen, memorante tion hodiaŭ, mi

ĝojas. Tiu ĉi singardemo estis mia ŝildo. Pro tio mi maturiĝis. Mi gajnis ĝian helpon en mia adoro de la vero.

## **19. La Veneno de la Malvero**

Kompare al hodiaŭ, antaŭ 40 jaroj, la nombro de barataj studentoj kiuj iris al Britujo estis malgranda. Preskaŭ iĝis kutimo deklari sin fraŭlo, eĉ se oni estis jam edziĝinta. En tiu lando, neniu lernejo aŭ studento de kolegio estis edziĝinta. La studentovivo ne estas por la edziĝintoj. Ĉe ni en la praa tempo, la studento ja nomiĝis fraŭlo (brahmaĉari). La kutimo de infanedziĝo komencis en ĉi tiu epoko. Oni povas diri, ke tute ne troviĝas infanedziĝo en Britujo. Tial la junuloj el Barato hontas konfesi sian edziĝecon. Alia kialo kaŝi onian edziĝecon estas ke, se riveligis la edziĝeco, oni ne plu havus la rajton flirti kun la junulinoj de la gastiganta familio. Tiu ĉi flirtado estas plejparte tute senkulpa. La gepatroj eĉ preferas tian ĉi geamikecon. Tie tiaj rilatoj inter gejunuloj estas eĉ taksata necesaj, ĉar ĉiu junulo devas mem trovi sian kunvivantinon. Tial se junulo el Barato ekagas laŭ la landaj kutimoj tuj post sia veno al Britujo, la konsekvencoj kompreneble estus teruraj. Kaj ofte ja okazis tiaj sekvoj. Malgraŭ tio, niaj junuloj restis kaptitaj en tiu ĉi iluzia reto. Niaj junuloj preferis mensogi pro tiu kuniĝado kiu estas tute forlasinda, malgraŭ la sunkulpeco de tia kuniĝado laŭ la vidpunkto de la Britoj mem. Ankaŭ mi estis kaptita de tiu ĉi ŝnuro. Kvankam mi estis edziĝinta jam de kvin-ses jaroj kaj estis patro de filo, mi tute ne hezitis deklari min fraŭlo! Sed mi ne povis gustumi la fruktojn de tio ĉi. Mia singardemo kaj silento plejparte min savis. Se mi eĉ ne kapablis paroli, kiu tempomalŝparema junulino parolus kun mi? Mi dubas, ĉu iu junulino konsentus promenadi kun mi.

Mi estis tiom malkuraĝa kiom singardema. En familioj kiel miaj gastigantoj en Ventnor, estus kutime por la filino promenadi kun fremdulo kiel mi. Pro ĝentileco, la filino de mia domestro vidigis al mi la belajn montetojn ĉirkaŭ Ventnor. Kvankam mi mem ne marŝas malrapide, ŝi tamen ja rapidis tiom ke, mi devis treni min post ŝi. Tutvoje ŝi babiladis gaje, kaj mi elbuŝigis jen jeson jen neon. Maksimume, mi deklaris, 'kia belo!' Ne plu. Ŝi flugadis kaj mi daŭre pensis, 'kiam mi reatingos la hejmon?' Mi tamen ne kuraĝis diri, 'nun ni iru hejmen'. Ni atingis la pinton de monteto. Sed kiel malgrimpi? Malgraŭ la altkalkanumaj ŝuoj, tiu ĉi 20-25 jarulino fulme malgrimpis, kaj mi ankoraŭ debatis kiel malgrimpi tiu deklivo! Starante malsupren,

ŝi ridis; min kuraĝigis; ofertis sian manon! Kiel mi povus esti tiom malkuraĝa? Kun malfacilaj paŝetoj, haltante kaj sidiĝante ofte, mi malgrimpis. Mokitante ŝi diris, 'bonege!' tiel pli hontigante jam hontiĝantan homon. Tamen, ŝi ja rajtis tiel moki min.

Sed kiel mi povus eskapi ĉie tiel? La dio volis elsuĉi la venenon de la malvero el mi. Same kiel Ventnor, ankaŭ Brighton [brajtn] estis marborda feriejo. Mi foje vizitis ĝin. En mia hotelo ankaŭ loĝis afabla maljuna vidvino. Tiu ĉi estis mia unua jaro -- antaŭ Ventnor. Ĉi tie ĉiu manĝaĵo en la menuo estis en la franca. Mi ne komprenis. Mi estis ĉe la sama tablo de la maljunulino. Ŝi vidis, ke mi estas fremdulo kaj iom ĝenita. Ŝi ekkonversaciis.

'Vi ŝajne estas strangulo. Kaj estas iom ĝenita pri io. Vi ne mendis ion ajn ĝis nun!'

Mi estis leganta la menuon, kaj pretiĝis demandi la kelneron. Tial mi dankis tiun afablulinon kaj diris, 'Mi ne komprenas tiun ĉi menuon. Mi estas vegeterano. Tial necesas scii kiuj el tiuj ĉi taŭgas.'

La virino diris, 'Do, mi helpos vin, kaj legos la menuon. Mi diros al vi kiujn vi povas manĝi.'

Mi dankeme akceptis ŝian helpon. La rilato kiun ni starigis ĉi tie daŭris dum mia tuta restado en Britujo, kaj daŭre restis eĉ poste dum multaj jaroj. Ŝi donis al mi sian adreson en Londono, kaj invitis min tagmanĝi tie ĉiudimanĉe. Ankaŭ dum aliaj okazoj, ŝi vokis min, klopodis forigi mian singardemon, konatigis min al junulinoj kaj tentis min babiladi kun ili. Ŝi igis min paroli kun virino kiu loĝis kun ŝi. Fojfoje, ŝi eĉ lasis nin solaj.

Komence, mi trovis ĉion ĉi ege malfacila. Mi ne sciis kion diri. Kiel amuzigi ilin! Sed tiu maljunulino daŭre min trejnadis. Mi edukiĝis. Ekatendis ĉiun dimanĉon. Ekplaĉis al mi babili kun tiu virino.

Daŭre tentis min tiu ĉi maljunulino. Ŝi ekĝuis tiun ĉi rilaton. Ŝi ja deziris ĉion bonan al ni.

Sed kion mi faru? Mi pensis: 'Ĉu estus bone, se mi jam estis dirinta al tiu ĉi afabla virino pri mia edziĝeco? Sciante tion, ĉu ŝi dezirus, ke mi edziĝigu iun? Eĉ nun ne malfruas. Se mi dirus la veron, mi evitus malfacilon.' Pensante tiel, mi verkis leteron al ŝi. Jen ĝi, laŭmemore resumita:

'Ekde kiam ni renkontiĝis en Brighton, vi estis amanta min. Vi prizorgas min same kiel patrino prizorgas sian filon. Vi eĉ kredas, ke mi devas edziĝi, kaj tial vi konatigas al mi junulinojn. Antaŭ ol ke tiaj ĉi rilatoj antaŭeniĝu plu, mi devas diri al vi, ke mi ne meritas vian amon. Ekde kiam mi ekvizitadis vin en via hejmo, mi devintis diri, ke mi jam estas edziĝinta. Mi scias, ke edziĝintaj barataj studentoj en tiu ĉi lando ne diras, ke ili estas edziĝintaj. Ankaŭ mi sekvis la saman kutimon. Sed nun mi vidas, ke mi tute ne devis kaŝi mian edziĝecon. Mi aldonu, ke mi edziĝis infanaĝe, kaj mi eĉ havas filon. Mi ege bedaŭras, ke mi kaŝis tiun ĉi de vi; sed nun la dio donis al mi la kuraĝon diri la veron al vi, kaj mi ĝojas pro tio. Ĉu vi povas pardoni min? Mi ne faris ion maltaŭgan kun tiu fratino kiun vi enkondukis al mi -- pri tio mi volas vin kredigi. Mi tute konscias, ke mi ne devas fari ion ajn. Sed laŭnature vi volas, ke mi korligu kun iu. Por ke la ideo ne progresu en via menso, ankaŭ pro tio mi devas meti la veron antaŭ vi.

'Ricevante tiun ĉi leteron, se vi taksas min netaŭga vin plu viziti, mi tute komprenus vin. Mi jam ŝuldas al vi pro via bonkoramo. Mi devas konfesi, ke mi ĝojos se vi ne lasos min. Se vi eĉ nun taksos min taŭga vin viziti, mi konsideros tion plua pruvo de via amo, kaj ĉiam provos meriti tiun amon.'

Legantoj komprenu, ke mi ne verkis tiun ĉi leteron fulme. Kiom da malnetaĵoj mi antaŭverkis! Sed pro la sendado de tiu ĉi letero, mi ege malpezigis la kapon.

Preskaŭ en la revenpoŝto mi ricevis la respondon de tiu vidvinfratino. Ŝi skribis:

'Mi ricevis vian leteron malfermkore verkitan. Ni ambaŭ ĝojis, kaj multe ridis. Via malvero ja pardonindas. Sed vi deklaris vian veran staton -- tio estas bona. Mia invito restas. Ni nepre atendos vin ventondimanĉe, aŭskultos viajn infanedziĝajn rakontojn, kaj ĝuos moketi vin. Restu certe, ke nia amikeco restos tia kia ĝi estis.

Tiel mi elsuĉis la venenon de la malvero en mi, kaj poste neniam timis paroli pri mia edziĝeco, ktp.

## **20. Enkonduko al la Religioj**

Mi jam estis loĝanta en Britujo unu jaron [Noto 1]. Intertempe mi konatiĝis du teozofoj. Ili estis fratoj kaj fraŭloj. Ili diskutis la Bagavadgiton (Giton) kun mi. Ili estis legantaj la tradukon de la Gito farita de Edwin Arnold [edŭin arnld]. Sed ili invitis min legi kun ili la Giton en la sanskrita. Mi hontis, ĉar mi ja ne legis la Giton aŭ en la sanskrita aŭ en la gepatra lingvo. Mi devis konfesi al ili, ke mi ja ne legis la Giton, sed ke mi nun estas preta legi ĝin kun vi. Mia praktiko de la sanskrita ankaŭ estis preskaŭ nulo. Mi nur povus kompreni ĝin tiomgrade, ke se ie fuŝas la traduko, mi povos senerarigi ĝin. Tiel mi eklegadis kun tiuj fratoj la Giton. Profunde frapis min la lasta verso de la dua ĉapitro:

Sensamaĵoj naskas la allogon, allogo la deziron  
Deziro vekas la pasion, kaj pasio la koleron  
Kolero kreas la stultecon, kaj stulteco la memorperdon  
Memorperdo detruas la menson, kiu sekvigas la memdetruon. [Noto 2]

Longe resonis la vortojn en miaj oreloj. Tiam mi konstatis, ke ja altvaloras la Gito. Tiu ĉi kredo pliprofondiĝis, kaj hodiaŭ mi taksas ĝin la plej bona verko por la scio de la vero. Dum tempo de malespero, tiu ĉi libro helpegis min preter takso. Mi jam legadis preskaŭ ĉiujn anglajn tradukojn de ĝi. Sed la tradukon de Edwin Arnold mi konsideras plej bona. Ĝi konservas la senton de la originalo, tamen ne aspektas tradukaĵo. Mi ne povas diri, ke mi tiam studis la Giton. Ĝi iĝis mia ĉiutaga studteksto nur multajn jarojn poste.

Tiuj fratoj igis min legi la vivon de la Budho (La Lumo de Azio) de Arnold. Ĝis tiam, mi sciis nur pri lia tradukado de la Gito (La Kanto Ĉiela). Mi ĝuis la vivon de la Budho eĉ pli ol lia Gito. Mi formetis la libron de miaj manoj nur post la tralegado.

Foje tiuj ĉi fratoj prenis min al la Loĝejo Blavatsky [blavatski]. Tie mi renkontis s-inon Blavatsky kaj s-inon Annie Besant [eni besent]. Nur lastatempe aliĝis s-ino Besant al la Socio Teozofa. Mi sekvis kun intereso la diskutojn en la tagĵurnaloj pri tio. La fratoj konsilis min aliĝi al la Socio. Mi ĝentile neis la proponon, dirante, 'Mia religioscio estas preskaŭ nulo, tial mi ne volas aliĝi al iu ajn grupo. Mi nebule



memoras, ke tiuj ĉi fratoj legis min la libro de s-ino Blavatsky, La Ŝlosilo de Teozofio. Pro tio naskiĝis la deziro legi librojn pri la hindua religio, kaj foriĝis de la menso tio kion mi aŭdis el la buŝoj de kristanaj preĝantoj, ke la hindua religio estas simple plene je superstiĉoj.

Tiutempe mi renkontis kristanon el Manĉestro. Li diskutis kun mi Kristanismon. Mi rakontis al li mian memoron de Raĝkot. Li bedaŭris. Li diris, 'Mi mem estas vegeterano. Mi ankaŭ ne drinkas alkoholaĵojn. Estas ja vero, ke multaj kristanoj manĝas viandon kaj drinkas; sed ne estas devo laŭ la religio fari ion el tiu du. Mi konsilas, ke vi legu la Biblion'. Mi konsentis. Li aĉetis por mi la Biblion. Mi svage memoras, ke tiu sinjoro mem vendis Bibliojn. Li vendis al mi Biblion plene je mapoj kaj indeksoj. Mi eklegis ĝin, sed mi tute ne povis legi la Malnovan Testamenton. Post la eklego de la Genezo mi ĉiam dormemadis. Mi memoras, ke nur por diri, ke mi jam legis la Biblion, mi senkomprene kaj senĝue penlegadis la ceterajn librojn. Al mi tute malplaĉis la libro 'Nombroj'.

Sed io tute male okazis ĉe la Nova Testamento. 'La Prediko sur la monto' de Jesuo havis ege bonan efikon sur mi. Mi ŝategis ĝin. La menso komparis ĝin kun la Gito. Tiu kiu postulas vian ĉemizon, donu al li ankaŭ vian mantelon. Tiu kiu frapas vian dekstran vangon, donu al li ankaŭ la maldekstran -- legante ĝin mi ĝojegis. Tiu memoris al mi la strofojn de Ŝamal Bhat. Mia knaba cerbo unuigis la Giton, la biografion de la Budho verkita de Arnold, kaj la diraĵojn de Jesuo. Mi konvinkiĝis, ke troviĝas la Dharmo en la sindonemo.

Pro tiu ĉi legado, mi ekemis legi la biografiojn de aliaj religiaj instruistoj. Amiko konsilis min legi la libron Herooj kaj la Heroadorado de Carlyle. Tie mi legis la mesaĝon de la Profeto Muhammad, kaj eksciis pri lia grandeco, kuraĝo kaj pena meditado.

Mi ne sukcesi paŝi preter tiu ĉi enkonduko al la religio. Mi ne povis trovi la tempon legi ion ajn krom la lernolibroj por la ekzameno. Sed mi jam decidis, ke mi devas legi religiajn librojn, kaj akiri konon de ĉiuj el la ĉefaj religioj.

Kaj kiel mi povis funkcii sen ia ajn scio de la ateismo? Ĉiuj baratanoj jam konas la nomon Bradlaugh [bredla]. Oni konsideris lin ateisto.

Tial mi legis libron pri li. Mi ne plu memoras la titolon. Tiu libro havis nenian efikon sur mi. Mi transiris la dezerton de la ateismo. Sino Besant famiĝis ankaŭ tiam. La fakto, ke ŝi iĝis kredantino de ateistino plu turnis min for de la ateismo. Mi jam legis la libron de sino Besant Kiel mi iĝis teozofino. Tiutempe mortis Bradlaugh. Li estis enterigita en la tombejo en la kvartalo Woking. Ankaŭ mi iris tie. Mi kredas, ke ĉiuj baratanoj en Londono venis. Ankaŭ venis multaj pastroj por honori lin [Noto 3]. Poste ni ĉiuj staris ie atendente trajnon. Tie, ĉampiona ateisto ekargumentadis kun unu el la pastroj:

"Nu, do, sinjoro, vi diras, ke ekzistas la dio, ĉu ne?"

Tiu modesta pastro respondis en mallaŭta voĉo, "Jes, tion mi ja diras."

Li ridis, kaj kvazaŭ ŝakmatante diris: "Sed, vi ja konsentas, ĉu ne, ke la cirklorando de la Tero estas 28.000 mejloj?"

"Certe."

"Do, diru bonvole, kiom altus la dio, kaj kie li loĝus?"

"Se ni komprenus, li loĝas en ambaŭ niaj koroj."

"Diru tion al la infanoj, mi petas," deklaris la batalanto, ĵetante triumfajn rigardetojn al la ĉirkaŭstarantoj. La pastro humile restis silenta. Pro tiu ĉi konversacio, al mi plu malplaĉis la ateismo.

## **21. Ramo: La forto de la malfortaj [Noto 1]**

Mi jes eksciis pri la hinduismo kaj la diversaj religioj de la mondo, sed tiom da scio simple ne sufiĉas por savi homon de la malfacilaĵoj. Homo tute ne scias tion kio lin savos dum la tempo de la malfacilaĵoj. Kiam ateisto estas savita, li diras, ke estis bonŝanco, ke tio okazis. En tiu situacio, kredanto dirus, ke la dio lin savis. Post la solvo de la afero, li supozas, ke pro la praktiko de la religioj, kaj lia propra spirita forto, la dio aperas en la koro. Li ja rajtas konkludi tiel. Sed dum la eliro de la malfacilaĵoj, li tute ne scias ĉu savis lin la spirita forto aŭ io alia. Ĉiu kiu fieras pri sia spirita forto, konas la ĝispolvigan humilecon de tiu spirita forto. En tia tempo, la religia scio aspektas tute sensenchava.

En Britujo, mi spertis la senutilecon de la religia scio. Eĉ antaŭe mi ja estas savita de tiaj ĉi malfacilaĵoj, sed mi ne povas analizi tiujn. Estus menciinde, ke tiam mi estis tre juna.

Sed nun mi estis 20 jara. Mi jam spertis la vivon de edzo kaj patro.

Laŭmemore en la fina jaro de mia resto en Britujo, t.e. en 1890, okazis kunsido de vegeteranoj en la urbo Portsmouth. Barata amiko kaj mi estis invititaj. Ni atingis la urbon. Nin gastigis virino.

Portsmouth estas konata urbo de marmilitistaro. Multaj domoj tie estas tiuj de virinoj de malstriktaĵoj moralaj. Efektive ne putinoj, sed ankaŭ ne tiom morale skrupulaj. Ni loĝis en unu el tiaj ĉi domoj. Tio ne signifas, ke oni nin loĝigis tie sciante la veron. Sed en havenurbo kiel Portsmouth, kiam oni serĉas domon por veturantoj, estas malfacile distingi inter bonaj kaj malbonaj domoj.

Noktis. Ni revenis de la kunsido. Post la vespermanĝo ekludadis la kartojn. Eĉ en la altklasaj hejmoj en Britujo, la dommastrino ofte kunludas kartojn kun la gastoj. Ĉiuj ja flirtas dum la kartludado. Sed la afero ĉi tie rapide iĝis pli danĝera. Mi ne sciis, ke mia kunulo adeptis en tiu ĉi arto. Ankaŭ mi ekĝuis la flirtadon. Mi pretiĝis iri de la parolo al la agado. La karto estis metitaj for. Sed Ramo envenis la menso de mia bona amiko. Li demandis, "Ho! De kie tiu malbono en vi? Tio ĉi ne estas via afero. Forkuru de ĉi tie!"

Mi hontiĝis. Vekiĝis. Korsentis ŝuldon al tiu amiko. Memoris la voton donitan al la patrino. Mi forkuris. Tremante mi atingis mian ĉambron. Forta korbataĵo. Mi sentis min kiel viktimo kiu ĵus eskapis de sia mortiganto.

Mi kredas, ke tiu ĉi estis la unua fojo, ke mi estis allogita de alia virino, kaj sentis deziron por ŝi. Mi ne povis dormi tiunokte. Mi estis atakita de diversaj pensoj. Ĉu mi lasu la domon? Forkuru? Kie mi estas? Se mi ne restos vigla, kio estos mia sorto? Mi decidis resti veka kaj klarvida. Mi decidis ne lasi la domon, sed kiel eble plej frue foriri de Portsmouth mem. Ĉiukaze, la kunsido finiĝus en du tagoj. Laŭmemore, mi foriris de Portsmouth dum la dua tago mem. Mia kunulo restis kelkajn tagojn plu en Portsmouth.

Tiutempe, mi sciis nenion pri la religio aŭ la dio, kaj kie li aperas en ni. Mi komprenis nur nebule, ke la dio savis min. Sed mi spertis tion ĉi en diversaj vivkampoj. Mi scias, ke pli bone nun mi ekkomprenas la frazon "La dio savis min". Sed mi samtempe komprenas, ke eĉ hodiaŭ mi ne konas la plenan valoron de tiu ĉi frazo. Nur per la vivsperto oni povas tion kompreni. Sed mi povas diri, ke en diversaj kuntekstoj -- spiritaj aferoj, juraj aferoj, en la funkciigado de institutoj, en la politiko -- "la dio savis min". Mi spertis, ke kiam ni perdas la esperon, kiam la manoj iĝas senmovaj, tiam, de ie aŭ alie, venas la helpo. La adorado, medito kaj preĝo ne estas iluzioj, male, ili estas pli veraj ol nia trinkmanĝado kaj nia sidado kaj marŝado. Efektive, ne estus troigo, diri ke nur ili estas la vero, ĉio alia malvero.

Tia ĉi medito, tia ĉi preĝo ne estas pure buŝa afero. Ĝia fonto ne estas la gorgo, sed la koro. Tial, se ni sukcesus atingi la purecon de la koro, harmonigi la korkordojn, la muziko kiu eliros de la koro estus vere ĉiela. Oni ne bezonus la langon. Ĝi estas mirindaĵo en si mem. Mi tute ne dubas, ke la preĝo estas vere efika por purigi la koron de la pasioj. Sed kunkune oni bezonas ankaŭ la plej grandan humilecon.

## **22. Narajan Hemcandr [Noto 1]**

Tiutempe vizitis Anglujon Narajan Hemcandr. Li jam estis por mi konata verkisto. Mi renkontis lin en la hejmo de la f-ino Manning de la Nacia Barata Asocio. F-ino Manning sciis, ke mi ne povis komforte babiladi kun ĉiuj. Kiam mi vizitis ŝin, mi sidadis kun buŝo fermita. Kaj nur parolis se iu min paroligis.

Ŝi enkondukis min al Narajan Hemcandr.

Narajan Hemcandr ne scipovis la anglan. Lia vestaĵo estis stranga. Maltaŭgaj pantalonoj. Kaj supre, ĉifita, migdalkolora mantelo, malpura ĉirkaŭ la kolo. Li surmetis nek kravaton nek kolumon. La mantelo estas laŭ la stilo de la Parsioj, sed tute fuŝfasona. Sur la kapo, kvasta, lana ĉapelo. Li havis longan barbon.

Maldika kaj malalta. Vizaĝo plene je variolmarkoj. Ronda vizaĝo. Nazo nek longa nek mallonga. Mano daŭre karesanta la barbon. Inter tiuj modaj, bonvestitaj homoj, Narajan Hemcandr estis stranga, eksterordinara figuro.

"Mi jam bone konas vian nomon. Eĉ legis kelkajn de viaj verkoj. Ĉu vi bonvole min vizitos?"

La voĉo de Narajan Hemcandr estis iom profunda. Ridetante, li respondis:

"Kie vi loĝas?"

"En la strato Store."

"Ho, ni do estas najbaroj. Mi devas lerni la anglan. Ĉu vi instruos min?"

Mi respondis, "Se mi povas iel vin helpi, mi estus ĝoja. Mi tutcerte provos, kiel eble plej mi povas. Se vi volas, mi povas viziti vin je via loĝejo."

"Ne, ne, mi venos al via hejmo. Mi ankaŭ posedas lernolibron. Mi kunportos ĝin."

Ni decidis la horon. Forta amikecligo kreiĝis inter ni.

Narajan Hemcandr tute ne sciis la gramatikon. Li verbigis "ĉevalon" kaj substativigis "kuri". Mi ja memoras multajn tian amuzajn ekzemplojn. Sed Narajan Hemcandr tute ne senesperigis. Li plue ne

estis imponita pro mia malriĉa scio de la gramatiko. Li simple ne estis embarasita pro sia nescio de la gramatiko.

"Malsame al vi, mi ne iris al la lernejo. Mi ne sentis la bezonon de la gramatiko por esprimi min. Diru, ĉu vi scipovas la bengalan? Mi jes ja. Mi vojaĝis tra la Bengallando. Estis mi kiu donis al la legantoj en Guĝarato la verkojn de Maharŝi Devendranath Thakur [Noto 2]. Mi volas doni al la guĝaratanoj tradukaĵojn de pluraj lingvoj. Tradukante, mi ne paŭsas la vortojn de la originalo, mi estas kontenta doni la sencon. Aliaj, post mi, povas doni pli. Sen la gramatiko, mi ankaŭ scipovas la marathan, la hindian, kaj nun ekscias la anglan. Mi nur bezonas vortstokon. Ne pensu, ke mi kontentiĝos nur kun la angla. Mi devas iri al Francujo, kaj lerni ankaŭ la francan. Mi ja scias, ke grandegas la franca literaturo. Se eblos, mi ankaŭ iros al Germanujo, kaj lernos la germanan."

Tia estis la vortfluo el Narajan Hemĉandr. Senlima estis lia deziro lerni lingvojn kaj vojaĝi.

"Vi do certe iros al Usono, ĉu ne?"

"Certe. Kiel mi povas reveni sen vizito al tiu nova mondo?"

"Sed vi ne posedas tiom da mono, ĉu ne?"

"Tute ne gravas. Mi ne bezonas la lukson kiun vi ĝuas. Kiom da mi bezonas por manĝi kaj vesti min? Sufiĉas por mi la iometo kiun mi gajnas per mia libroj, kaj la sumetoj kiujn amikoj donas al mi. Ĉie mi veturas per la tria klaso, ĉu ne? Al Usono mi iros en la ferdeko.

La simpleco de Narajn Hemĉandr estis unika. Ankaŭ similis lia pureco. Li eĉ ne estis tuŝita de aroganto. Sed pri sia lerto kiel verkisto, li havis troan memfidon.

Ĉiutage ni renkontiĝis. Kaj pense kaj kondute ni kongruis. Ambaŭ vegeteranoj. Ofte ni kune tagmanĝis. Tiu estis la tempo kiam mi vivtenis per 17 ŝilingoj, kaj kuiris mian manĝadon. Foje mi vizitis lian loĝejon, foje li la mian. Mi kuiris laŭ la angluja stilo. Sen barata manĝaĵo, li tute ne kontentiĝis. Nepre bezonis sian fabacosupon. Se mi kuirus karotsupon aŭ simile, li rigardis min kompatinde. Ie li eltrovis fazeolojn. Iutage, li kuiris fazeolan supon, kaj mi ege ĝin gustumis. Ekde tiam, nia interŝanĝado pli kreskis. Mi gustumigis al li miajn pladojn, kaj li al mi la siajn.

Tiutempe ĉiuj parolis pri kardinalo Manning. Okazis striko de la doklaboristoj. Pro la klopodoj de John Burns kaj kardinalo Manning la

striko solviĝis. Mi raportis al Narajn Hemĉandr tion kion diris Disraeli pri la simpleco de kardinalo Manning.

"Mi do devas renkonti tiun ĉi bonulon."

"Li estas eminentulo. Kiel vi renkontos lin?"

"Nu, aŭskultu do. Skribu leteron miaflanke. Enkonduku min kiel verkiston, kaj diru, ke mi persone volas renkonti lin por gratuli lin pri tiu ĉi lia bonfaro. Skribu ankaŭ, ke mi ne parolas la anglan, kaj do devas venigi vin kiel dulingvulon."

Tian ĉi leteron mi do verkis. Post du-tri tagoj venis karto de kardinalo Manning. Li specifikis la renduvuon.

Ni ambaŭ iris. Laŭkutime, mi vestis min per la formala vestaĵo. Sed Narajn Hemĉandr restis ĝuste tia kia li kutime estis. La sama mantelo kaj la sama pantalone. Mi moketis lin. Li bagateligis tion kion mi diris, kaj deklaris:

"Vi 'decaj' homoj ĉiuj estas timemuloj. Grandulo ne vidas la vestaĵojn de la aliaj. Li esploras la koron."

Ni eniris la palacon de kardinalo Manning. Lia domo ja estis palaco. Tuj post ni sidis, ege maldika, maljuna, alta viro eniris. Li manpremis nin. Bonvenigis Narajan Hemĉandr.

"Mi ne malŝparos vian tempon. Mi aŭdis pri vi. Mi volas esprimi ŝuldon al vi por la laboro kiun vi faris dum la striko. Mia kutimo estas salutrenkonti bonulojn tra la mondo, tial mi altrudis min al vi." Narajn Hemĉandra diris al mi, ke mi traduku tiujn ĉi frazojn.

"Mi feliĉas pro via vizito. Mi esperas, ke vi havos komfortan restadon, kaj vi ekkonatiĝos kun la homoj ĉi tie. La dio benu vin." Dirante tion ĉi stariĝis la kardinalo.

Iufoje, Narajan Hemĉandr venis al mia loĝejo vestita en la tradicia barata vestaĵo de dhoti kaj kurta. La bonkora domestrino malfermis la pordon, kaj vidante lin ektimiĝis. Ŝi venis al mi (legantoj memoru, ke mi ofte translokiĝis, kaj tiu ĉi domestrino neniam vidis Narajn Hemĉandr), kaj diris: "iu kvazaŭ-frenezulo volas renkonti vin." Mi iris al la pordo, kaj trovis Narajn Hemĉandr. Mi konsterniĝis. Sed sur lia vizaĝo troviĝis nenio krom afabla rideto.

"Ĉu la knaboj ne ĝenis vin?"

Responde, li diris: "Ili kuradis post mi. Mi tute ne ilin atentis, do ili kvietiĝis."

Post kelke da monatoj en Anglujo, Narajn Hemĉandr iris al Parizo. Tie li eklernis la francan, kaj ektradukadis francajn librojn. Mi scipovis sufiĉan francan por kontroli liajn tradukojn, li do petis min tion fari. Mi eltrovis ke tute ne temis pri tradukoj, nur pri la senctransdono.

Finfine li atingis sian celon viziti Usonon. Ege malfacile, li akiris bileton ferdekklasan aŭ triaklasan. En Usono, oni arestis lin pro lia 'nedeca vestaĵo' de la dhoti kaj kurta. Mi nebule memoras, ke poste li estis liberigita.



## **23. La Granda Ekspozicio**

En 1890 okazis granda ekspozicio en Parizo. Mi jam de longe estis leganta pri la preparoj por la evento. Krome, mi havis la deziregon vidi Parizon. Mi pensis, ke mi profitos duoble, se mi iros por vidi tiun ĉi Ekspozicion. Aparte alloga estis vidi la turon Eiffel. Tiu ĉi turo konsistas nur el la fero. Milfute altas. Antaŭ ĝia konstruo oni kredis, ke ne stariĝos konstruaĵo milfuta. En la Ekspozicio troviĝis multaj aliaj vidindaĵoj.

Mi legis, ke troviĝas en Parizo vegeterana manĝejo. Mi aranĝigis ĉambron tie. Veturante malkare, mi atingis Parizon. Restis sep tagoj. Vidis la vidindaĵojn plejparte piede. Mi posedis mapon kaj gvidlibron de la Ekspozicio. Per tiuj mi eltrovis la vojojn al la ĉefaj vidindaĵoj.

Krom la grandeco kaj diverseco de la Ekspozicio, mi memoras nenion pri ĝi. Ĉar sur la turo Eiffel mi grimpis du-tri foje, ĝin mi do memoras bone. Estis manĝejo en la unua etaĝo. Por fanfaroni, ke mi manĝis en loko tiom alta, mi malŝparis sep kaj duonan ŝilingojn.

Mi ankoraŭ memoras la malnovajn preĝejojn de Parizo. Oni ne povas forgesi ilian belecon kaj la trankvilon oni trovas en ili. Eĉ hodiaŭ mi ne forgesis la pentraĵojn kaj arĥitekturon de Notre Dame. Mi pensis tiam, ke tiuj kiuj elspezis centmilojn da rupioj por konstruigi tiajn ĉi ĉielajn templojn, sendube havis en la profundoj de siaj koroj, la diamon.

Mi legis multon pri la pariza modo, la vivstilo kaj la luksaĵoj tie. Ĉiustrate tiuj videblis. Sed tiuj ĉi preĝejoj aspektis tute aparte de tiu luksa vivo. Tuj post la eniro en la preĝejo, oni forgasas la ĥaoson eksteran. Ŝanĝiĝas la konduto de homoj. Ili iĝas pli afablaj. Ne okazas bruo tie. Iu kutime estas preĝanta antaŭ la statuo de la Virgulino Maria. Ĉio ĉi ne estas iluzio, ĝi estas esprimo de la koro -- jen la efiko kion ĝi havis sur mi tiam, kaj ek de tiu tempo mi eĉ pli konvinkiĝis pri ĝi. La adorantoj kiuj surgenue preĝis al la statuo de la Virgulino, ne preĝis al marmora ŝtono, sed al siaj imagaj povoj en ĝi. Farante tion ili tute ne malgrandigis la grandecon de la dio; male, ili grandigis ĝin. Tiel mi pensis tiam -- memoro kiun mi eĉ hodiaŭ nebule havas.

Necesas diri iomete pri la turo Eiffel. Mi ne scias kiel oni hodiaŭ uzas la turon. Vizitante la Ekspozicion, mi kompreneble legadis legaĵojn rilate al ĝi. En tiuj, mi legis kaj laŭdon kaj mallaŭdon de la turo. Laŭmemore, la ĉefa mallaŭdanto estis Tolstoj. Li skribis, ke la turo Eiffel estas signo de la stulteco de la homaro, ne la rezulto de ĝia scio. En sia verko, li diris, ke inter la diversaj ebriigaĵoj en la mondo, eble la plej malbona estas la tabako. La aŭdacon por fifaradoj, kiun eĉ ne la alkoholaĵo donas, la tabako donas. Freneziĝas la drinkanto, sed sur la menso de la fumanto ŝmiriĝas la fumo, kaj li sekve ekkonstruas ĉielajn kastelojn. Tolstoj argumentis, ke la turo Eiffel estis la rezulto de unu el tiaj ĉi pasioj.

La turo Eiffel estas tute sen belo. Oni ne povas diri, ke pro ĝi pli kreskis la allogeco de la Ekspozicio. Estis nova afero, granda afero, do miloj grimpis sur ĝi. Tiu turo estis ludilo por la Ekspozicio. Ju pli longe ni estas distreblaj, des pli longe ni estas infanoj -- tion ĉi bone pravas la turo. Jen eble la utileco de la turo.

## **24. Advokato, jes, sed kion poste?**

Pri tio kion mi iris al Anglujo por fari, mi ĝis nun ne diris multon. Nun, jam estas la tempo skribi ion pri tio.

Por iĝi advokato nepriiĝis du aferoj. Unu estis 'kompleti la periodon', t.e., ĉeesti la kortumsesiojn. Okazis kvar sesioj en jaro. En dek du tiaj ĉi sesioj oni ĉeestu. La dua afero estis fari la jurajn ekzamenojn. Ĉeesti la sesiojn fakte signifis ĉeesti formalajn vespermanĝojn. Efektive okazis ĉirkaŭ dudek kvar bankedoj en ĉiu sesio, kaj oni devis ĉeesti ses el ili. Ne necesis manĝi dum la bankedo; sed necesis ĉeesti je difinita horo, kaj sidi ĝis la fino de la manĝado. Ĉiuj kutime manĝadis, kompreneble. La manĝado plenis je gustaĵoj, kaj oni taksis la vinojn alte. Sed oni devis pagi. La sumo estis de du kaj duona ĝis tri kaj duona ŝilingoj; t.e., du aŭ tri rupioj. Tie oni konsideris tiun ĉi sumon malgranda, ĉar en hoteloj kostus tiom eĉ la alkoholaĵo. Kompare al la kosto de la manĝaĵo, por la drinkanto, pli altas la kosto de la alkoholaĵoj. En Barato ni -- se ni ne iĝos 'civilizitaj' -- povus surpriziĝi pri tio ĉi. Kiam mi unue vidis tion ĉi en Anglujo, mi estis ŝokita. Mi tute ne komprenis kiel homoj aŭdacus forĵeti tiom da mono por drinkado. Poste mi lernis kompreni! En la unuaj tagoj mi manĝis nenion en tiuj ĉi vespermanĝoj, ĉar por mi la manĝindaĵoj nur estis la pano, boligataj terpomoj kaj brasikoj. Unue ili ne plaĉis al mi, mi do ne manĝis. Poste, kiam mi ekgustumigis ilin, tiam mi kuraĝis akiri ankaŭ la aliajn.

La studentoj havis unu tipon de manĝado, kaj la estraro de la kolegio alian, pli riĉan. Unu el miaj kunstudentoj estis Parsio. Ankaŭ li iĝis vegeterano. Por propagandi vegeteranismon, ni du petis, ke oni donu al ni la taŭgaĵojn de la tablo de la estraro. Nia peto estis akceptata. Pro tio ĉi ni akiris fruktojn kaj legomojn de la tablo de la estraro.

Tute ne utilis al mi la alkoholaĵo. Oni disponigis du botelojn inter ĉiuj kvar homoj. Tial pluraj kvaropoj bezonis min. Mi ne drinkis, do la ceteraj tri povis malplenigi la du botelojn! Krom tio ĉi, ankaŭ okazis dum tiuj ĉi sesioj "Grandnoktoj". Tiutage krom la portero kaj ŝereo, akireblas ankaŭ la ĉampano. Oni taksis la ĉampanon tute alirange kompare kun la aliaj. Tial dum tiuj ĉi "Grandnoktoj" altiĝis mia prezo, kaj oni eĉ invitadis min ĉeesti la feston.

Kiel evoluiĝas la advokatumado pro tio ĉi festado -- jen afero kion mi tute ne komprenis: nek tiam, nek poste. Ja estis epoko kiam nur kelkaj studentoj ĉeestis la bankedojn, kaj okazis konversacio inter ili kaj la estraro, kaj eĉ oratorio. Ili lernis multon. Ĉu bone aŭ malbone, ili lernis ian civilizitan konduton, kaj la oratorion. Dum mia tempo, ĉio ĉi jam estis tute nebla. La estraro sidis for, en angulo, netuŝebla. Tiu ĉi tradicio havis nenian sencon en la nuna epoko. Tamen la kutimo daŭre restis en la pasintecamanta Anglujo.

La jura kurso estis facila. La advokatoj ŝerce nomiĝis 'bankedadvokatoj'. Ĉiuj sciis, ke la valoro de la ekzameno estis preskaŭ nulo. Dum miaj jaroj tie okazis du ekzamenoj: unu pri la romia kodo, kaj la alia pri la angluja leĝo. La libroj por tiu ĉi duparta ekzameno estis jam deciditaj. Sed apenaŭ iu ilin legis. Akireblis mallongaj 'notoj' pri la romia leĝo. Mi mem vidis homojn kiuj sukcesis en la ekzameno post dek kvin taga legado de tiuj notoj. La sama okazis ankaŭ ĉe la angluja leĝo. Ekzamendemandoj facilaj, ekzamenantoj malavaraj. Inter 95 ĝis 99 elcento sukcesis en la romia leĝo, kaj en la fina ekzameno, 75 elcento, aŭ eĉ pli. Malgrandis do la timo de malsukceso. Plue, la ekzameno okazis ne unufoje dum la jaro, sed kvarfoje. Tia ĉi oportuna ekzameno ne povis esti malfacilaĵo por iu ajn.

Sed mi igis ĝin malfacilaĵo. Mi decidis tralegi la originalajn librojn. Mi sentis, ke estus trompo ne legi ilin. Tial mi elspezis sufiĉe da mono por aĉeti la originalajn librojn. Mi decidis legi la romian kodon en la latina mem. Mi lernis la latinan por la angluja abiturienta ekzameno; tio pruviĝis utila ĉi tie. Tio ĉi studado ne senutiliĝis. En Sud-Afriko, la romia-nederlanda-kodo estis konsiderata la aŭtoritato. Por kompreni tion, mi trovis la studadon de Justinian [ĝastinijn] tre utila.

Mi povis kompleti la studadon pri la angluja leĝo post naŭ monatoj da sufiĉe peza laboro ĉar mi spezis multe da tempo legante la grandan, tamen interesan, libron de Brook [bruk] Common Law. Mi ĝuis Equity [ikviti] de Snell [snel], sed elĉerpis la energion por kompreni ĝin. Mi ĝuis kaj gajnis scion de la legindaĵoj en ĉefaj kazoj de White [vhait] kaj Tudor [tjudar]. Mi ankaŭ ĝuis la librojn de Williams [vilijamz] kaj Edwards [edvardz] pri la posedaĵo-leĝo kaj tiu de Goodeve [gudiv] pri la persona posedaĵo. Al mi ŝajnis eĉ romaneska la libro de Williams. Dum ĝia legado, mi tute ne perdis la intereson.

Revenante al Barato, kun ĝuste tiom da intereso mi legis la libron Hindu Law de Mayne [mein]. Sed mi ne parolos ĉi tie pri la leĝo en Barato. [Noto 1]

Sukcesante en la ekzamenoj, mi nomiĝis advokato je la 10a de Junio, 1891. Kontraŭ du kaj duona ŝilingoj mi enigis mian nomon en la Alta Kortumo de Anglujo je la 11a de Junio, kaj je la 12a de Junio mi ekvojaĝis al Barato.

Sed preskaŭ senlimiĝis mia deprimado kaj timo. Mi konstatis, ke mi ja studadis la leĝon, sed mi lernis tute nenion per kiu mi povis praktiki la profesion.

Sed mi bezonas apartan ĉapitron por priskribi mian staton.

## 25. Mia dilemo

Sufiĉe facilis iĝi advokato, sed malfacilis advokati. Mi jes legis la leĝaron, sed ne lernis praktiki la juron. Plaĉis al mi multaj juraj maksimumoj. Sed mi tute ne komprenis kiel oni uzu ilin en la profesio. "Uzu vian posedaĵon tiel ke, ne difektiĝu la posedaĵo de alia" -- jen maksimumo. Sed mi ne sukcesis kompreni kiel mi uzu ĝin por kliento. Mi jam konis la kazojn en kiu tiu ĉi maksimumo estis uzata. Sed mi ne lernis kiel uzi tiun ĉi maksimumon.

Krome, troviĝis eĉ ne aludeto al la barata leĝaro en la kodoj studataj. Mi sciis nenion pri la hindua kaj islama kodoj [Noto 1]. Kaj mi ne sciis kiel verki plendon. Mi ege ĝeniĝis. Mi jam aŭdis pri Pherozeshah [ferozŝa] Mehta. En la kortumo li blekadis leone. Kiel li lernis tiun ĉi arton en Anglujo? Certe en tiu ĉi vivo mi neniam povos akiri tian viklecon. Kaj mi akre ekdubis, ĉu mi eĉ povus gajni vivtenpovon per la profesio de advokato.

Jam komenciĝis tiu ĉi perplekso dum miaj jurstudjaroj. Mi parolis pri miaj problemoj kun kelkaj amikoj. Ili sugestis, ke mi prenu la konsilon de Dadabhai Naoroĝi [Noto 2]. Mi jam diris, ke mi posedis enkondukleteron al Dadabhai. Mi uzis tiun leteron malfrue. Kiel mi rajtis renkonti tian ĉi eminentulon? Se li prelegis ie, mi iris, kaj sidante en angulo, satigis la okulon kaj orelon. Por resti en kontakto kun studentoj, li eĉ starigis klubon. Mi iradis tie. Mi ĝojis, vidante lian zorgon por la studentoj, kaj ilia respekto por li. Finfine, mi kuraĝis doni al li mian enkondukleteron. Mi renkontis lin. Li jam diris al mi: "Se vi volas renkonti min kaj bezonas ian konsilon, nepre venu." Sed mi neniam trudis min al li. Mi konsideris ĝin peko forpreni lian tempon. Tial, mi ne povis sekvi la konsilon de mia amiko, kaj kuraĝi paroli kun Dadabhai pri miaj problemoj.

Aŭ tiu amiko aŭ iu alia konsilis min renkonti s-ron Frederick Pincutt [pinkat]. Li apartenis al la partio Konservativo. Sed li amis la baratanojn malavare. Li konsiladis multajn studentojn. Tial, mi verkis leteron al li, petante renkontiĝon. Li fiksis rendezvuon. Mi renkontis lin. Mi neniam forgesis tiun ĉi renkontiĝon. Li rilatis al mi kiel amiko. Li forridigis mian deprimon. "Ĉu vi kredas, ke ĉiuj bezonas iĝi Pherozeshah Mehta? Troviĝas nur unu-du Pherozeshah Mehta aŭ

Badruddin Tayabji [tajabĝi]. Vi komprenu, ke por iĝi ordinara advokato, oni vere ne bezonas tiom da inteligento. Oni facile praktikus la profesion de la advokato per komuna saĝo kaj laboremo. Ne ĉiuj kazoj estas komplikaj. Diru, tamen, ion pri via ĝenerala legado."

Kiam mi parolis pri la libroj kiujn mi legis, mi vidis, ke li iom malkontentiĝis. Sed nur pormomente. Li tuj ekridis, kaj diris:

"Nun mi komprenas vian malfacilon. Via legado pri ĝeneralaj aferoj estas tre malmulta. Vi scias nenion pri la mondo. Sen tiu scio, oni ne povas advokati. Vi eĉ ne legis la historion de Barato. Advokato nepre bezonas scion de la homa naturo. Li devos taksi homon per rigardo de lia vizaĝo. Plue, ĉiu baratano nepre sciu la historion de Barato. Ĝi ne rilatas al la advokata profesio, sed vi devas scii ĝin. Mi rimarkas, ke vi ankaŭ ne legis la libron de Kaye [ke] kaj Malleson [melesan] pri la ribelo de 1857. Vi tuj tralegu ĝin, kaj legu la du librojn kies nomojn mi donos al vi kun la celo de akiro de homo-scio." Dirante tion, li skribis la titolojn de la libroj de Lavator [levetar] kaj Shemmelpennick [ŝemelpenik] pri la fiziognomiko.

Mi estis ege dankema al tiu ĉi maljuna amiko. Kun li pormomente tute foriĝis mia timo. Sed lasante lin, mia timo tuj rekomenciĝis. Ripetante, ke mi devas lerni taksi homojn per iliaj vizaĝoj, kaj pensante pri tiuj libroj mi atingis mian hejmon. La posta tago, mi aĉetis la libron de Lavator. Mi ne trovis la libron de Shemmelpennick en tiu vendejo. Mi legis la libron de Lavator sed trovis ĝin eĉ pli malfacile ol tiu de Snell. Ĝi apenaŭ interesis min. Mi studis la vizaĝon de Ŝekspiro. Sed neniel kapablis identigi la Ŝeskirojn en la stratoj de Londono.

De la libro de Lavator, mi lernis nenion. Malmulte mi rekte gajnis de s-ro Pincutt, sed trovis lian amikecon ege valora. Mi longe memoris lian rideman kaj afablan vizaĝon. Mi fidele memoris liajn vortojn, ke por advokati, oni ne bezonas la inteligenton aŭ memoropovon de Pherozeshah Mehta; oni glate funkcias per la komuna saĝo kaj la laboremo. Tiujn ĉi kvalitojn mi jes posedis en sufiĉe granda kvanto. Tial reesperigis iomete la koro.

La libro de Kaye kaj Malleson mi ne sukcesis legi en Anglujo. Sed decidis legi ĝin kiel eble plej baldaŭ. Tiun deziron mi povis plenumi en Sud-Afriko.

Tiel, kun iomete da espero en mia ĝenerala malesperiĝo, mi elŝipiĝis en Mumbajo de la ŝipo Assam. La maro en la haveno estis maltrankvila, mi do devis atingi la kajon per ŝalupo.



# Dua Parto

## 1. *Rajcandbhai*

En la lasta ĉapitro mi diris, ke la maro en la mumbaja haveno estis ŝtorma. Oni ne konsideras tiun surpriza por la hinda oceano dum Junio kaj Julio. Jam de Adeno la maro estis tia. Ĉiuj estis marmalsanaj, nur mi estis tute sana. Mi staris sur la deko por vidi la ŝtormon. Eĉ malsekiĝis. Nur unu-du de ni pasaĝeroj ĉeestis la matenmanĝon. Por manĝi la avenkaĉon, ni devis meti la bovlon en la sino, alie, la avenkaĉo mem faliĝus en la sino!

Mi kredas, ke tiu ŝtormo estis simbolo de mia interna ŝtormo. Sed same kiel mi povis resti trankvila malgraŭ la ekstera ŝtormo, mi ankaŭ povas diri la saman pri la ena ŝtormo. La afero de mia kasto kompreneble restis. Mi jam skribis pri miaj zorgoj pri mia profesio. Krom tiuj, ĉar mi estis reformemulo, mi planis plurajn reformprojektojn. Mi ankaŭ pensadis pri ili. Kaj naskiĝis kelkaj aliaj zorgoj neantaŭviditaj.

Mi maltrankvilege atendis la renkonton kun la patrino. Kiam ni atingis la kajon, la plej aĝa frato kompreneble estis tie. Li jam ekkonatigis sin al d-ro Mehta kaj lia frato. D-ro Mehta petis, ke mi loĝu kun li; tial ili venigis min tie. Tiel, rilato kiu formiĝis en Anglujo, daŭre restis en Barato, kaj fortiĝante difuziĝis tra niaj familioj.

Mi sciis nenion pri la forpaso de la patrino. Oni informis min kiam mi atingis la hejmon, kaj banigis min. Oni povintus doni la informon al mi en Anglujo, sed por malgrandigi la ŝokon, la plej aĝa frato decidis ne doni ian ajn informon pri tio ĉi ĝis mi atingis Mumbajon. Mi volas vuali mian doloron. Kompare al la morto de la patro, la morto de la patrino dolorigis min multe pli. Multegaj de miaj revoj vaporiĝis. Sed mi memoras, ke aŭdante pri tiu ĉi morto, mi ne ploregis. Mi eĉ sukcesis haltigi la larmojn, kaj mi komencis mian ĉiutagan laboron kvazaŭ ne okazis la morto de la patrino. [Noto 1]

Inter la homoj kiujn mi renkontis en la hejmo de d-ro Mehta, mi nepre devas priskribi unu. Lia frato, Revaŝankar Ĝagĝivan, efektive iĝis mia intima amiko. Sed tiu kiun mi volas priskribi estas la poeto Rajcand aŭ Raĝcandr. Li estis la bofilo de la pli aĝa frato de d-ro Mehta, kaj ankaŭ partnero en la juvelista firmao de Revaŝankar Ĝagĝivan. Tiutempe li ne estis pli ol 25 jaraĝa. Tamen, eĉ dum la unua

renkontiĝo, mi konstatis, ke li estas homo bonkarakterata kaj klera. Li estis ŝatavadhano (laŭlitere, 'centprizorganto' --homo kiu kapablis prizorgi samtempe cent aferojn). D-ro Mehta volis, ke mi vidu ekzemplon de tiu centopa prizorgado. Mi malplenigis mian stokon de vortoj de diversaj lingvoj, kaj la poeto recitis ilin en ĝuste la ordo en kiu mi ilin diris! Mi enviis lin, sed tamen ne estis sorĉita de tiu ĉi kapablo. Tion kio min sorĉis mi fakte renkontis poste. Kaj tio estis lia vasta kono pri la sanktaj skriboj, lia pura karaktero, kaj lia senĉesa klopodo vizaĝ-al-vizaĝe vidi la dion. Poste mi informiĝis, ke li estis spezanta sian tutan vivon nur por tiu memkonstato:

Ridludante, la dion en ĉio se mi vidis

Sukcesa la vivon mi taksos

La majstro de Muktanand ja estas la dio

Kaj ankaŭ lia viva fadeno.

Tiu ĉi diraĵo de Muktanand estis ne nur sur liaj lipoj, sed ankaŭ estis ĉizita en lia koro.

Li mem faris komercon de miloj da rupioj, taksis juvelojn kaj perlojn, solvis la problemojn de la komercado, sed ĉiuj ĉi ne estis lia celo. Lia celo -- la centro de lia vivo -- estis vidi la dion. Nepre troviĝis sur lia matraco iu religia libro kaj lia taglibro. Tuj post la konkludo de komerca afero, malfermiĝis la religia libro aŭ la taglibro. Lia verkaro, kiu estis eldonita, plejparte venas de tiu ĉi taglibro. Homo kiu faras komercadon de centmiloj da rupioj, kaj tuj poste ekskribas profundajn aferojn pri la memkonscio, tute ne apartenas al la tribo de la komercistoj, sed al tiu de la puraj intelektuloj. Tion pri li mi rimarkis, ne unufoje sed plurfoje. Mi neniam vidis lin en la stato de la memforgesado. Estis nenia egoisma ligo inter ni. Ni tamen iĝis ege intimaj. Tiutempe mi estis senmona advokato. Sed kiam ajn mi vizitis lin en la vendejo, li parolis pri nenio krom aferoj religiaj kaj spiritaj. Malgraŭ la fakto, ke tiam mi mem ne sciis klare mian vojon; mi eĉ ne povas diri, ke mi havis ĝeneralan intereson pri la religia diskutado; mi tamen aŭskultis ĝuoplene la religian diskutadon de Rajĉandbhai. Poste mi renkontis multajn religiajn gvidantojn kaj instruistojn. Mi provadis renkonti la gvidantojn de ĉiu religio. Sed tiel stampis min Rajĉandbhai, kiel neniun alian sukcesis fari. Pluraj de liaj diraĵoj rekte tuŝis mian koron. Mi respektis lian intelekton. Ankaŭ por lia sincereco mi havis saman estimon. Tial mi sciis, ke li neniam misgvidos min

volonte, kaj diros nur tion kion li pensas. Tial dum la tempo de mia spirita krizo, mi iris al li por rifuĝo.

Malgraŭ la estimo por Rajĉandbhai, mi ne povis nomi lin mia guro. Ja ankoraŭ daŭras tiu mia serĉo.

Mi kredas je la graveco kiun donas la Hinduismo al la rolo de la guro. Estas multe da vero en la diraĵo 'Ne eblas la scio sen la guro'. Por ĉiutagaj aferoj, oni povas funkcii per neperfekta instruisto, sed neperfekta gvidanto tute ne utilis por la spirita scio. Nur la perfekta sciinto rajtas esti nomata la guro. La sukceso kuŝas en la serĉo mem ĉar la studento trovas la guruon ĝuste laŭ sia merito kaj kapablo. Tio ĉi signifas, ke ĉiu serĉanto rajtas senĉese strebi atingi tiun kapablon, kaj la frukto de tiu strebado restas en la manoj de la dio.

Sume, malgraŭ ke mi ne sukcesis fari Rajĉandbhai la sinjoron de mia koro, mi tamen gajnis multon pro lia helpo, kiel ni vidos poste. Sufiĉas ĉi tie diri, ke tri samtempuloj havis profundan influon en mia vivo: Rajĉandbhai pro sia vivanta kontakto; Tolstojo pro sia libro La Regno de la Dio estas en Vi; kaj Ruskin pro sia Unto This Last. Sed mi parolos pri tiuj ĉi aferoj en iliaj ĝustaj lokoj.

## 2. *Mondeniro*

La plej aĝa frato havis grandajn esperojn por mi. Li estis avida pri la mono, la famo, kaj altranga posteno. Lia koro estis reĝa. Lia malavaro venigis lin ĝis la limo de la nenecesa monmalŝparo. Tial kaj pro sia naiveco, li facilege amikiĝis. Pro la helpo de tiu ĉi amikaro, li planis akiri procesojn por mi. Li ankaŭ supozis, ke mi gajnos multe da mono, tial li jam altigis la hejman elspezon. Li faris ĉion farendan por prepari la kampon de mia praktiko.

Intertempe daŭriĝis la kverelo en mia kasto. Ili dividiĝis en du grupoj. Unu tuj akceptis min en la kaston. La alia obstine rifuzis. Por plaĉigi la grupon kiu akceptis min, antaŭ ol ni iris al Raĝkot, la frato prenis min al Nasik, kaj tie mi banis min en la sankta rivero. En Raĝkot, ni aranĝis kastan kunmanĝadon.

Mi tute ne interesiĝis pri tiu ĉi afero. La frato ja amis min. Kaj mia estimo por li estis same alta. Tial, konsiderante lian deziron ordono, mi maŝine plenumis lian volon. La problemo pri la kasto tiel solviĝis.

En la grupon kiu bojkotis min, mi neniam provis reeniri, nek sentis malamon al iuj el la gvidantoj de la kasto. Inter ili ankaŭ troviĝis tiuj kiuj tute malŝatis min. Mi traktis ilin ĝentile. Mi tute respektis la bojkotrilatajn leĝojn de la kasto. En la hejmo de la bopatroj aŭ tiu de la fratino, mi eĉ ne trinkis la akvon. Eĉ se ili estis pretaj doni la akvon al mi kaŝe, mi ne konsentis fari tion kaŝe kion mi ne povus fari malkaŝe.

La rezulto de tiu ĉi mia konduto estis, ke la kastanoj neniam ĝenis min. Eĉ hodiaŭ unu sekcio de la kasto konsideras min ekskomunikita. Tamen, mi ricevis respekton kaj afablon de ili. Ili eĉ helpis min en mia kariero, sen ia atendo, ke mi faru ion por la kasto. Mi kredas, ke tiu ĉi dolĉa frukto estas la rezulto de mia nerezisto. Se mi estus baraktanta reaniĝi en la kasto, provanta krei pliajn grupojn, mokanta kaj provokanta la kastanojn, ili certe kontraŭus min kaj anstataŭ resti neŭtrala kaj senmakula post mia reveno de Britujo, mi estus trovinta min en la reton de agitado kaj nur iĝus kreskanto de la malvero.

La rilato kun la edzino ankoraŭ ne estis tia kia mi deziris. Eĉ forirante al Britujo mi ne sukcesis forigi mian ĵaluzon. En ĉiu afero mi restis

same kritikema kaj suspektema. Tial mi ne povis realigi miajn revojn. La edzino ja devas scii legi kaj skribi. Mi volis mem instrui ŝin, sed mia amoravido tute malpermesis la taskon, kaj mi direktis al la edzino la koleron de tiu mia malforto. Unufoje mi eĉ forsendis ŝin al la boparencoj, kaj konsentis reakcepti ŝin nur post ega ĝenigo. Poste mi ekkonstatis, ke temas pri pura stulteco mia.

Ankaŭ la edukon de la infanoj mi volis plibonigi. Estis la filoj de la plej aĝa frato, kaj ankaŭ mi lasis filon kiu nun kvarjariĝis. Mi volis ekzercadi ilin, pliforti iliajn korpojn, kaj kreskigi ilin kun mi. En tiu ĉi projekto mi havis la subtenon de la frato. Mi eĉ sukcesis iomete en tiu ĉi afero. Al mi ege plaĉis esti kun la infanoj, kaj la kutimo ŝercadi kun ili restas ĉe mi. Jam de tiam mi konvinkiĝis, ke mi povas bone fari la edukadon de infanoj.

Estis klare, ke ankaŭ niaj manĝkutimoj bezonis plibonigadon. La teo kaj la kafo jam trovis lokon en la hejmo. La plej aĝa frato kredis, ke antaŭ ol ke mi revenu de Britujo, kelke da 'britaj' aferoj devas unue eniri la hejmon. Tial, ĉinaj porcelanaĵoj, la teo, kaj ceteraj -- aferoj kiuj antaŭe estis uzataj nur kiel medikamento kaj por 'civilizaj' gastoj -- estis ekuzataj por ĉiuj. En tia ĉi atmosfero, mi enkondukis miajn 'plibonigaĵojn'. La avenkaĉo venis en la hejmon; anstataŭ la teo kaj kafo, oni ekuzis la kakaon. Sed tiuj ĉi ŝanĝoj estis nur supraĵaj -- al la teo kaj kafo aldoniĝis la kakao. La ŝuoj kaj ŝtrumpetoj jam eniris la hejmon. Per la palto kaj la pantalono mi purigis la hejmon!

Tiel plialtiĝis la elspezoj. Novaj aĵoj ĉiutage. Ni sukcesis ligi ĉe nia pordo blankan elefanton. Sed kiel gajni la monon? Se mi tuj eklaborus en Raĝkot, oni ridegus. Mi sciis malmulton eĉ ol advokato kiu sukcesis en la ekzameno en Raĝkot, kaj jen plue mia pretendo demandi honorarion dekoblan! Kiu stulta kliento donus laboron al mi? Kaj eĉ se mi trovus tian ĉi stultulon, ĉu mi aldonu al mia nescio arogantecon kaj trompadon, kaj tiel pligrandigu mian ŝuldon al la mondo?

La amikoj konsilis, ke mi iru por kelke da tempo al Mumbajo por gajni sperton en la altkortumo, kaj studu la juron baratan. Kaj se eblas, fari proceson. Mi ekiris al Mumbajo.

Tie mi ekloĝis. Dungis kuiristo. Li estis pli-malpli same nekompetenta kiel mi. Bramano. Mi neniam traktis lin kiel serviston. Tiu ĉi bramano

banis sin sed ne purigis sin. Malpura dhotio, malpura sanktafadeno. Li havis preskaŭ nenian rilaton kun la sanktaj libroj. Sed de kie akiri pli bonan kuiriston?

"Do, Raviŝankar (tiel li nomiĝis), vi ne kapablas kuiri, sed kio pri la religiaj devoj?"

"Kion diri, mia frato, la plugilo estas mia religia devo, kaj la ŝpato mia fuŝa adorato. Tia ĉi bamano mia Ramo ja estas [Noto 1]. Se tia kia vi plutenus min, mi restos, alikaze ja restas la terkultivado."

Mi komprenis. Mi devas iĝi la instruisto de Raviŝankar. La tempon mi abunde havis. Duonon kuiris Raviŝankar; duonon mi. Mi komencis la dietajn eksperimentojn vegeteranismajn pri kiuj mi lernis en Britujo. Aĉetis kuirfornon. Mi mem tute ne kredis je la baroj pri interkasta kunmanĝado. Ankaŭ Raviŝankar ne tion kontraŭis. Tial ni senprobleme amikiĝis. La nura kondiĉo -- aŭ problemo, nomu ĝin laŭvole -- estis, ke Raviŝankar votis ne rompi la ligon inter si kaj la malpuro, kaj zorge konservi la kuirejon nepura!

Sed mi ne povis resti en Mumbajo pli ol tri-kvar monatoj ĉar daŭre kreskis la elspezoj kaj tute ne estis ia ajn enspezo.

Tiel mi eniris la mondon. Ekĉagrenis min la advokateco. Multe da pavado, malpli da kapablo. Mi estis premegita pro la respondecoj.

### **3. La Unua Proceso**

En Mumbajo komenciĝis unuflanke mia leĝstudado, kaj duaflanke daŭriĝis miaj dietaj eksperimentoj, kaj en tiuj iĝis parto amiko Virchand Gandhi. Je la tria flanko, la frato ekserĉis procesojn por mi.

Malrapide iris la leĝstudado. Mi simple ne sukcesis lerni la civilan proceduran kodon. Pli glate iris la studado de la atestaĵa akto. Virchand Gandhi estis studanta por iĝi notario. Tial li havis multon por diri pri la advokatoj. "La klereco de Pherozechah Mehta kuŝas en lia profunda scio de la leĝo. Li parkere konas la Atestaĵan Akton. Li scias ĉiun proceson sub sekcio 32. La klereco de Badruddin Tyabji estas tiom impona, ke eĉ juĝistoj rigardas lin kun timo. Lia povo argumentadi estas eksterordinara."

Ju pli mi aŭdis pri tiuj ĉi granduloj des pli grandiĝis mia timo.

Li diris, "tute ne estas konsiderata surprize vegeti 5-7 jarojn kiel advokaton. Tial mi decidis iĝi notario. Eĉ tri jarojn poste, se vi sukcesos gajni sufiĉe da mono por egali viajn elspezojn, oni devus deklari, ke vi jam progresis multe."

Plialtiĝis la elspezoj ĉiumonate. Ekstere meti ŝildon advokatan, ene studadi por iĝi advokato! Mia cerbo tute ne sukcesis kongrui la du aferojn. Tial la leĝstudado okazis malatentige. Mi jam diris, ke mi ekinteresiĝis pri la atestaĵa akto. Mi legis la Hindu Law de Mayne kun granda intereso, sed ne gajnis la kuraĝon fari proceson. Al kiu diri mian malĝojon? Mia situacio similis al tiu de la nova bofilino kiu iris al la bopatra hejmo!

Intertempe mi akiris proceson de Mamibai. Mi devis iri al la Kortumo de Malgrandaj Kaŭzoj. Oni diris al mi, ke mi devos pagi procentaĵon al la varbistaĉo. Mi tute rifuzis.

Sed eĉ la fama kriminala advokato S-ro Iu..., kiu gajnas 3-4 mil rupiojn ĉiumonate, eĉ li pagas la procentaĵon."

Kial mi rivalu lin? Sufiĉus por mi se mi gajnus 300 rupiojn ĉiumonate. La patro ne gajnis pli ol tio."

Se jam pasis tiu epoko. Grandas la elspezoj en Mumbajo. Vi devas esti pli komerca."



Mi estis obstina. Mi tute ne donis procentaĵon, tamen akiris la proceson de Mamibai. Estis facila proceso. Mia pago estis 30 rupioj. Mi taksis ĝin unutaga afero....

Tiu ĉi estis mia debuto en la Kortumo de Malgrandaj Kaŭzoj. Mi aperis flanke de la defendanto, kaj do devis predemandadi la atestantojn de la plendinto. Mi staris, sed la koro sinkiĝis ĝis la botoj. Mi havis kapturon, kaj sentis, ke ankaŭ turniĝas la tuta kortumo. Mi tute ne povis pensi kion demandi. La juĝisto sendube ridis, kaj la advokatoj ĝuis la spektaklon. Mi sidis, ke diris al la agento, ke mi ne povos fari la proceson. Oni dungis s-ron Patel por 51 rupioj. Por li, kompreneble, la proceso estis infanludo.

Mi forkuris de la kortumo ne sciante ĉu aŭ ne mia kliento ĝajnis sian proceson. Mi hontis, kaj decidis ne plu fari procesojn ĝis mi havos la kuraĝon fari ilin. Efektive, mi ne denove eniris la Kortumon ĝis mi iris al Sudafriko. Estis nenia virto en mia decido. Mi simple faris virton el neceso. Neniu estus tiel stulta doni sian proceson al mi, nur ke mi malgajnu ĝin!

Sed estis plia proceso por mi en Mumbajo. Mi devis verki memorandon. En mia naskiĝurbo Porbandar, oni forprenis la terpecon de malriĉa islamano. Li venis al mi ĉar mi estis konata filo de konata patro. Lia proceso ŝajnis malforta, sed mi konsentis verki memorandon por li, kondiĉe, ke li pagu la koston de la presado. Mi verkis ĝin, kaj laŭtleĝis ĝin al amikoj. Ili aprobis ĝin, kaj tio iomgrade kuraĝigis min, ke mi estis kvalifikita verki memorandojn, kion mi ja estis.

Mia laboro florus, se mi estus verkanta memorandojn senpage. Sed tio ne metus la panon sur la tablon. Tial mi ekpensis labori kiel instruisto. Mia kono de la angla lingvo estis sufiĉe bona, kaj mi ja ŝategus instrui la anglan al abiturientiĝantoj en iu lernejo. Tiel mi povus kovri almenaŭ parton de miaj elspezoj. Mi vidis reklamon en la tagĵurnaloj: "Anglalingva instruisto bezonata por instrui unu horon ĉiutage. Salajro: 75 rupioj." Estas reklamo de fama altlernejo. Mi iris tie kun memfido, sed kiam la estro eltrovis, ke mi ne estis bakalaŭro, pardonpetante li malakceptis min.

'Sed mi sukcesis en la Londona Abiturienta Ekzameno kun la latina kiel mia dua lingvo.'

'Prave, sed ni bezonas bakalaŭron.'

Nenio farebla tie. Mi malesperiĝis. Ankaŭ ĝeniĝis la frato. Ni ambaŭ konkludis, ke estas senutile resti pli longe en Mumbajo. Mi loĝadu en Raĝkot, kie la frato, advokato, povus doni al mi iom da laboro verki peticiojn kaj memorandojn. Kaj ĉar jam troviĝis hejmo en Raĝkot, la fermado de tiu en Mumbajo signifus grandan ŝparon. Al mi plaĉis la sugesto. Mia eta afero tiel fermiĝis post sesmonata restado en Mumbajo.

Mi ĉeestis la Altan Kortumon ĉiutage en Mumbajo, sed mi ne povas diri, ke mi lernis ion ajn tie. Mi ne posedis sufiĉe da kono lerni multon. Ofte, mi povus komprenis la procesojn kaj dormetis. Estis aliaj, kiuj estis kunuloj en tio ĉi, kaj tiel, malgrandiĝis la pezo de mia honto. Post iom da tempo, mi eĉ perdis tiun senton de honto, kaj ekkredis, ke estis moda ekdormeti en la Alta Kortumo.

Se ankaŭ la nuna generacio havas siajn senlaborajn advokatojn en Mumbajo, mi donus al ili iom da praktika konsilo pri la loĝado tie. Kvankam, mi loĝadis en Girgaum, mi preskaŭ neniam prenis kaleŝon aŭ tramon. Mi faris regulon piedmarŝi ĝis la Altan Kortumon. Plene 45 minutojn mi marŝis, kaj kompreneble ankaŭ ĉiam revenis hejmen piede. Mi povis facile toleri la varmecon de la suno. Tiu ĉi marŝado al kaj de la Kortumo sparis sufiĉe da mono, kaj kiam multaj amikoj en Mumbajo malsaniĝis, mi ne memoras, ke mi malsaniĝis eĉ unufoje. Eĉ kiam mi ekgajnis la monon, mi daŭrigis la praktikon marŝi al kaj de la oficejo, kaj eĉ nun rikoltas la bonojn de tiu praktiko.

## 4. *La Unua Ŝoko*

Malesperiĝinte, mi lasis Mumbajon kaj iris al Raĝkot kie mi starigis propran oficejon. Ĉi tie mi properis sufiĉe bone. Verkante peticiojn kaj memorandojn, mi ganis meze, 300 rupiojn ĉiumonate. Por tiu ĉi laboro mi devis danki influon anstataŭ propra kapablo, ĉar la partnero de la frato havis establitan praktikon. Ĉiuj peticioj, ktp, kiuj vere estis, aŭ laŭ lia takso estis gravaj, li sendis al la grandaj advokatoj. Al mi venis la peticioj kiujn mi devas verki por liaj malriĉaj klientoj.

Mi devas konfesi, ke ĉi tie mi devis kompromisi la principon ne doni procentaĵon, kion en Mumbajo mi tiom skrupule observadis. Oni diris al mi, ke la kondiĉoj en la du kazoj estis malsimilaj; ke en Mumbajo oni devis pagi la varbistaĉojn, sed ĉi tie, oni pagu la advokatojn kiuj sendis la proceson; kaj ke ĉi tie, same kiel en Mumbajo, ĉiuj advokatoj, senescepte, pagis procentaĵon de sia pago. La argumento de la frato estis por mi nekontraŭebla. 'Vidu,' li diris, 'mi estas en partnereco kun alia advokato. Mi ĉiam emus sendi al vi ĉiujn procesojn kiujn vi povas trakti, kaj se vi rifuzas pagi procentaĵon al la partnero, vi certe embarasus min. Ĉar vi kaj mi havas kunan oficejon, via pago venas al nia komuna monujo, kaj mi aŭtomate ĝuas dividon. Sed kio pri mia partnero? Se li donus la saman proceson al iu alia advokato, li certe gajnus procentaĵon de li.' Mi konvinkiĝis pro tiu lia argumentado, kaj sentis, ke se mi devas partiki kiel advokaton, mi ne povus insisti pri mia principo pri la procentaĵoj en tiaj ĉi kazoj. Jen tiel kiel mi argumentadis kun mi mem, aŭ se diri rekte, kiel mi trompis min. Mi aldonu, tamen, ke mi ne memoras, ke mi iam ajn donis procentaĵon kadre de iu ajn alia proceso.

Tiel, malgraŭ ke mi ekgajnis sufiĉe da mono, mi ricevis la unuan ŝokon de mia vivo ĉirkaŭ tiu ĉi tempo. Mi jam aŭdis pri britaj oficialuloj, sed ĝis nun neniam vizaĝ-al-vizaĝe renkontis iun.

La frato estis la sekretario kaj konsilinto al la reĝo de Porbandar antaŭ ol li surtroniĝis, kaj pendante sur lian kapon estis la akuzo, ke li donis malĝustan konsilon kiam li estis en tiu posteno. La afero nun atingis la Politikan Agenton kiu jam havis antaŭjuĝon kontraŭ la frato. Mi konis tiun ĉi oficialulon kiam mi estis en Anglujo, kaj mi povas diri, ke li estis sufiĉe amikema al mi. La frato pensis, ke mi devas uzi tiun ĉi

amikecon, kaj provi forigi la antaŭjuĝon de la Politika Agento. Al mi tute ne plaĉis la ideo. Mi kredis, ke mi ne provu gajni avantaĝon de mallonga konateco en Anglujo. Se vere kulpis la frato, kion utilis mia rekomendo? Se li estis senkulpa, li devintus submeti peticion laŭ la propra maniero, kaj memfide alfronti la rezulton. Ne multe plaĉis al la frato tiu mia konsilo. 'Vi ne konas Kathiawad,' li diris, 'kaj vi ankoraŭ bezonas scii pli pri la mondo. Nur gravas ĉi tie la influo. Ne estas dece, ke vi, frato, ne plenumu vian devon, kiam vi klare povas diri bonajn vortojn pri mi al oficialulo kiun vi konas.'

Mi ne povis rifuzi lin, kaj do iris, tute nevolonte, al la oficialulo. Mi sciis, ke mi ne rajtas peti lin, kaj estis tute konscia, ke mi estis kompromisanta la memrespekton. Sed mi petis intervjuon, kaj akiris ĝin. Mi memorigis lin pri nia malnova konateco, sed tuj vidis, ke Kathiawad kaj Anglujo estis malsamaj; ke oficialulo kiu estis ferianta ne estis oficialulo plenumanta sian devon. La Politika Agento rekonis la konatecon, sed mia memorigo ŝajne plifirmigis lin. 'Ĉu vi do venis por misuzi tiun konatecon?' ŝajnis la demando skribita sur lia frunto. Mi tamen malfermis mian argumenton. La mastro estis nepacienca. 'Via frato estas komplotinto. Mi volas aŭdi nenion plu de vi. Mi ne havas la tempon. Se via frato havas ion por diri, li petu tra la ĝusta vojo'. Sufiĉis la respondo, kaj eble estis meritita. Sed blindas la malsindonemo. Mi daŭre parolis pri mia peto. La mastro ekstaris, ke diris, 'Vi devas nun iri.'

'Sed permesu, ke mi finu tion kion mi volas diri', mi diris. Li pli koleris. Li vokis sian subulon, kaj ordonis lin elĉambrigi min. Mi ankoraŭ hezitis, kaj la subulo venis, metis siajn manojn sur mia ŝultro, kaj puŝis min ekster la ĉambro.

Foriris la mastro, kaj la subulo, kaj mi, ege ĝene, lasis la lokon. Mi tuj transsendis noteton: 'Vi insultis min. Vi atakis min per via subulo. Se vi petos mian pardonon, mi devos procesi kontraŭ vi.'

Rapide venis la respondo de lia ĉevalrajdanto:

'Vi estis malĝentila. Mi petis vin foriri, sed vi ne tion faris. Mi havis nenian elekton krom ordoni la subulon montri al vi la pardonon. Eĉ post li petis lin lasi la oficejon, vi ne faris tion. Li do devis uzi la necesan forton por elĵeti vin. Vi estas tute libera fari kion ajn vi volas.'

Kun tiu ĉi respondo en mia poŝo, mi revenis hejmen, malgaje, kaj rakontis ĉion al la frato. Li ĝeniĝis, sed ne sciis, kiel konsoli min. Li parolis al siaj advokataj amikoj. Tion li faris ĉar mi ne sciis kiel procesi kontraŭ mastro. Kavaliro Pherozshah Mehta estis tiutempe en Raĝkot (de Mumbajo), kadre de iu proceso. Sed kiel povis tia juna advokato kia mi aŭdaci vidi lin? Tial mi sendis la paperojn de mia proceso, per la advokato kiu vokis lin, kaj petis lin konsili min. 'Diru al Gandhi,' li diris, 'ke tiaj ĉi aferoj estas kutimaj spertoj de multaj advokatoj. Li ankoraŭ estas freŝa de Anglujo, kaj varmsanga. Li ne scias la britajn oficialulojn. Se li volas gajni monon ĉi tie, kaj vivi facile, li disŝiru la noteton, kaj enpoŝigu la insulton. Li gajnos nenion pro proceso kontraŭ la mastro, kaj male, plej probable, ruinigos sin. Diru al li, ke li ankoraŭ devas lerni pri la vivo.

La konsilo estis por mi tiom amara kiom la venenon, sed mi devis gluti ĝin. Mi enpoŝigis la insulton, sed ankaŭ profitis pro ĝi. 'Neniam plu mi metos min en tia ĉi falsa situo, neniam mi ekspluatos la amikecon tiel', mi diris al mi, kaj ekde tiam mi neniam rompis tiujn decidojn. Tiu ĉi ŝoko ŝanĝis mian vivvojon.

## **5. *Preparoj iri al Sudafriko***

Ja estis mia kulpo iri al tiu oficialulo. Sed lia nepacienco kaj aroganteco estis tute eksterproporcie al mia eraro. Ĝi ne meritis elĵetigon. Mi apenaŭ forprenis kvin minutojn de lia tempo. Sed li simple ne povis elteni mian paroladon. Li povintus ĝentile peti min foriri, sed la povo jam ebriigis lin tro. Poste mi eksciis, ke la pacienco ne estis unu el la virtoj de tiu oficialulo. Li kutime insultis vizitantojn. La plej malgranda malplaĉaĵo povis ĝeni la mastron.

Nun mia laboro kompreneble estos plejparte en lia kortumo. Estis preter mia kapablo pacigi lin. Mi ne volis akiri lian bonvolon. Efektive, nun ke mi jam minacis procesi kontraŭ li, al mi ne plaĉis resti silenta.

Intertempe, mi eksciis iom pri la intrigaj politikoj de la lando. Ĉar Kathiawad estis aro de malgrandaj ŝtatoj, ĝi kompreneble abundis je politikistoj. Aĉaj intrigoj inter ŝtatoj, kaj povaj intrigoj inter oficiistoj estis ĉiutagaj aferoj. La princoj ĉiam dependis de aliaj, kaj volonte kredis je la vortoj de flatantoj. Oni devis peti komplezon de eĉ la subulo de la mastro, kaj la sariŝtedar, la registristo kaj oficejestro de la mastro, estis pli ol la mastro mem, ĉar li estis la okuloj, oreloj kaj la interpretisto por la mastro. Lia volo estis la leĝo, kaj onidire, lia enspezo estis pli ol tiu de la mastro. Tiu lasta eble estis troigo, sed li certe vivis preter sia salajro.

Tiu ĉi medio ŝajnis al mi venena, kaj kiel resti netuŝita de ĝi estis ĉiam por mi problemo.

Mi estis tute malĝoja kaj la frato klare tion vidis. Ni ambaŭ sentis, ke se mi povus gajni postenon, mi liberiĝus de tiu ĉi medio de intrigo. Sed sen intrigo akiri ministrecon aŭ postenon kiel juĝiston estis tute neeble. Kaj la kverelo kun la mastro baris la vojon al la laboro kiel advokato.

Mi devis iri al Porbandar por akiri kelkajn pliajn povojn por la juna Princo. Mi ankaŭ devis vidi la Administranton pri la peza imposto, kiun la popoloj Mer devis pagi. La oficialulo, kvankam li estis Baratano, estis eĉ pli aroganto ol la mastro. Kapabla homo, sed la terkultivistoj profitis nenion je lia kapablo. Mi sukcesis akiri kelkajn

pliajn povojn por la Princo, sed apenaŭ ia helpo por la Mer. Ŝajnis al mi, ke oni eĉ ne zorge ekzamenis ilian peticion.

Do, eĉ en tiu ĉi misio, mi estis relative nesukcesa. Mi kredis, ke la klientoj ne akiris la justecon, sed mi ne havis la rimedojn akiri ĝin. Maksimume, mi povus peticii la Politikan Agenton aŭ al la Guberniestro, kiu nuligus la peticion per, 'Ni ne povas eniri la aferon.' Se entute ekzistus ia regularo pri la afero, tio estus almenaŭ io, sed ĉi tie, la volo de la mastro estis la leĝo.

Mi frustiĝis.

Intertempe, venis al la frato jena propono de Meman-a firmao de Porbandar: 'Ni havas komercon en Sudafriko. Temas pri granda firmao, kaj ni nuntempe havas proceson en la kortumo, kies valoro estas 40.000 pundoj. Jam longe daŭris la proceso. Ni dungis la plej bonajn advokatojn. Se vi sendos vian fraton tie, tio estos utila al ni kaj ankaŭ al li. Li povus doni pli bonan konsilon ol ni al nia advokataro. Kaj li havus la avantaĝon vidi novan parton de la mondo, kaj fari novajn ekkonatiĝojn.'

La frato diskutis la proponon kun mi. Ne estis al mi klara, ĉu mi devos simple konsili la advokataron aŭ aperi en la kortumo. Sed mi estis tentita.

La frato enkondukis min al la bedaŭrata Seth Abdul Karim Jhaveri, partneron de la firmao Dada Abdullah, la firmao priparolita. 'Ne estos malfacila tasko,' la Seth certigis al mi. 'Ni havas grandajn Eŭropanojn kiel niajn amikojn, kiujn vi ekkonos. Vi povas esti utila al ni en nia vendejo. Multe de nia korespondado estas en la angla lingvo, kaj vi povas helpi nin ankaŭ pri tio. Vi kompreneble estos nia gasto, kaj do tute ne havos ian ajn elspezon.'

'Kiom longe vi bezonos miajn servojn?' mi demandis. 'Kaj kio estos la pago?'

'Ne pli ol unu jaro. Ni pagos al vi unuanklasan revenbileton kaj sumon de 105 pundoj, entute.'

Oni ne povis nomi tiun ĉi advokateco. Mi estus dungito de la firmao. Sed iel ajn mi volis lasi Baraton. Estis ankaŭ la tenta ŝanco vidi novan landon, kaj havi novajn spertojn. Plue, mi povus sendi 105 pundojn al

la frato kaj helpi lin en la elspezoj de la hejmo. Mi akceptis la proponon senmarĉande, kaj pretiĝis iri al Sudafriko.



## **6. Survoje al Pretorio**

[...]

Je la sepa aŭ oka tago, mi ekstartis el Durbano. Oni aĉetis unua-klasan bileton por mi. Tie, por dormi en la trajno, oni devis aĉeti plian bileton de kvin ŝilingoj. Abdullah Seth konsilis min aĉeti ĝin, sed obstine, arogante, kaj provante ŝpari kvin ŝilingojn, mi rifuzis aĉeti la bileton por la litaĵo.

Abdullah Seth avertis min, "Vidu, tiu ĉi estas alia lando, ne Barato. Oni dependas je la Dio. Ne agu mizere. Bonvolu akiri la necesajojn."

Mi dankis lin, kaj diris, ke li restu senzorga.

Ĉirkaŭ la naŭa, la trajno atingis la ĉefurbon de Natalo, Maritzburgo. Ĉi tie oni donas la litaĵon. Iu funkciulo de la fervojo venis kaj demandis, "Ĉu vi bezonas litaĵon?"

Mi diris, "Mi havas mian propran."

Li foriris. Dume venis pasaĝero. Li rigardis min. Trovante, ke mi estas alia koloro de li, li ĝeniĝis, eliris, kaj revenis kun unu-du stabanoj. Neniu diris ion ajn al mi. Finfine, alia stabano venis. Li diris, "Venu ĉi tie. Vi devas iri al la lasta vagono."

Mi respondis, "Mi posedas bileton por la unua klaso."

Li respondis, "Tio ne gravas. Mi diras al vi, ke vi devas iri al la lasta vagono."

"Mi diras, ke mi estas sidigita en tiu ĉi vagono en Durbano kaj mi intencas iri nur en tiu ĉi."

La stabano diris, "Tio ne povas okazi. Vi devas elvagoniĝi, kaj se vi ne faros tion, soldato vin elvagonigos."

Mi diris, "Soldato min elvagonigu, mi mem ne elvagoniĝos."

Soldato venis. Li kaptis mian manon kaj, puŝante, min elvagonigis. Mia pakaĵo estis elvagonigita. Mi rifuzis iri al alia vagono. La trajno ekforiris. Mi sidis en la atendoĉambro. Mi havis kun mi la mansaketon. Mi ne tuŝis la ceteran pakaĵon. La fervoja stabo metis ĝin ie. Estis la vintra sezono. La vintro en altaj provincoj de Sud-Afriko estas akrega. Maritzburgo estas en tiu ĉi provinco. Pro tio mi ege malvarmiĝis. Mia palto estis en mia pakaĵo. Sed mi ne kuraĝis

demandi por mia pakaĵo. Se mi estos denove humiligita? Mi tremadis pro la malvarmo. Ne troviĝis lampo en la ĉambro. Ĉirkaŭ la meznokto venis pasaĝero. Ŝajne li volis diri ion al mi, sed mi ne estis en konversacia mensostato.

Mi pensis pri mia devo: 'Aŭ mi batalu por miaj rajtoj aŭ mi revenu, aŭ mi toleru la humiligojn, atingu Pretorion, kaj finante la proceson, revenu baraten. Lasi la proceson duonfinita kaj forkuri estus nevideca. La sufero kion mi eltenas estas supraĵa. Ĝi estas simptomo de profunda malsano. Tiu ĉi malsano estas la kolordiskriminacio. Se mi posedas la forton por elimini tiun ĉi diskriminacion, mi devas uzi tiun forton. Farante tion, mi devas elteni ĉion kion mi devas elteni, kaj devas kontraŭi tiujn nur por la celo de la elimino de la kolordiskriminacio.'

Decidinte tion mi firme planis, iel ajn, iri antaŭen.

Frumatene, mi sendis longan plendotelegramon al la Ĝenerala Administranto. Mi ankaŭ informis amikon Abdullah Seth. Li tuj renkontis la Ĝeneralan Administranton. Li defendis la konduton de siaj homoj, sed sciigis, ke oni jam diris al la stacidomestro, ke mi estu atingigita senbare al mia celo. Abdullah Seth ankaŭ sendis telegramon al la hinduaj komercistoj en Martizburgo, kaj petis ilin renkonti min kaj prizorgi mian komforton. Kaj li ankaŭ sendis sampetajn telegramojn al aliaj stacidomoj. Pro tiuj komercistoj venis al la stacidomo por renkonti min. Ili rakontis pri siaj malfacilaĵoj kaj diris al mi, ke tio kio okazis al mi tute ne estas surpriza. Kiam baratanoj veturas per la unua aŭ dua klaso, kutime starigas barilojn kaj malfacilaĵojn la funkciuloj kaj aliaj pasaĝeroj. Pasis la tago aŭskultante tiajn ĉi rakontojn. Noktis. Venis la trajno. Oni pretigis mian sidlokon. La bileto por la litaĵoj kiun mi rifuzis aĉeti en Durbano, mi aĉetis en Martizburgo. La trajno prenis min Ĉarlztaŭnen.

## **7. *Pliaj malfacilaĵoj***

La trajno atingadis Ĉarlztaŭnon matene. Tiutempe, ne ekzistis trajno por atingi Ĝohanesburĝon de Ĉarlztaŭn; oni devis uzi kaleŝon, kaj tranokti en Standerton. Mi posedis bileton por la kaleŝo. La bileto ne nuligiĝis malgraŭ, ke mi atingis unu tagon malfrue. Krome, Abdullah Seth [= vendejposedanto; riĉa komercisto] jam telegramis al la kaleŝestro en Ĉarlztaŭn. Sed tiu lasta nur bezonis pretekston, kaj supozante min tuta strangulo, li diris, "via bileto jam nuliĝis." Mi donis la taŭgan respondon. Sed, memevidente, li diris al mi pri la biletnuliĝo pro tute alia kialo. La pasaĝeroj ĉiuj sidis ene de la kaleŝo. Sed mi apartenis al la kategorio 'Kulio' [= neblankhaŭta laboristo]. Aspektis strangulo. Tial la kaleŝestro decidis, ke estus bone se mi ne sidu kun la blankaj pasaĝeroj. Ekster la kaleŝo, t.e., dekstre kaj maldekstre de la ŝoforo, troviĝis du benkoj. Sur unu el tiuj sidadis blanka estro de la kaleŝfirmao. Li sidis ene, kaj sidigis min apud la ŝoforo. Mi ja komprenis, ke tiu ĉi estas tute neĵusta -- insulto. Sed mi decidis, ke estus konvene toleri tiun ĉi insulton. Tute ne estis la situacio, ke mi perforte povus sidi ene. Se mi obstinus, foriros la kaleŝo kaj mi perdos plian tagon; kaj nur dio scios kio okazus en la posta tago! Tial mi decidis agi saĝe, kaj sidis ekstere. Sed mense mi ege ĝeniĝis.

Ĉirkaŭ la tria, la kaleŝo atingis Pardikopon. Nun la blanka estro volis, ke li sidu kie mi sidis. Li volis fumi cigaredon. Li ankaŭ volis ĝui la aeron. Tial, li prenis malpuran tukon kiu kuŝis apud la ŝoforo, kaj ĵetante ĝin sur la benko kie oni metis la piedojn, diris al mi, "Sami, sidu tie. Mi volas sidi apud la ŝoforo. Mi ne sukcesis toleri tiun ĉi insulton. Tial, tremante mi diris al li, "Vi sidigis min tie ĉi kaj mi toleris tiun insulton. Mi rajtis sidi ene, sed vi sidis tie, kaj sidigis min tie ĉi. Nun vi volas sidi ekstere kaj fumi cigaredon, tial vi volas sidigi min ĉe viaj piedoj. Mi volonte iros ene, sed ne konsentas sidi ĉe viaj piedoj."

Apenaŭ mi diris tiom da vortoj, ke sur mi komencis pluvado da batoj, kaj tiu blankulo kaptis mian brakon kaj ektiris min. Apud la benko troviĝis latuna balustrado. Mi demone kaptis ĝin kaj decidis, ke eĉ se rompiĝus la manradiko, mi ne lasos la balustradon. La pasaĝeroj en la

kaleŝo vidis tion kio estis okazanta al mi. Sakrante, tiu blankulo estis tiranta kaj batanta min. Sed mi silentis. Li estis fortulo kaj mi, malfortulo. Multaj pasaĝeroj kompatis min, kaj kelkaj el ili ekdiris: "Hej! Permesu tiun kompatindulon resti tie. Ne batu lin senkiale. Li pravas. Se ne tie, permesu lin sidi ene kun ni." La blankulo diris: "Tutcerte ne." Sed li ja iomete hontiĝis. Tial li ĉesis batadi min, kaj lasis mian brakon. Li sakradis iom plu, sed li sidigis piede la hotentotan serviston, kiu estis sidanta je la alia flanko, kaj mem sidis sur la benko. La pasaĝeroj residis en la kaleŝo. Sonis la fajfilo. Ekiris la kaleŝo. Mia koro ja batis laŭte. Mi ekdubis ĉu aŭ ne mi atingus mian celon viva. Tiu blankulo ripete min fiksrigardadis kolere. Montrante sian fingron al mi, li subvoĉe minacis min: "Memoru. Ni atingos Standertonon kaj poste mi lernigos al vi lecionon." Mi sidis mute, kaj preĝis al la dio, ke li savu min.

Noktis. Ni atingis Standertonon. Videblis multaj barataj vizaĝoj. Mi iomete trankviliĝis. Tuj post mi deiris de la kaleŝo, tiuj amikoj diris: "Ni atendis ĉi tie por preni vin al la vendejo de Isa Seth. Al ni jam atingis la telegramon de Dada Abdullah." Mi ege ĝojis. Ni atingis la vendejon de Seth Isa Haji Sumar. ĉirkaŭis min la Seth kaj liaj laborantoj. Mi rakontis al ili tion kio okazis al mi. Ili ege bedaŭris, kaj komfortigis min per rakontadoj de siaj propraj amaraj spertoj. Mi volis sciigi la agenton de la kaleŝfirmao tion kio okazis al mi. Mi verkis leteron al li. Mi priskribis la blankulon kiu minacis min, kaj volis certigon, ke kiam ekiros morgaŭ la kaleŝo, mi trovos lokon ene de la kaleŝo, kun la ceteraj pasaĝeroj. Mi sendis la leteron al la agento. Li mesaĝis al mi jene: "Pli granda kaleŝo ekiras de Standertono kaj ŝanĝiĝas la ŝoforo kaj la aliaj. Morgaŭ ne estos tiu viro kontraŭ kiu vi plendis. Vi certe sidos kun la aliaj pasaĝeroj." Mi iom trankviliĝis pro tiu ĉi mesaĝo. Mi kompreneble tute ne planis ekprocesi kontraŭ tiu blankulo kiu batis min. Tiel fermiĝis ĉi tie la ĉapitro de la batado. Matene la laborantoj de Isa Seth prenis min ĝis la kaleŝo. Mi akiris la deciditan lokon en la kaleŝo, kaj sen pliaj problemoj mi atingis tiu nokte Ĝohanesburgon.

## **Glosaro**

En la vokaloj, la majuskla formo indikas longan tempodaŭron: la dio nomiĝas rAmo.

En la konsonantoj, la majuskla formo indikas aspiracion, t.e., forta kunspira prononco.

Advaita [advEjtA]. s. Malduismo.

Ahimsa [ahimsA]. s. Senperforteco.

Bidi [bIdI]. s. sentabaka cigaredeto farita el la folioj de la planto tendu (). Popularega en la barata kamparo.

Brahmacharya [brahmaĉArja]. s. Fraŭleco. Unu el la stadioj de la vivo de hindua viro, karakterizita per studado, needziĝeco, kaj virgeco.

Darmo s. Justa, virta ago (temas pri pli ampleksa signifokampo ol tio kio aperas en PIV)

Dhatura [DatUrA]. s. Planto () kies semoj estas venenaj. Ankaŭ uzata kiel medicino en la medicin-sistemoj indiĝenaj, kiel, ekzemple, en la Ajurveda.

Ghee [GI]. s. Butero boligita ĝis klara fluido. Uzata vaste kaj en barata kuirado, kaj hinduaj ritoj -- dum la lasta kiel diofertaĵo.

Moksha [mokŝA]. s. Liberiĝo de la ciklo de naskiĝo kaj morto.

Satyagraha [satjAgraha]. s. Laŭvorte, "kapti la veron". Barakti sindoneme por la vero.

Surdas. s. Poeto (1483-1563 aŭ 1540-1620). Ĉefa poeto en la Hindia de la adorado de Kriŝno dum la mezepoka literatura kaj spirita periodo Bhakti.

Tola. [tolA]. s. Pezo (=10 gramoj) uzata nur por pesi oron kaj arĝenton.

## ***Notoj***

### Enkonduko

tial mi donis al tiu eseo la unuan titolon de "Eksperimentoj kun la Vero" -- Ial, la angla traduko inversas la ordon de la titolo, kontraŭ tiu ĉi eksplicita deklaro de Gandhi, kaj elektis Aŭtobiografion aŭ La Rakonton pri Miaj Eksperimentoj kun la Vero. Jen ŝanĝo ne nur de la ordo de la titoloj, sed ankaŭ de la titolo mem!

Surdas -- La hindia traduko (same kiel la guĝarata originalo?) ne donas la nomon de la poeto; nur la angla traduko faras tion. Evidente, Gandhi kaj Trivedi (la tradukinto al la hindia) kredis, ke la verso estas sufiĉe vaste konata de la parolantoj de tiuj du lingvoj. Estus interese vidi la solvon en aliaj lingvoj barataj.

26a de la Novembro, 1925 -- La hindia traduko donas la daton laŭ la kalendaro hindua, t.e., Margaŝirŝ Ŝukla 11, 1982.

### Naskiĝo

Bania -- La hindia traduko (kaj nek Gandhi mem en sia originalo?) ne donas tiun detaleton. La angla, jes.

### Edzeco

Noto 1: Edzeco -- La angla traduko titolas la ĉapitro, "Ludi Edzece" ("Playing the Husband"). Ŝajne, la tradukinto elektis tiun ĉi titolon pro la jena frazo en la antaŭa ĉapitro: "Du naivaj infanoj tute nesciante ĵetis sin en la vivmaron." Sed tiu ĉi ĉapitro traktas dolorige seriozajn, plenkreskulajn aferojn -- tute ne ludemajn -- kaj tial ŝajnas pli taŭga la esencoserĉanta titolo de la hindia, "Patitva" ("Edzeco").

### Finfine Atingis Anglujon

Noto 1: salutis min varme -- La angla traduko daŭras jene: "Vidante miajn vestaĵojn, li ridetis." De kie do prenis la angla tradukinto tiun detaleton, se ĝi ne troviĝas en la originalo? Eble jen ekzemplo de "revizio de Gandhi mem" pri kio la angla tradukinto parolis en siaj antaŭvortoj.

Noto 2: tuj haltigis min -- La angla traduko diras al ni, ke "D-ro Mehta rigardis min iomete kolere, kaj haltigis min".

Mia Plaĉo

Noto 1: Volumo de Bentham: La angla traduko informas nin, ke temas pri la libro Teorio de Utileco de Bentham.

Noto 2: Anglo-Indian -- Brito dum la koloniisma periodo kiu igis Baraton sia hejmo. Ankaŭ la posteulo de tia homo nomiĝas 'anglo-indian'.

Enkonduko al la Religioj

Noto 1: La angla traduko tamen komencas tiun ĉi ĉapitron per "Fine je la dua jaro de mia resto en Anglujo, mi ekkonatiĝis du teozofoj...." Jen la tipo de la malsimileco inter la hindia kaj angla tradukoj, kiu igas min pensi pri la "zorga reviziado", kiun raportas la angla tradukinto (Mahadev Desai) en sia Antaŭparolo de la Tradukinto (1940). Ĉu Gandhi mem reviziis la tempon de la renkontiĝo inter si kaj la teozofoj inter la guĝarata/hindia versioj kaj la angla? Mi fidus pli je la angla traduko se ĝi ne estas preninta tiajn 'liberojn' kiajn mi menciis supre pri la titolo de la libro, aŭ tiu de Noto 3 sube en tiu ĉi ĉapitro.

Noto 2: Tiun ĉi version de la Gito mi tradukis de la piednota hindiigo en la originalo. Mi kontrolu la esperantiigon de Francisco Valdomiro Lorenz (Rio de Janerio, 1975). Ĉu ekzistas ankaŭ aliaj tradukoj?

Noto 3: Sed deklaras la angla traduko "Ankaŭ ĉeestis kelkajn pastrojn por honori lin." Kial ŝanĝi la 'multajn' de la originalo al 'kelkajn'?

Ramo: La forto de la malfortaj

La titolo estas refreno de fama himno de Surdas, "Li estas la helpo de la senhelpaj, la forto de la malfortaj."

Narajan Hemĉandr

Narajan HEMĈANDR (1855-1904), verkis la unuan aŭtobiografion en la guĝarata. Li ankaŭ estas konata tradukinto de bengalaj literaturaĵoj en la guĝaratan.

Maharŝi Debendranath TAGOR (1817-1905), patro de la fama Rabindranath TAGOR, estis unu el la pioniroj de la reforma movado de Hinduismo nomata Brahma Samaĝ.

Advokato, jes, sed kion poste?

La nomoj de tiuj anglaj verkistoj estas redonitaj, kompreneble, en la devanagara skribo en la hindia fontteksto. En tiu ĉi alineo, mi transskribas parenteze la devanagaran prononcon post la nomoj (kopiitaj de la angla tradukado) por doni 'gusteton' de la hindia prononcado de tiuj ĉi nomoj. Foje, tamen, la esperanta alfabeto ne kaptas la pli vastan gamon da devanagaraj sonoj (ekzemple, ĉe la 'd' de Goodeve [gudiv] kiu estas, kaj en la angla kaj la hindia, postdenta plozivo, ne denta, kiel oni dirus en Esperanto).

### Mia dilemo

La hindia traduko uzas la esprimojn hindu ŝastr kaj islami kanun, kie ŝastr kaj kanun pli-malpli sinonime respondas respektive al sanskritdevena kaj arabadevena vortoj. Jen ebleco de paraleleco inter la hindia kaj urdua kiun ekspluatas la hindia tradukinto. Eĉ la telugua traduko ne nuancas tiel, malgraŭ la disponebleco de la vortoj. Kio pri la guĝarata? Mi kontrolu....

Dadabhai NAOROJI [naoroĝi] 1825-1917. Epitete, "La Grandulo de Barato", unu el la estraro de la sendependeca movado de la lando. Lia libro pri la ekonomia ekspluatado de Barato, Malriĉeco kaj Ne-Brita Rego en Barato (1901) havis grandan influon.

### Rajĉandbhai

La angla traduko metas la frazon "Mi maltrankvilege atendis la renkonton kun la patrino" ĉe la komenco de tiu ĉi alineo (pri la morto de la patrino), anstataŭ en la komenco de la antaŭa alineo (kiel faras la hindia traduko, kaj eble ankaŭ la guĝarata originalo). Tiu ĉi rearanĝeto, laŭ mi, plibonigas la rakontflon de la teksto. Jen, eble, plia efiko de tiu "avantaĝo de la revizio de Gandhi-ji" kiun mencias la antaŭvortoj de la angla tradukinto.

Alia interesaĵo: Ankaŭ la telugua tradukaĵo rearanĝas la tekston same kiel la angla. Tio indikas al mi, ke la telugua tradukinto (VEMURI Radhakriŝnamurti) uzis la anglan version kiel sian baztekston, nek la originalan guĝaratan, nek eĉ la hindian tradukon! En Barato, verkoj de famuloj (kiel Gandhi aŭ R Tagor) cirkulas en pluraj lingvoj. Sed, oftege, nek la eldonejoj nek la tradukantoj indikas la fontlingvon de siaj tradukoj. Tiel, teluguaj tradukoj de la verkoj de Tagor ofte estas tradukitaj ne el la originala bengala sed el la hindia (aŭ eĉ angla) tradukoj.



## Mondeniro

Tiel estas, "Tia ĉi bramano mi estas." La hindia tradukinto uzas kampan varianton de bramano, kiun mi redonis per 'bamano'. La angla tradukinto ne provis redoni tiun ĉi lingvaĵon. Nek faris tion la telugua tradukinto. Plia indiko, ke la fontteksto de la telugua traduko estis la angla traduko.